

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Kasisto: S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 152 (232)

MELBOURNE

Jan.-Feb., 1977

ESPERANTO- SOMERLERNEJO EN TOOWOOMBA

Nia agema samideanino, S-ino Jean Lehane, iniciatis tri Esperantokursojn en la kadro de la "Darling Downs Institute of Advanced Education" (D.D.-I.A.E). situanta en la bela ĝardenurbo Toowoomba, komerca centro de la pitoreskaj kaj fruktodonaj Darling Downs (kio signifas "Karaj Montetoj")*. Dudek ĝesamideanoj ĉeestis, ekde la 10-a ĝis la 20-a de januaro, 1977. Tiu 8-a Somera Altlernejo de D.D.I.A.E. prezentis ankaŭ, kiel kutime, kursojn pri belarto, muziko, skulptarto, pentroarto kaj ceramikarto, teksado, pup-teatro k.t.p.

La Esperanto-kurson por komencantoj instruis S-ro Wre Chandler de Sidnejo (Mond-Prezidanto de O.R.E.), per la lernolibro "Privilegia Vojo al Lingvoscio" de Vilho Setälä. Partoprenis S-inoj J. Hock (Rockhampton), E. Steele (Brisbane), H. Nickels (Melbourne) kaj S-ro R. Weis (Toowoomba).

S-ro Ray Ross (Prezidanto de la Brisbane Esperanto-Societo) instruis la mezgradulojn laŭ "Paŝoj al Plena Posedo" de William Auld. Partoprenis S-inoj P. Guy (Rockhampton), R. Maltman (Toowoomba), A. Spencer (Brisbane), E. Taylor (Ora Marbordo), F-inoj J. Turner (Rockhampton), G. Morgan (Toowoomba) kaj S-roj R. McNeill (Rockhampton) kaj E. Whiston (Brisbane).

S-ro Trevor Steele gvidis la altgradulojn: S-inoj W. Greenhalgh kaj S-ino S.

Martin (Rochester), D. Sinclair (Pea-chester) kaj J. Lehane (Toowoomba), kun Profesoro R. Robertson (Manly). Ili avide tralegis kaj pridiskutis romanon "Kiel akvo de l'Rivero de Raymond Schwartz, kaj poezion verkon "Humoroj" de William Auld. Survoje ili renkontis multajn esprimojn antaŭe nekonatajn eĉ inter altgraduloj.

Dum la dektaga kurso, la kursanoj loĝis en "Fairholme" (Bela hejmo), altlernejo por knabinoj, situanta ĉe la rando de la Toowoomba altebenajo. Ĉiumatene, je tagiĝo, la suno vekis la plej viglajn kursanojn por ke ili povu rigardi la belan pejzaĝon tra la fenestroj de la dormĉambroj, promeni tra la florplenaj parkoj kaj plezurbaroj, aŭ naĝi en la lerneja naĝejo, sufiĉe luksa; la malpli viglaj, plenumintaj la hejmtaskojn, rajtis ripozi ĝis matenmanĝo. La lerneja kuirejo provis ĉiutage tri bongustajn kaj kontentigajn manĝojn, ankaŭ kukojn kaj sandviĉojn dufoje ĉiutage por te-paŭzoj. La personaro de la lernejo estis ĉiam preta por plenumi ĉiujn bezonojn sen iu plendo.

La unuan semajnon, gekursanoj el ĉiuj grupoj kunvenis ĉi-vespere en komuna cambro, kaj sin distris per ludoj, ŝercoj kaj seriozaj rakontoj, kaj kantoj ĉirkaŭ la fortepiano, en la internacia lingvo, kompreneble. Sabaton posttagmeze ĉiuj vizitis belan artekspozicion, survoje al rezervejo por indigenaj flauŝoj kaj faŭno. Post refreŝiga naĝado, ili ĉirkaŭiris la rezervejon per speciala vagonareto. Lerta gvidisto pritraktis laŭt-

parolile la preĵaĝon, kreskaĵojn, birdojn kaj marsupialojn.

Dimanĉe kursanojn kaj amikojn afable gastigis S-ro Bob Weis, el la komen-canta grupo, ĉe sia luksa kaj bela moderna hejmo en la najbara kamparo, per bongusta sub-ĉiela rostaĵo. S-ro Steele esprimis elkoran dankon de la grupo, kaj ĉiuj kantis: "Li estas ja bone-julo".

Lundon vespere Profesoro Robby Robertson gvidis la ĉeestantaron laŭ "La Vojo ĝis la Luno" per lumbildoj, kaj ĉiuj sukcesis reveni teren post la longa vojaĝo. Mardon vespere S-ro Wre Chandler pritraktis diapozitive sian vojaĝon inter O.R.E.-anoj, kiuj bon-venigis kaj gastigis lin en Eŭropo pasint-jare. Merkredon vespere la muzikaman-toj el la kursanaro ĉeestis ĝuidan kon-certon de la profesie kompetenta somer-lerneja orkestro. Ĵaŭde okazis la kurs-fina bankedo en la granda aŭlo de D.D.I.A.E.; la konstruaĵo estis modern-stila kaj komforte klimatizita kaj la kvalito de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis alta. Poste oni dancis, ankaŭ modernstile, do, la amplifilo estis iom tro laŭta.

Nu, kiel taksu la sukceson de la aranĝoj? Bona amikema kaj samideana etoso estiĝis ekde la unua ĉefmanĝo. La tutan tagdekon konstanta ridado interrompis Esperantan konversacion. Loĝi en Esperantujo dek tagojn estis feliĉe, kuragiĝe kaj inspire; kelkaj opiniis, ke ili gajnis pli da scio ol dum tutjara ĉiusemajna kurso. La klimato de tiu altebenajo ege taŭgas por somera kurso; la komforta loĝejo, abundaj bongustaj manĝaĵoj, kaj helpema personaro de la lernejo ege plaĉis al kursanoj. La venontan januaron ni kongresos en Launceston, do, ni ne povos ĉeesti kurson en Toowoomba, sed post 2 jaroj somera kurso denove estos rekomend-inda. Efektive, la ebleco de kongreso en tiu urbo estas konsiderinda. — Robo II * Fakte, la nomo "Darling" devenis honore al Sir Ralph Darling (1775-1858), guberniestro de N.S.K. 1825-31. La nomon portas rivero, pli longa parto de river-duo ("Darling-Barwon") alflu-anta al la "Murray". Apudaj regionoj en Sudorienta Kvinlando kaj nordori-enta N.S.K. nomiĝas "Darling Downs" (Red.)

Stafeto translokiĝas al Danlando: Pro interkonsento inter Torben Kehlet kaj Juan Regulo Perez, la du eldonaj orqan-izoj kunfandiĝos kaj funkcios en Dan-lando sub la nomo "S T A F E T O — T. K."

ESEO-KONKURSO

GAJNŬ FLUG-BILETON AL LAUNCESTON

En la jaro 1931, anoj de la Melburna Esperanto-Societo starigis, honore al mortinta prezidinto J. G. Pyke, fonduson kies interezon ili disponigis kiel premion por la kandidato, kiu, post unu-jara studado, plej sukcesis en elementa ek-zameno. Pro la posta starigo de 3 sin-sekvaj ekzamenoj de la Aŭstralia Ek-zamana Komisiono, tiu Fonduso stagnas dum pluraj jaroj, sed nun la Komitato de la Melburna E-Societo decidis revivigi ĝin, kaj dediĉi la interezon al konkurso alispeca.

Ci-jare la intenco estas okazigi ESEO-KONKURSON laŭ la t2mo

"KIEL REAKTIVIGI NE PLU AKTIVAJN ESPERANTISTOJN?"

La premio estos revena flugbileto de Melbourne al Launceston por partopreni la Aŭstralian Esperanto-Kongreson.

La kondiĉoj: 1-e: Verku escon, mini-mume mil-vortan, laŭ la supr-citita titolo kaj sendu al "Melbourne Esper-anto Society", Box 2122 T., G.P.O. MELBOURNE, 3001. 2-e: Metu vian eszon sen nomo en koverton sufiĉe gran-dan, kaj aldonu kune malpli grandan koverton sigelitan, kiu enhavas vian nomon kaj adreson. 3-e: Devos partopreni almenaŭ du konkursantoj.

Ĵen via oportuno! Ekverku!

NIA HISTORIO

No. 16 PIONIRAJ ESPERANTISTINOJ DE MELBURNO

Dr. Lilian Alexander, kiu loĝis ĉe 17 Murphy St., South Yarra, aliĝis al la klubo en 1906 kaj estis membro de la komitato en 1907 kaj 1908. Supozeble ŝi estis entuziasma Esperantistino jam en 1902, ĉar ŝi aliĝis en tiu jaro al la Monda Ligo de D-ro Zamenhof (N-ro 14766).

Tamen, ŝia nomo ne plu aperas post 1908, kio sugestas ke ŝi eble forlasis Melburnon aŭ Viktorion aŭ eĉ Aŭst-ralion, je tiu tempo.

S-ino M. T. Dacomb el Surrey Hills kaj ŝiaj 2 filinoj Beatrice kaj Clara aliĝis al la klubo en 1907. Tiuj 3 sinjorinoj in-ventis la "Dacomb-Sistemon de Steno-grafio, kaj gvidis komercan kolecion en Melburno. Esperanto estis unu el la stud-temoj, kiujn ili instruis. S-ino Dacomb (N-ro 16555) estis membro de

la Zamenhofa Ligo, eble jam en 1904. F-ino Beatrice Dacomb estis kasistino de la klubo en 1908.

S-ino Mary Harrison, kiu loĝis ĉe Charlotte Place, St. Kilda, aliĝis al la klubo 28/12/1906 kaj estis ankaŭ membro de la Zamenhofa Ligo (N-ro 20935). Ŝi estis tre kapabla kaj entuziasma E-istino, sed ŝajne estis daŭre ĝenata de malsano. Ŝi estas membro de la klub-komitato en 1908 kaj partoprenis la unuan Aŭstralian E-Kongreson en Adelaide en Oktobro 1911. Ŝajne por helpi la sansataton ŝi faris plurajn marvojaĝojn al N.S.K. kaj Kvinlando en 1908 kaj al la Filipinoj en 1911. Ŝi verkis priskribon pri unu el siaj vojaĝoj, kiu aperis felietone en la "Aŭstralia Esperantisto" de D-ro Barrington, 1908-1909. Ŝi mortis en Melbourne 2/12/1912, nur 2 semajnojn antaŭ la 2-a Aŭstralia E-Kongreso en Melbourne.

La Melbourne E-Societo posedas la solan ekzistantan kolekton de tiu frua "Australian Esperantist". Sur kelkaj el tiuj estas skribita la nomo de S-ino May Harrison, do, verŝajne, post ŝia morto la edzo aŭ familio donacis ilin al la klubo.

Mrs. Tillotson, kiu estris la "Cafe Australasian" en Elizabeth Strato, Melbourne, aliĝis al la klubo 2/11/1906. Dum 6 monatoj, de decembro 1906 ĝis majo 1970 la klubo kunvenis ĉiusemajne ĉe ŝia kafejo.

Kune kun John Booth ŝi partoprenis la 7-an Universalan Kongreson en Antverpeno, Belgujo, en aŭgusto 1911, kaj je reveno en novembro 1911 ili ambaŭ raportis pri la kongreso ĉe unu el la klubaj kunvenoj. Ŝi estis membro de la komitato en 1913.

LAPENNA FONDUSO: Ĉar mi jam ne posedas la liston de la donacintoj, mi ne scias kiuj donacis al la Lapenna Fonduso dum la kongreso en januaro 1976. Ĉiu donacinto, kiu ankoraŭ ne ricevis sian ekzempleron de "Hamburgo en Retrospektivo", sendu al mi 60c por la afranko, kaj mi tuj sendos. Ken G. Linton.

62-a Unversala Kongreso en Rejkjaviko en Islando: Jam aliĝis el Aŭstralio Ges-roj I. Matasin, S-ino R. McGrath, Ges-roj L. McLochlan, S-ro W. Chandler, S-ino M. Chaldecott, S-ino B. Podmore, S-ino M. Lilford, D-ro kaj S-ino A. Einihoviĉi kaj Ges-roj A. E. Morrison. Kun la nomo de nia komitatano, S-ro Ken Linton, kiu ne iros, kvankam membro, la tuta nombro estas 14, kiu povus esti rekordo por Aŭstralio.

Aŭtomobilistoj el 31 landoj.

La Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista arigas jam 1006 membrojn en 31 landoj. Estus dezirinde, ke multaj interesuloj fariĝu delegitoj por aŭtoservo. Oni pe postulas teknikajn servojn de la delegitoj, sed helpon trovi riparejon k.t.p. Informiĝu ĉe Ken G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, Vic. 3162.

La fama Eiffel-Turo.

Mi ĵus finis fari 80 centimetrojn altan imitacion de la fama Pariza konstruaĵo; mi faris ĝin el alumetaj kungluitaj kaj kolorigis ĝin per argenta farbo. — Ni unue vidis la originalon dum la Internacia Esperanto Kongreso en 1932, la unua kongreso, kiun ni partoprenis kiel nov-bakitaj samideanoj. Kaj dum niaj vojaĝoj en 1967 kaj 1969 ni ĉiam denove admiris tiun inĝenieran majstro-verkon. Sekve, tre interesis min jena legajo pri ĝi: "Tiu konata distingilo en Parizo, la Eiffel-Turo, siatempe estis la celo de multaj insultoj. Balzac, laŭdire, fuĝis kriegante for de ĝia aspekto, dirante ke li ne povas toleri tiun kolosan vulgarecon. William Morris, la angla poeto, ŝajne partoprenis similan opinion. Dum lia longa restado en Parizo li kvazaŭ monaĥe enŝlosis sin en la restoracioj de la turo. Li ne nur prenis ĉiujn siajn mangazaĵojn tie, sed ankaŭ skribis la plimulton de siaj verkoj en la sama loko. Kiam iu persono diris al li. "La turo certe impresas vin", Morris furioze respondis: "Impresas min?! — Mi restas ĉi-tie, ĉar ĝi estas la sola loko, kie mi povas eviti vidi la malbenitan objekton!"

—P. E. Schwerin.

Sunbanante min ĉe la marbordo, mi rimarkis junan patrino ĉe la akvorando kie ŝi sin okupis pri pentrado, kaj dume garde observis infanĉareton. Ĉar la "lupoj" estis iom persistemaj tiutage mi moviĝis pli proksimen al ŝi. Ŝi rigardis min kun rideto: "Ĉu ne estas terure," ŝi rimarkis. "Ten la kialo, ke mi veniĝas la ĉareton. Kutime ĝi servas duoblan celon — ĝi fortimigas la lupojn kaj tenas miajn materialojn".

Kuracisto, ekzamenante magnaton: "Kontraŭe al tio, kion diras la sindikatoj, mi trovas, ke via koro estas vere en la ĝusta loko".

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Nur 13 Liganoj partoprenis la jarkunvenon de la Esperanto-Ligo ĉe la Instruista Kolegio, Nedlands, la 8an de decembro. Spite de la morto de du Liganoj kaj la eksigo de du, la membreco pliiĝis de 85 ĝis 92 dum la pasinta jaro. Je la 30a novembro, 1976, \$7,385.82 konsistigis la Lig-kason, el kiu la plejparto estas investita ĉe la "Perth Building Society".

S-ro A. C. Huts elektigis kiel Prezidanto por 1977. Aliaj oficistoj estos S-ro J. Hawks (vic-Prezidanto), S-ro W. H. Howard (Sekretario), S-ro O. W. Loneragan (Kasisto), S-ro R. Smeets, S-ro C. Dean kaj S-ino Ruth McGrath.

Je la 15a dec. 65 Liganoj kaj amikoj ĉeestis la Zamenhofan Feston ĉe "Harper Hall, East Perth". Post luksa bufeda vespermanĝo F-ino Stremple proponis toston al la memoro de D-ro Zamenhof, post kiam S-ro Howard resumis la paroladon anglalingve por la informo de niaj gastoj. Sekvis ĝuigaj distraĵoj. Tiurilate, ni ŝuldas dankon al S-ino Hancock kiu organizis kaj direktis horon kaj komunan kantadon. Tion subtenis S-ro Gobba per sia akordiono. Oni laŭte kaj daŭre aplaŭdis teatraĵeton en kiu rolis D-ro Einihovici, S-ino Payne, S-ro Mazza kaj S-ro McGann.

Ni esperas ke kiel eble plejmulto da Liganoj partoprenos tuttagan kunsidon je la 23a januaro ĉe la "Community Education Centre, Fremantle" por diskuti agadon por la jaro 1977.

Planado bone progresas por la disvastigo de Esperanta kurso el la Radiostacio 6NR starigita de la Instituto de Teknologio. La sonbendigita kurso "Ĝen Nia Mondo" jam estas ricevita de Anglujo kaj ni atendas ke la disaŭdigo komenciĝos antaŭ la fino de februaro.

—W. H. HOWARD.

● **LAUNCESTON:** La klubo festis la Zamenhof-Memortagon per bufeda manĝo en la hejmo de S-ino Lyn Carswell. Je la 9-a de januaro okazis krad-rosta pikniko ĉe la feria domo de Ges-roj M. Le Fevre en Binalong Bay. Membroj kaj amikoj pasigis agrablan tagon en bela ĉirkaŭaĵo.

● **MELBOURNE:** 'El la historio' estis la temo de la grup-vespero de 8/11. S-ro Marshall Cohen rakontis pri personaj renkontiĝoj kun Lanti, la fondinto de S.A.T. S-ino F. Koppel aldonis interesajn pri Lanti kaj pri ties rivalo E. Drezen el la nova libro "Vivo de Lanti".

Nia prezidanto, S-ro S. Kanački, revenis de sia vojaĝo al Jugoslavio. Je 15/11 kaj 29/11 li interese parolis pri nuntempa Jugoslavio kaj montris multajn bildojn.

Ges-roj P. Schwerin (Sydney) estis bonvenaj gastoj ĉe nia grup-vespero de la 22-a de novembro kiam S-ino Fay Koppel daŭrigis sian serion de prelegoj pri la Nilo riversistemo.

La Zamenhof-Festo de ĉiuj 4 Melburnaj E-grupoj okazis sabate, la 11-an de decembro en la halo de la skoltina asocio. Ĉeestis 53 personoj, inkluzive grupon el Morwell, kiu veturis longan distancon por ĉeesti la feston. S-ion D. Howes, filino de S-ro Maddern, kaj F-ino Philippa Maddern ravis per areto da popolkantoj kaj S-ino M. Wybenga, kun informa komentario, prezentis trafikajn bildojn pri partopreno en la atena mondkongreso kaj vagadoj tra Eŭropo. Prozaĵoj kaj poezio de grupanoj el Oakleigh kaj Melburno alternis kun amuzaj skeĉoj de grupanoj el Waverley kaj Malvern. S-ro Ivan Maddern revuis la jaron 1976 kaj S-ro Ken Linton festparolis laŭ la temo "Ĉu la Esperanto-Movado povas esti neŭtrala rilat eregion?" La jesan konkludon li subtenis citante versojn el la Zamenhofa poemo "Sub la Verda Standardo."

La Jarfina Festeto de la Melburna E-Societo okazis 13/12 en la Esperanto-Domo. S-ro H. Beechey parolis pri herboj kaj montris specimenojn utilajn por kuiri kaj sanigi. S-ro Koppel montris mapojn pri Nov-Zelando kaj skizis rondveturon kiun li planis por ferio dum Kristnasko. Surprizaj gastoj estis Ges-roj Tronerud el Tweed Heads, iamaj Melburnanoj. Luksa manĝeto konkludis gajan vesperon.

Gratulojn al May kaj Arnold Baldwin, pro la naskiĝo, je 16-a de decembro 1976, de filo Stuart Graeme.

● **SYDNEY:** Je 29/11 S-ino M. Chaldecott parolis pri Walter Burley Griffin, arkitekto, urbplanisto, Esperantisto, sekvanto de Rudolf Steiner kaj Henry George, certe viro multanka. Dank' al la biblioteko en Willoughby kaj N.C.-D.C. en Kanbero, S-ino Chaldecott montris dom-deseĝnojn kaj urbplanojn, kiel ankaŭ bildojn en libroj pri lia laboro.

6/12 S-ino Betty Cleminson (Manly) montris lumbildojn pri la Postkongreso de la Atena Kongreso. Belaj insuloj estis vizititaj. Por ŝi, mirinda estis la subtera palaco de Knossos, kun 1000 ĉambroj. Kiu konstruigis ĝin?

La Zamenhofa Vespero, 11/12/76, krom paroladoj de Robbie Robertson kiel A.E.A.-Prezidanto, kaj Arturo Cocking, estis virina afero. Margaret Chaldecott donis la festparoladon, laŭ la temo "La komerca valoro de Esperanto". Ŝi sciigis opiniojn de firmaoj, kiuj jam uzas Esperanto kaj montris reklamojn. Manlianoj priskribis elstarajojn de siaj vizitoj eksterlande. Kantoj alternis kun paroladetoj. Marjorie Duncan priskribis renkontiĝon en Bournemouth kun Ann Gash, kiu velis sola de Aŭstralio al Anglujo. Betty Cleminson, en trajno survoje al la Jungfrau-Monto devis eltrajniĝi kaj piediri ĝis venonta stacidomo ĉar aro da bovinaj refuzis foriri el la fervojo. Kay Morrison priskribis la kontraston inter la belaj konstruaĵoj kaj malfeliĉa popolo en Pollando. Pejzaĝan belecon kaj ĉiean feliĉon ŝi trovis en Germanujo. Arturo Cocking surprizigis kiam virino, proks. 40-jara, oferis al li sidlokon en aŭtobuso en Moskvo. Thelma Smith prezentis poemon Angla/Esperantan "Twas the Night before Christmas".

—M. CHALDECOTT

● **MANLY:** S-ino Edna Giles, 20/11/76, parolis pri travivaĵoj en Ĉinio, kiun ŝi lastatempe vizitis. Ŝi montris lumbildojn por ilustru sian interesplenan rakonton. Elstare memorindaj estis renkontiĝo kun Pekinaj Esperantistoj ĉe Hotelo Pekino, kaj vizito al la Ruĝa Flago Kanalo, konstruita per grandegaj penoj de la laboristoj. Je 23/11 ni havis ĝuindan interparolon pri la travivaĵoj de Arturo Cocking kaj Kay Morrison, kiuj ambaŭ uzis Esperanton en eksterlando.

Je 11-a de decembro nia klubo partoprenis la Zamenhof-Feston en la Esperanto-Domo de Sidnejo kaj kontribuis kelkajn erojn. Detalojn legu sub "Sydney".

—EDNA GILES.

● **Kanbero:** La Zamenhof-Vespero ĉe Harry kaj Irene Bluhm, 14.12, estis granda sukceso. Ni legis kaj diskutis, i.a., interesan leteron de S-ino Idyss Eimihovici (Perth) pri vizito kun la edzo al la Esperanto-Seminario en Brazilia.

Kvin el ni intencas veturi transmaren en 1977, kelkaj eble al la Universala Kongreso en Islando. Okazis diskuto pri la venonta Generala Kunveno kaj provizoraj proponoj por la estraro en 1977 estis: Prez. S-ino Barbara Amies; Vic-Prez: Jim Davidson, Sekretario: Ross Hyland; Kasisto: Sam Ellyard; Bibliotekistino: S-ino Mary Ellyard; Publicisto: Noel Gamble, kies nova adreso nun estas: 'Farnley', 8 La Prouse Street, Manuka, 2603.

● **BRISBANE:** La jara ĝenerala kunveno de la Brisbana E-Societo okazis la 6-an de decembro. Nova estraro elektigis: S-ro Ray Ross daŭras kiel Prezidanto. Aliaj estraranoj estas: Vic-Prez: Peggy Ross, Tom O'Grady; Sekretario: Cathy Sullivan; Vic-Sekr: Beverley Allatt; Kasisto: Mildred Hodson; Komitato: Peggy Ross, Edna Jullie, Gwen Bayliss, Annie Spencer, Karl Guenster, Baden Hodson, Hans Brendel, Eric Whiston; Redaktistoj de Brisbana Bilibado: Gaye Phillips kaj Tom O'Grady; Libroperanto: Edna Jullie; Bibliotekisto: Gwen Bayliss; Kont-Kontrolisto: Harold Buckler.

La Zamenhof-Festo okazis la 4-an de dec. en St. Albans Hall, Wilston. 38 personoj partoprenis. Fulmoŝtormo malfunkciigis la elektrajn lampojn kaj ni festis kandelbrile. Aldone al la kutima manĝaĵo estis speciala memorkuko. Post la festparolado de la prezidanto, kaj tosto al la memoro de D-ro Zamenhof, okazis la distra parto de la vespero. La kantgrupo prezentis kristnaskajn kaj aliajn kantojn; krome la ĉeestantoj ĝuis ŝkeĉon, komunan kantadon kaj danadon.

—Cathy Sullivan kaj Ray Ross

● **TOOWOOMBA:** Je 27/11/76 okazis la Zamenhof-Festo en "Queens Park Kiosk". Dek personoj ĉeestis la abundan vespermanĝon. Poste klasanoj prezentis ŝkeĉon "La leterportisto alvenis". Sekvis poemoj, kantoj kaj prelegetoj pri "Mia preferata bildo" (ĉiu alportis unu).

La lasta monata kunveno okazis je 13/12/76 en la hejmo de nia sekretario, ĉe 10 Violet Street. La jarkunveno okazos en la hejmo de S-ino J. Lehane.

EL LA FEDERACIOJ

● **KVINSLANDO:** La 16-a konferenco okazis en Ipswich 10-11-an de oktobro, 1976. La komforta motelo "Tulmur Park" estis la loĝejo dum la semajnaĵo, sed aliaj anoj vizitis el Brisbano por ĉeesti la kunvenojn, vespermanĝon kaj distraĵojn. Partoprenis 30 anoj; reprezentantoj el Toowoomba, Rockhampton, Brisbane, Sunbrila Marbordo, Ora Marbordo, salutis la konferencan.

La ĉefaj sugestoj estis: (a) ke oni proponu la "Bonan Tagon" kurson al lernejoj en Ipswich dum 1978; (b) ke la oktobra konferenco okazu en Mt. Tambourine — tio permesos, ke la anoj de la nova grupo ĉe Canungra povos facile partopreni. (Sigi Kunze jam aranĝis, ke studgrupo komenciĝos en la apuda armea stablo en 1977.)

Post la vespermanĝo sabate, okazis distra vespero: La brisbana kantgrupo prezentis 4 kantojn. Gaye Phillips legis propran poemon. Ges-roj D. Guy kaj Shonham, kaj Brisbananoj prezentis skeĉojn. Jean Lehane legis rakonton, Winsome Greenhalgh prelegis pri Kalocsay, Trevor Steele pri historio.

Dimanche ni piknikis en la bela "Queen's Park" kaj partoprenis trezorserĉadon, enigmojn k.t.p. La loka ĵurnalo "Bulletin", subtenis la konferencan per sufiĉe granda artikolo kaj fotoj. Radio-Studio 4 IP senkoste reklamis la konferencan. La Plenaĝula Edukado Centro en Ipswich promesis proponi Esperanton kiel studtemon en 1977. Espereble Ipswich posedos grupon poste kaj la Federacio gajnos alian valoran aldonon.

— RAY ROSS

PAGU VIAJN KOTIZOJN

Pluraj membroj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por 1976. Helpu nin daŭrigi nian laboron por Esperanto en Aŭstralio.

Kruco en la suba kvadrato indikas ke vi ŝuldas la kotizon.

Kotizoj: **Individua membro \$10, Peninsula aŭ junula membro \$5.** Via pago estas URĜE bezonata. Anticipe dankas via Kasisto Les Scott, 34 Ocean Street, Manly, 2095.

Kruco indikas nepagintan membron.

21st AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

January 2-8, 1978 — Launceston (Tasmania)

This congress will be held at the brand-new TASMANIAN COLLEGE of ADVANCED EDUCATION and will again be a "Live-in Congress". Ever-rising costs make it impossible to give an exact tariff at this stage, but it is estimated that full board should be appr. \$15 per day. As only limited accommodation is available, Esperantists are advised to book as soon as possible.

Congress fee before 1st July, 1977, \$11. Pensioners, Students, \$6. After 1/7/77; \$13 and \$7.50 respectively. Send your room reservation (**\$10 Deposit**) and Congress Fee to the **Congress Treasurer: Mr. Mac Le Fevre, 22 Belle Vue Ave., Launceston, 7250.** and enclose a stamped, addressed envelope for your receipt. (When paying by cheque, please add 9 cents for bank charges).

Local Congress Committee: Chairman: J. Gibson; Secretary: Mrs. Lynn Carswell; Treasurer Mr. Mac Le Fevre; Mrs. Kay McFarlane (Excursions), Miss Diane Jones (Dramatic Productions); Miss Edith Gibson (Youth Camp), Miss Gina Dell-Amico.

Second List of Congress Members:

16. Mrs. M. Robertson, Sydney.
17. Prof. R. Robertson, Sydney.
18. Mr. P. E. Schwerin, Sydney.
19. Mrs. K. R. Schwerin, Sydney.
20. Brig. I. Gale, Melbourne.
21. Miss Ann Hearn, Melbourne.
22. Mr. Les Scott, Manly.
23. Mrs. E. M. Graham, Manly.
24. Miss Joyce Turner, Rockhampton.

State Distribution: N.S.W. 9; Tasmania 6; Victoria 5; Queensland 4.

LA 42-a NOV-ZELANDA ESPERANTO-KONGRESO

Sep esperantistoj el Aŭstralio partoprenis la 42-an Nov-Zelandan E-Kongreson, kiu okazis inter la 4-a kaj 8-a de januaro en Auckland. La kongresejo estis "Grafton-Hall", studenta loĝejo de la Universitato de Auckland, kie la plimulto de la vizitantoj loĝis kaj manĝis. Aliĝis 97 gesamideanoj, el kiuj 90 fakte partoprenis, inter ili pluraj infanoj de kongresanoj.

Ges-roj Fred kaj Audrey Wood kaj S-ino Miriam Hobbs respondicis pri la multifacetaj preparlaboroj, dum S-ro Cliff Brown kaj S-ino Lucia Bruce (Christchurch) alveturis kun amaso da libroj kaj instalas bonan libro-vendejon. Kongresanoj el la tuta lando, kiuj malofte havas oportunojn vidi E-librojn, aĉetis multajn el ili.

Malfermis la kongreson S-ro Richard Prebble, Deputito de la Nov-Zelanda Parlamento (Labor-Partio). Grava ero de la kongreso estis diskuto pri la loko kaj dato de la 2-a Pacifika Kongreso. La ĉeestantaro esprimis la deziron, ke tiu kongreso okazu en ne-anglalingva lando, sed el la plej taŭga lando — Japanujo — tute ne venis propono. La kongreso vole-nevole akceptis rekomendon, ke la 2-a Pacifika kongreso okazu en San Francisco, en kies Universitato la E-Ligo de Nord-Ameriko estus preta organizi ĝin.

En la kadro de la kongreso okazis kelkaj literaturaj prelegoj. D-ro J. Hamvai (Auckland) prelegis pri "Esperanto kiel faktoro en la moderna vivo", kaj ekstrakto el la romano "La Nekonata Homo" de Gordony, tradukita el la hungara lingvo de D-ro Hamvia. S-ino Fay Koppel (Melbourne) prelegis pri "Nesufiĉe konata verkisto", kiu estas la mortinta L. N. M. Newell Prof-o C. J. Adcock (Wellington) kaj S-ro H. Koppel (Melbourne) deklamis poemojn de du tre kontrastaj aŭtoroj — respektive Julio Baghy kaj Raymond Schwartz. S-ro W. Rolt prelegis pri diversaj projektoj de internacia lingvo. S-ino R. Aagaard (Auckland) montris lumbildojn pri vago tra Eŭropo, inklude renkontiĝojn kun polaj kaj rusaj esperantistoj.

Interesa por ĉiuj, precipe partoprenintoj, estis lumbildparolado de S-ro I. Allan pri la Pacifika Kongreso en Melbourne 1976.

En la Dramo-Konkurso partoprenis 2 kluboj. Gajnis la sildon la Auckland E-Societo, kiu prezentis interesan dramon "La Trezoro". La lastjara gajninto, Christchurch, prezentis teatraĵon "La Rusta Najlo". Eksterkonkurse Ges-roj B. Hodson el Brisbane kune prezentis mallongan skeĉon.

Elektiĝis la jena nova estraro: Prez. S-ro J. T. Allan; Vic-Prez. S-ro E. R. Dearnley; Gen. Sekretario: S-ro D. G.

Raynor; Kasistino: S-ino M. Wansbrough, Inform-Oficisto kaj 2-a Sekretario S-ro D. Rockell, Eduka Oficisto: Prof. C. J. Adcock, ĉiuj el Wellington.

Dum amuzvespero Arturo Cocking el Manly instruis la ĉeestantojn "Kiel esti feliĉa kvankam edzo". La kongreso sukcese finiĝis per luksa bankedo. Tostoj estis proponitaj al la Movado, al la Loka Kongresa Komitato kaj al la eksterlandaj vizitantoj, en kies nomo S-ro H. Koppel dankis. Poste la aŭstraliaj vizitantoj prezentis propran dankanton al la gastigantoj.

Neniu klubo invitis la venontjaran kongreson; tamen, post diskuto, oni proponis esplori la eblecon kongresi en Palmerston North, kies bela Universitato Massey provizus taŭgan kaj dignan kongresejon. —H. KOPPEL.

La Prezidanto de U.E.A. parolas

La pasintaj du-tri jaroj instruis al ni multajn lecionojn. El ili, la plej klara estas la rimarkinda stabileco kaj interna fortoco de la Esperanto-movado. Se necesus ankoraŭ prui tion, oni povus konstati, ke la Internacia Lingvo fariĝas neevitebla kaj ne detruibla fakto de nia epoko. La kulturo kaj socio de Esperanto estas firma elemento en la nuntempa internacia vivo.

Tio estas pli ol klara en la situacio de U.E.A. mem. Tra ĉiuj perturboj de la jus pasintaj jaroj, tra ĉiuj krizoj financaj kaj organizaj, U.E.A. tenis la flagon alta kaj laboris diligente por konservi malnovajn gajnojn kaj prepari la grundon por novaj.

La jaro 1977 portos nin al punkto nur dek jarojn for de la unua jarcento de la Internacia Lingvo. Ĉu tiu dekjara periodo kondukos nin al la sojlo de sukcesigo de la heredaĵo de Zamenhof? Tio dependas grandparte de nia kapablo je saĝaco, sindediĉo kaj efika laboro. (Eltiraĵo el "Esperanto", jan. 1977)

La teatraĵon de juna aŭtoro ege mall-aŭdis gazeta kritikisto. La juna aŭtoro kolere eniris la redakcejon por ataki la kritikiston. "Kiel vi kuraĝis diri opinion pri mia verko?" li diris, "Vi ja verkis nenian teatraĵon ĝis nun."

"Nu, kaj kio do? Ankaŭ ovon mi ankoraŭ ne metis, tamen pri omleto mi scias pli bone diri mian opinion ol la kokino".

NEWS - DIGEST

UP, UP, AND AWAY! The Esperanto hot-air balloon made its maiden flight from the Swiss mountain village of Grueningen on Saturday, December 18th 1976 under the command of Esperantist Bruno Rohr. The balloon bore civil aviation markings HB-BEO and lifted off into the wide blue yonder carrying Rohr, Fritz and Hanni Liechti (President and wife of the Zurich Esperanto Society) and 2,500 philatelic first day covers celebrating the flight.

For the technically-minded, HB-BEO has a volume of 1,600 cub.m.; a height of 18 m; and a diameter of 15 m when fully inflated. Made in the U.S.A., it is constructed out of fire-resistant nylon/polyurethane fabric (natch!) A few of the first day covers are still available.

HAMS WITH BEANS: A group of amateur radio operators in Modelling, Columbia have demonstrated their "get up and go" by starting an Esperanto course for their fellow "hams". They have also founded an Esperanto Club of the Air.

SPORTS TALK: Following the Montreal Olympics, the Universal Esperanto Association has decided that the world of sport provides a fruitful ground for spreading the international language. So much so that the UEA Sports Commissioner has been appointed. Coordinating the effort will be an Italian Esperantist, Dr. Gianfranco Polerani.

MUSICAL NOTE: Dr. Miodrag Stojanovic spoke in Esperanto during the International Summer University held during the Athens Congress about Greek folk songs in Serbian translation.

INDIAN ACTIVIST: An honorary member of UEA, Mrs. M. Haudebine, has been teaching Esperanto in the Indian sub-continent for over fifteen years. Mrs. Haudebine recently took part in the inauguration of the Esperanto Club of Indore. Twenty-one Indian Esperantists comprise the Indore Club.

CANUNGRA COURSE: Soldiers in the Australian Regular Army who are

stationed at the Canungra base in Queensland will shortly begin learning the international language. A local Esperantist, Sigge Kunze, was successful in obtaining official acceptance for the course. Sigge and Ray Ross of the Brisbane Esperanto Society spoke to the soldiers in December and about twenty have expressed the intention to take part.

INTERNATIONAL STUDIES: The respected U.S. Association for International Studies will direct its attention next March to the world language problem at a Conference to be held in St. Louis, Missouri. Dr. Jonathan Pool, a UEA Committeeman and the acting Director of C.E.D. will chair the session: "Language barriers as a world political institution: Who communicates what? When? How?" Several other well-known academic Esperantists will assist Dr. Pool with the discussion.

CHINESE ESPERANTISTS: The Netherlands Esperantist, E. J. Woessink has just returned from a visit to the Chinese mainland. On his report, 43 Chinese are professionally employed in Esperanto broadcasting and publishing within the People's Republic.

ESPERANTO WINS: A group of young French Esperantists actors and actresses won a prize at the National Young People's Drama Competition at Versailles. The competition is held annually at the Montansier Theatre, and the young Esperantists presented a translation of "Andromako" by Jean Racine to take out the prize.

SOCIALISING: Representatives of East European Esperanto organisations met for six days in Moscow last December. It was their ninth such get-together and the representatives from Bulgaria, East Germany, Czechoslovakia, Hungary, Poland, and the Soviet Union itself discussed common tasks for Esperantists and celebrated the 60th Anniversary of the Great October Socialist Revolution.

CHEMISTS REFORM: The Chemistry Section of the International Scientific Esperanto Association (ISAE) is being reformed.

CREDITS: Thanks this time to Pilo Press, IEMW, UEA, and La Voĉo. Contributions for this department are welcomed.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Kasisto: S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 153 (233)

MELBOURNE

Marto 1977

ESPERANTO KIEL FAKTORO EN LA MODERNA VIVO

Mi konfesas, ke mia titolo "Esperanto kiel faktoro en la moderna vivo" estas iom pretendema. Car tiu ĉi temo estas tiel larĝa, ke simple neblas pritrakti ĝin en kadro de mallonga eseo. Tial ni, kompreneble, nur tuŝas tiun ĉi temon de du flankoj de la vivo.

Ni ĝenerale akceptas, ke la vivo konsistas el koscia interlekto, la **spirito**, kaj el ties kontraŭaĵo, la **materio**. Ilian kuman, komunan agadon, senĉesan aktivadon ni nomas **vivo**.

Ankaŭ Esperanto vivas kaj efikas sur ambaŭ terenoj, sur la spirita kaj sur la materia. Ĝi estas la rezulto de la genia spirito de Zamenhof.

Ne necesas nun prezenti kion kaj kiom kreis li krom la lingvo kaj per la lingvo, ni ja ĉiuj bone scias tion. La Verkaro de Zamenhof parolas pri tiuj ĉiuj.

Kompreneble, dum la zamenhofaj tempoj Esperanto efikis pleje aŭ preskaŭ nur, sur la spirita tereno de la vivo. Ĝi devis kreski, disvastiĝi kaj pruvi, ke ĝi estas taŭga ilo por la interkomunikado de la nacioj. Kaj tial ĝi evoluigis en la unua periodo grande en la noblaj sferoj de la literaturo: poezio kaj beletro. Aperis unu post la alia talentaj disĉiploj kiel Grabovski, Kabe, Beaufront, Coutouras, kaj almenaŭ dekduo da eminentaj diversnaciaj poetoj kaj aŭtoroj.

Post la unua mondmilito aperis en la Esperanto-literaturo du grandaj talentoj en Hungarujo: Kalocsay kaj Baghy: Ni

ne deziras ĉi tie doni literaturan prezentadon, nur menciĝi, tiujn ĉi du, sed kiel elstara kometo post Zamenhof, sur la ĉielo de Esperanto estas Kalocsay.

Ni trankvile kaj firme povas aserti, ke la tuta, nun jam impona kaj belega konstruaĵo de Esperanto ripozas sur la du plej potencaj kolonoj: Zamenhof kaj post li Kalocsay!! Ili ambaŭ konstruis ĉefe la spiritan flankon de unu el la geniaj eltrovaĵoj de la homaro. Kion Zamenhof kreis, tion Kalocsay evoluigis, poluris kaj pliperfektigis, ĝis mirinda grado. La tutmonda esperantistaro funebris lian forpason pasintjare.

Kiel ni jam menciis, spirito kaj materio kune laboras. Post la bonegaj rezultoj en la mondo de l' spirito Esperanto ekenpenetris ankaŭ la materian mondon. La internacia komerco kaj industrio komencis apliki la Internacian Lingvon pleje ĉe reklamado-propagando kaj komerca korespondado. Bedaŭrinde, tiuj ĉi klopodoj eĉ ĝis nun restis ĉefparte nur eksperimentoj, sed ni, adeptoj de la lingvo, estas kaj devas esti dankaj, precipe al tiuj kelkaj mondkonataj entreprenoj kiuj sisteme aplikas ĝin konstante, ne rigardante la momentan materian gajnon pere de ĝi, sed konvinkite, ke ĝi estas a lingvo de la proksima futuro por la praktika, moderna, materia mondo.

Esperanto jam tre bele penetris en la mediojn de la literaturo, edukado kaj komerco, sed ne tiom ankoraŭ en la plej

gravan, praktikan sciencan, kiu regas la modernan vivon: en la 'tekniko.

Sandor Szatmary la eminenta Esperanto-verkisto, kiu forpasis antaŭ du jaroj, estis ankaŭ eminenta maŝinigeniero, kiu forte pledis por "Esperanto kiel lingvo de la moderna tekniko". En sia samtitola eseo li diras, ke jam estas la lingvo de la proksima futuro por teknika vortaro — oficiala —. Komencaj provoj jam ekzistas, sed la tereno tiel vastas, ke ankoraŭ multego estas farenda. La malgrandaj nacioj, se ili volas sampaŝe progresi kun la gvidaj, grandaj, ili devas (devus) uzi la anglajn, francajn, germanajn, rusajn fakvortarojn, kaj tio enorme malhelpas iliajn klopodojn.

Precipe la angla lingvo abundas je homonimoj. El inter la miloj li donas unu ekzemplon: La angla vorto "peg" havas 25 signifojn: najlo, stifto, tenono, ŝtopilo, paliso, kordostreĉilo, signalstango, mineja apogtrabo, navedo, proteza kruro, preteksto, vesthoko, eskala ŝtupo, piedo de violonĉelo, glaseto da brando.

Kompreneble, alilingvaj teknikistoj fariĝas tute konfuzitaj antaŭ tia riĉeco de unu lingvo. Sed ili volas kaj devas studi kaj vidi la progreson ankaŭ de aliaj grandaj nacioj, sed simple neeble!

Por la botaniko kaj zoologio ekzistas unueca, preciza, nemiskomprenebla latina nomenklaturado. Kial ĝi ne ekzistas por la tekniko, kiu hodiaŭ estas la plej grava inter ĉiuj sciencoj? Kaj vere tiu ne ekzistas, sed kial? Ĉar ankaŭ dum la romia imperio vivis la samaj vegetaĵoj kaj bestoj, kiuj hodiaŭ. Vivis hundo, ĉevalo, leono, lupo, elefanto; vivis rozo, dianto, akacio kaj kverko, sed ne estis televido, filmo, ferbetono, altensio, elektra kondensatoro, dizel-lokomotivo, elektra amplifilo. Do: Por botaniko kaj zoologio tre taŭgas la "staranta" latina lingvo, sed ne por la ĉiam progresanta tekniko.

Cu iu volas aŭ ne volas akcepti, la fakto estas, ke hodiaŭ la plej ampleksa kaj grava scienco, kiu fundamente influas kaj determinas la modernan vivon, estas la tekniko. Sed la evoluon de la tekniko forte malhelpas la malstrikteco de la terminoj kaj precipe la manko de strikta, internacia terminaro.

Por tiu ĉi celo ne taŭgas la antikvaj, arkaikaj lingvoj, sed des pli kaj unusole taŭgas Esperanto, la plej juna, pleje progresiĝebla lingvo. Nia lingvo estas la plej fleksebla. Esperanto havas nur 29 finaĵojn, sed per tiuj 29 finaĵoj ĝi povas esprimi multe pli da nuancoj, ol la franca, kiu havas multegajn.

La plej grava argumento de la Esperanto-nekonantoj estas, ke ĝi estas artefarita lingvo, kvankam jam pasintjarcente kelkaj anglaj kaj germanaj lingvosciencistoj, inter ili ankaŭ Karl Marx, pruvis, ke ankaŭ la naciaj lingvoj ne estas naturaj lingvoj, sed rezultoj de tre multflankaj kaj multspecaj influoj. Ni ja bone scias, ke la fundamento de la angla lingvo konsistas el normaj, keltaj, gotaj, germanaj, grekaj kaj latinaj elementoj, respektive el ties kunfandadoj. Kaj pli-malpli simile estas kun ĉiuj naciaj lingvoj.

Cu la artefariteco estas kondamninda, tion tre trafe ilustras tiu ĉi anekdoto: Azeno rigardas aŭtomobilon kaj diras: —Jes, ĝi estas pli komforta ol mia dorso. Ĝi estas vere pli rapida ol miaj piedoj, sed ĝi estas bedaŭrinde artefarita!

Sed ne nur la angla lingvo havas multajn homonimojn, ankaŭ la hungara kaj aliaj. Por ekzemplo el la hungara lingvo nur unu vorto: "ved". Tiu signifas defendi, ŝirmi, pledi kaj protekti. En Esperanto troviĝas apartaj vortoj por ĉiuj kvar signifoj. Kaj tamen Esperanto havas la plej malmultajn vortojn. Kiel povas ekzisti tiu ŝajna kontraŭdiro? Pro la artefariteco! Ne nur la malriĉa hungara lingvo, sed ankaŭ la angla lingvo per sia miliono da vortoj ne povas tiom da nuancoj esprimi, kiom Esperanto per ĉirkaŭ dekmil vortoj. La naciaj lingvoj jam ne povas evolui kune kun la rapidega evoluo de la tekniko.

Ni povas jam fieri, ke nun kelkaj — eĉ el la plej grandaj kaj eminentaj fabrikaj kaj komercentreprenejoj de la mondo jam deŝtariĝis aplikas Esperanton en sia reklamado kaj negoco. Ili estas certe ekzemplo por la tuta mondo.

Resumante: 1-e La teknika evoluo ege bezonas sciencan lingvon kaj por tiu celo taŭgas nur Esperanto. 2-e Por tiu celo nia tasko estas ne nur propagandi, sed ankaŭ plitaŭgigi nian lingvon, por ke ĝi sencare povu esprimi ĉiujn teknikajn konceptojn. La oficialigo de Esperanto estas tre malfacila. Ni multe devos ankoraŭ batali kontraŭ miopaj naciaj jaluzemoj. Sed la tekniko jam ege bezonas nian lingvon. Tiu ĉi estas la plej aktuala, kaj tial la plej facila vojo, per kiu ni povas enpenetri en la komunan vivon, kaj se tio ĉi realiĝos, la ceteraj paŝoj jam ne estas prokrastebaj.

—D-ro Janos Hamvai.

(Prelego farita dum la 42-a Nov-Zelanda E-Kongreso, Auckland, jan. 1977)

KUN TREVOR STEELE AL BRAZILO

Komence de februaro Trevor Steele (Brisbane), kun sia edzino Edith, forlasis Aŭstralion por fari volontulan laboron dum 1-2 jaroj en la esperantista kolonio "Bona Espero" en Brazilo. Li promesis skribi por ni serion da artikoloj pri siaj aventuroj.

La 15-an de februaro Ges-roj Steele alvenis en la brazila ĉefurbo Brasilia kaj de tie Trevor sendis sian unuan raporton:

IMPRESOJ SURVOJE

Sidnejo: Ni adiaŭas Robby kaj Margaret Robertson, la lastajn konatajn vizaĝojn. Marŝinte tra la faŭkjo de la sidneja flughaveno, ni trovas nin en la Lufthansa-kavernego, kiu glutas centojn da homoj. Tiu giganta birdo etendas siajn flugilojn horizonten. Pupaspektaj stevardinoj bonvenigas per plastaj ride-toj. Paŭzo. Tintoj. Dulingvaj avertoj, ke la flugo ekas. Nun nia birdego fariĝas kolera prabesto, kuras, muĝas, kuregas, muĝegas ĝis plena frenezigo, subite suprensaltas . . . kaj estas denove nia senbrua, glita maŝinbirdo.

Flugi kiel birdo, jen prarevo de la homoj. Kia rava aventuro ŝvebi, gliti, plonĝi senpeze tra la aero, vidi desupre la liliputajn verkojn de aliaj homoj. Jes, ankoraŭ estas ravaj momentoj: ni drivas tra brile blankaj nubamasoj en groteskaj formigoj, ni ekvidas riveron serpentumantan al la maro. Sed oni senigis la flugon je preskaŭ ĉia raviĝo: eĉ en la momento de la ekstaza soro la profesie ridetantaj stevardinoj gestas kaj mimas, dum metaleca voĉo parolas pri oksigeno, savojakoj, elirejoj, alvenhoroj, veterkondiĉoj, kaj fine babilas pri "agraba flugo kun nia kompanio". Kvazaŭ ĉi tiu miraklo, ke ni senflugiluloj saĝas trans la mondon, estas ĉiutaga rutino . . . kio ĝi ja ankaŭ estas.

Venas la penso, ke eble la flugo povus fariĝi vera "aventuro" kaj nia birdo estus nia komuna ĉerkego . . . la statistiko konsolas, ke kraŝo okazas nur unu fojon el . . . kiom? Nu, espereble ni ne aldoniĝos al tiuj "unuĵ". Tuj ankaŭ tiu penso perdiĝas: la rutino venkis kaj la aventuron kaj la danĝeron.

Germanio: Komence la subnula aero gratas niajn sunbrunigitajn vizaĝojn, sed iom post iom ni alkutimiĝas al nebulo kaj neĝo, kiuj ĉiukaze malaperas la trian tagon. Printempo meze en vintro.

Sendube la homoj ĉi tie vivas en abundo. Ni ne volas juĝi, ĉu ili estas feliĉaj, sed plejparte ili mienas serioze. La pejzaĝo tamen perdas sian belecon. La maro el domoj kaj fabrikoj jetas ĉiam novajn ondojn, kiuj forvoras la montetojn kaj inundas la valojn, detruante la tradicion harmonion inter la naturo kaj la homaj konstruaĵoj.

Kaj ĉie la angla lingvo. Multaj jam akceptis ĝin kiel la internacian lingvon. Tio indas pluan diskuton. Ni notu nur, ke la foja laŭmoda snobismo ligita al uzo de la angla estas profitata de la saĝaj entreprenistoj. Vidu la sennombrajn "Sex shops", laŭ niaj suprajaj observoj frekventataj nur de malĝajaj mezaĝuloj, solenaj kvazaŭ en preĝejo (kie estas la ĝoja liberiĝo de seksaj tabuoj?). Se anstataŭ la iel elanhavan vorton "Sex shops" oni uzus honestan germanan esprimon "Geschlechtslaeden" (seks-vendejoj), ĉu la snobisma pseŭdo-aŭreolo ne malaperus?

Ĝis revido, Germanio. Kia futuro atendas vin?

Rio de Janeiro (la loka prononco: janeiro):

La Karnavalo alproksimiĝas. Jam ĉe la flughaveno oni avertas nin, ke la solaj hotelĉambroj ankoraŭ lueblaj estas tiaj, kiajn oni luas dum unu horo. Eĉ se ni bonŝance trovas liberan ĉambron, ni devus elekti aŭ hotelaĉon en Rio mem aŭ luksan turisman palacon en Copacabana, kies riĉulaj nubskrapuloj kovras la iam belan strandon per siaj ombroj. Ni elektas flugi tuj al Brasilia, tiu superrealisma kreaĵo meze en la senlima savano. Nun komenciĝas nova ĉapitro.



● **PERTH:** Kunvenoj de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio ankoraŭ okazas la duan kaj la kvaran merkredojn ĉiumonate ĉe la Instruista Kolegio, Netherlands. Dum la pasintaj du kunvenoj la plejparto de la tempo okupiĝis en diskutado pri du gravaj projektoj — la organizo de aŝiŝo-konkurso kaj la preĝigo de Esperanto-kurso disvastigota per Radio-stacio 6NR.

La Ligo invitas lernejanajn partopreni konkurson por la desegno de aŝiŝo por propagandi Esperanton kaj ofertas

plurajn premiojn de \$5.00 ĝis \$50.00.

La radio-kurso baziĝas sur la kurso "Jen Nia Mondo" (de "Group Five", Anglujo), el kiu ĉiu leciono daŭras kvaronhoron. Entute duonhora estas havebla por la radio-elsendaĵo kaj ni vclas profiti de la ekstra kvaronhora. Tial ni multe ŝuldas al S-ino Payne kaj ŝiaj helpantoj kiuj laboras intense tiurilate. Estas atendite ke la kurso ekfrapas la radio-ondaĵon la venontan majon.

Ŝajne la daŭrigo de la klaso ĉe "Murdoch" Universitato estas necerta pro la manko de studentoj spite de la tempopostulada penado de S-ino McGrath kaj kelkaj Liganoj.

— W. H. H.

● **SYDNEY:** Wre Chandler, 7/2, raportis pri la Somerlernejo en Toowoomba. Ĉeestis 19 studentoj kaj 3 instruistoj, kiuj kunlaboris 5½ horojn tage, tre feliĉa okazo.

La Ĵarkunveno okazis 14/2; ĉeestis malmultaj por diskuti aspektojn de la pasintjara kunveno, kun aferoj ekde tiam. Elektigis la jena nova estraro: Prez: Tom Elliott; Vic-Prez: David Gould, Wre Chandler; Sekretariino: Margaret Chaldecott; Kasisto: David Gould; Bibliotekisto Elsie Curry; AEA-raportisto: Margaret Chaldecott; Kas-kontrolo: Tom Perry, Victor Bourlin.

Ronddiskuto je 21/2, "Kiel malhelpi trafikakcidentojn", inkludis, i.a., jenajn sugestojn: nuligon de asekuro post grava akcidento, por ke kulpulo mem respond-ecu pri la kosto; kontroladon de rapideco; malpermeson, ke drinkinto veturigu. Shirley Fanos, 27/2, daŭrigis sian paroladon, kun lumbildoj, pri sia vojaĝo en Eŭropo, de golfeto Anzac tra Ateno, Skopje, Dubrovnik, Vieno, Munheno, Brugge kaj Bruselo, kaj poste tra Hispanujo Portugalujo kaj Francujo. Ni vidis belajn lokojn, kaj mond-famajn kaj apenaŭ konatajn. Plej bela estis la vilaĝo Mija en Hispanujo.

Wre Chandler, 7/3, parolis pri 2 aŭtoroj kun la nomo Chandler. Joel Chandler Harris verkis la libretojn pri Uncle Remus. Thomas Chandler Haliburton verkis la historietojn pri "Sam Slick de Slickville". Wre menciis ankaŭ Leslie Gordon Chandler, la unuan viron, kiu metis ringojn sur birdkrurojn por kontroli iliajn vojaĝojn.

Tom Elliott, 14/3, eksplikis preskaŭ frenezigajn aspektojn de sia laboro, kiel komputero — oni povas 'programi' bil- unu el la nekonataj flankoj de uzo de komputero — oni povas 'programi' bil- dojn, ekzemple de belulinoj.

—Margaret Chaldecott.

● **MELBOURNE:** Kvankam la Melburna E-Societo elspezis preskaŭ cent dolarojn por 3 grandaj kaj 6 malgrandaj anoncoj en la plej granda ĵurnalo "The Age", la rezulto estis tre malesperiga. Proksimume dekduo da interesatoj tele- fone demandis pri Esperanto, sed neniu el ili venis por partopreni novan kurson. Nuntempe Pastro Midgley kaj S-ro H. Beechey instruas unusolan sinjorinon. Aliflanke, la studgrupo por progresintoj, sub S-ino Fay Koppel, estas iom pli bone frekventata.

Grupkunvojaj komenciĝis je la 10-a kaj 17-a de januaro, kiam Ges-roj Koppel raportis pri siaj vojaĝo tra Nov- Zelando kaj partopreno en la Nov- Zelande E-Kongreso en Auckland. Ĉe la amuzvespero de la 24/1, S-ro Ken Linton montris diapozitivajn kaj parolis pri Ateno kaj la Kongresa krosado inter la grekaj insuloj en la Egea Maro.

Klubanoj kontribuis, 7/2, al interesa progamo pri siaj ferioj kaj je 14/2 S-ro H. Koppel prezentis "Novajojn el Esper- antujo".

La Generala Kunveno okazis je 21/2. Laŭ la raporto de la sekretario la societo havis en 1976 kvardek membrojn, kiuj konsistis el 24 malnovaj anoj kaj 16 kursanoj. (Lastjare estis 26 malnovaj anoj kaj 3 kursanoj). Elektigis la jena nova estraro: Prez: S-ro S. Kanaĉki; Vic-Prez: S-roj J. Midgley kaj H. Beechey; Sekr: S-ro H. Koppel; Kasisto: Brig. J. Munro; Bibliotekisto: S-ino F. Koppel; Konsilanto: S-ro K. Linton.

Post vigla diskuto la kunveno decidis altigi la membrotizon de \$5 al \$7 kaj por pensiuloj de \$2.50 al \$3.50.

Okaze de la amuzvespero de 28/2, S-ro K. Linton montris lumbildojn pri plujaj insuloj en la Egea Maro kaj pri granda muzeo en Ateno.

● **MANLY:** La jara ĉefkunveno okazis la 28-an de januaro en la hejmo de S-ino Ruth Carruthers; 21 membroj ĉeestis. Laŭ raporto de la sekretario la klubo havis 32 membrojn. Nur malgranda klaso ekzistis dum la pasinta jaro ĉar pluraj membroj estis transmare. Laŭ la kasista raporto estis defcito de \$11.46.

Elektigis la jena estaro: Patrono; D-ro K. Smith; Prez: S-ro A. Cocking. Vic-Prez: Prof. R. Robertson, Skabeno F. Preacher; Sekretario: S-ino B. Clem- inson; Kasisto: S-ro M. Ross; Libro- Servo: S-ino K. Morrison.

"Malferma Domo": Ĉiuj membroj kaj amikoj estas bonvenaj je ĉiu tria dim- anĉo en la monato en la hejmo de S-ino Ruth Carruthers, 66 Wanganella St., Balgowlah.

Dum 1976 S-ro George Thatcher instruis Esperanton ĉe la Metodista Asocio en Sidnejo. Pro la granda sukceso okazos 2 kursoj ĉi-jare: George instruos klason por progresinto kaj Arthur Cocking instruos klacon de 16 komencantoj.

— Edna Giles.

● **CANBERRA:** La arĝent-jubilea ĉefkunveno okazis la 1-an de marto en la hejmo de S-ro Noel Gamble (8 La Perouse St., Manuka) Inter aliaj aferoj ni diskutis metodojn kiamaniere helpi Esperanto-klasojn en lokaj lernejoj, ekzemple per provizo de libroj, gazetoj aŭ sonbendoj. F-ino Brigitte Esguera, kiu instruas E-klason en la Melba Altlernejo (pli ol 20 lernantoj), diris ke ŝi ankoraŭ ne konstatis kion la klaso plej bezonas. Fine ĉiuj samopiniis, ke oni devas unue konsulti la Asocion de Gepatroj kaj Civitanoj en la koncernaj lernejoj por aranĝi praktikajn helpoplanojn.

Ĉefaj eventoj dum 1976 estis vizitoj de Mal kaj Val Robinson (Brisbane), de Prof. Ralph Lewin (Usono), kiu instigis nin komenci aŭstralian glosaron, de Prof. Robby Robertson kaj edzino, kaj gaja Zamenhof-Festo ĉe Harry kaj Irene Bluhm. Ni ankaŭ ricevis interesajn leterojn de parlamentano John Haslem, kiu esploras le eblecon akiri por ni kunvenejon en lernejo.

Elektiĝis la jena estraro: Prez: S-ino Barbara Amies; Vic-Prez: Jim Davidson; Sekretario: Ross Hyland; Kasisto: Sam Ellyard; Bibliotekistino: S-ino Mary Ellyard; Publicisto: Noel Gamble; Kas-kontrolisto: Colin Johns, al kiu ni gratulis, ĉar li plenumis tiun taskon dum 25 jaroj. Ĉiuj ĉeestantoj subskribis la Oran J. bron. donacitan antaŭ multaj jaroj de S-ro Herbert Koppel (Melburno).

— Noel Gamble.

● **BRISBANE:** Je 29/1/77 okazis rost-festo ĉe la hejmo de Edna Jullie por adiaŭi Trevor kaj Edith Steele, kiuj flugis al Brazilo por labori volontule dum almenaŭ unu jaro en la esperantista kolonio "Bona Espero".

La 21-22-an de feb. la societo partoprenis la 3-an "Orientigan Semajnon" ĉe Universitato Griffith. Membroj distribuis flugfoliojn kaj respondis al demandoj pri Esperanto.

● **ST. LUCIA:** Nova estraro elektiĝis: Prez: S-ino M. Jones; Vic-Prez: D. Deqn; Sekr: S-ino D. Shonhan; Kasisto/Libro-Peranto: S-ino W. Greenhalgh; Komitato: J. Coulter, V. Cislowski, A. Spencer.

Adreso de nia klubo: 39 Ryans Road, St. Lucia, 4067.

● **CANUNGRA** (Q'ld) Nova klubo fondiĝis en la armea stablo en Canungra. Ĉiun mardon dek kvar studentoj kunvenas en la edukada centro por studi Esperanton sub la gvidado de Sigge Kunze.

● **TOOWOOMBA:** La Jarkunveno okazis je 8/2 en a hejmo de S-ino J. Lehane. Elektiĝis nova estraro: Prez: S-ino J. Lehane; Vic-Prez: F-ino M. O'Mara, S-ino J. Carney; Sekretario: F-ino M. O'Mara; Kasisto: F-ino G. Morgan. Problemoj okazos ĉar kaj la prezidanto kaj la sekretario forestos kelkajn monatojn, sed tiuj estos solvendaj tiutempe.

Siajn problemojn ĉi-jare havas ankaŭ la Plenaĝa Eduka Centro: la studkurso ĉe la Centro ne povis komenciĝi. Do, F-ino K. Evans afable disponigis sian hejmon al la Societo por la klasoj, kiuj komenciĝis la 2-an de februaro ĉe 37 Geoffrey St., kelkaj lernantoj ĉeestas ankaŭ sabaton posttagmeze ĉe la hejmo de la prezidantino. Krome, sep lokaj lernejoj komencis instrui inter 5 ĝis 130 el siaj lernantoj pri Esperanto per la kurso "Bonan Tagon", kiun pli frue kelkaj Rockhamptonaj lernejoj uzis.

13/2/77: Reprezentantoj S-ino Lehane kaj F-ino O'Mara ĉeestas en Brisbane la jarkunvenon de la E-Federacio de Kvinlando.

—Jean Lehane.

Notu ke la adreso de la sekretario nun estas: F-ino M. O'Mara, 218 South Street, Toowoomba, 4350.

PAGU VIAJN KOTIZOJN

Pluraj membroj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por 1976. Helpu nin daŭrigi nian laboron por Esperanto en Aŭstralio.

Kruco en la suba kvadrato indikas ke vi ŝuldas la kotizon.

Kotizoj: **Individua membro \$10, Pensiuila aŭ junula membro \$5.** Via pago estas URGE bezonata. Anticipe dankas via Kasisto Les Scott, 34 Ocean Street, Manly, 2095.

Kruco indikas nepagintan membron.

HENK SCHEPERS, 1913-1976

Nia respektata kaj admirata amiko en la Esperanto-movado, Henk Schepers, mortis subite, pro koratako, en sia hejmo en Won Wron, Gippsland, Viktorio, la 20-an de decembro 1976.

Li naskiĝis 11/8/1913 en Germanujo de nederlandaj gepatroj, kiuj reiris al Nederlando en 1915. Tie Henk vizitis teknikan lernejon en Almedo kaj fariĝis ĉarpentisto.

En 1933 li rifuzis servon en la nederlanda armeo kaj estis enkarcerigita dum 5 monatoj, sed dum tiu tempo li konatiĝis kun Esperanto, ekde kiam li estis aktiva esperantisto, entuziasma pri la lingvo, sed precipe pri ĝia Interna Ideo de universala frateco kaj paco.

Pere de Esperanto li konatiĝis kun sia posta edzino. Ili geedziĝis en 1949 kaj decidis elmigri al Aŭstralio, sed estis nur en 1952 ke ili povis efektiviĝi sian deziron. Unue ili loĝis en la farm-regionoj ĉirkaŭ Nhili kaj Koo-wee-rup (Viktorio), ĝis ili ekloĝis en propra malgranda farmbieno 16-hektara, apud urbeto Won Wron en Viktorio. Tie Ges-roj Schepers komencis propran malgrandan E-grupon, instruante membrojn de 3 aliaj familioj, sed samtempe forte subtenante la E-Klubon de Morwell, 60 kilometrojn for de Won Wron.

Henk estis membro de S.A.T. dum pluraj jarcj ĝis sia morto kaj partoprenis la SAT-Kongreson en Amsterdamo en 1948.

Ni en Morwell forte sentos la mankon de nia mortinta amiko. Nia simpatio iras al la edzino S-ino Ada Schepers kaj al liaj 2 filoj kaj 2 filinoj.

Post funebra solenajo en Yarram, 23/12/76, la funebrantaro translokiĝis al la kremaciejo en Springvale (Melburno) por fina cermonio.

—I. T. Maddern.

“KIEL REAKTIVIGI NE PLU AKTIVAJN ESPERANTISTOJN”

Jen la titolo de **Eseo-Konkurso**, kies premio estas senkosta flugbileto de Melburno al Launceston kaj revene, por partopreni la 21-an Aŭstralian E-Kongreson.

En ĉiuj Esperanto-Kluboj kaj dum kongresoj, esperantistoj cerbumiĝas kiel gajni novajn adeptojn, dum oni tute neglektas malnovajn esperantistojn, kiuj pro diversaj kialoj ne plu estas aktivaj.

La kuratoroj de la J. G. Pyke Memoriala Fonduso deziras aŭdi pri viaj ideoj kaj la praktika solvo de la multjara problemo. Sendu vian eseon, almenaŭ milvortan, ĝis la 15-a de oktobro 1977 al la adreso **“ESPERANTO”, Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.**

21st AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-8, 1978 — Launceston, Tas.

Mail your Congress Fee (\$11 Pensioners, Students, \$6) to the **Congress Treasurer, Mr. Mac Le Fevre, 22 Belle Vue Ave., Launceston, 7250** Add \$10 for Room Deposit and enclose a stamped, addressed envelope for your receipt.

Third List of Congress Members:

25. Mr. R. Reed, Melbourne.
26. Mrs. E. Reed, Melbourne.
27. Dr. A. Einihovici, Perth, W.A.
28. Mrs. I. Einihovici, Perth, W.A.
29. Miss H. Mueller, Sydney.
30. Miss E. Gibson, Launceston.
31. Mr. K. Kerr, Launceston.

State Distribution: N.S.W. 10; Tasmania, 8; Victoria, 7; Queensland, 4; Western Australia, 2.

Kiam mi postenis en Afriko dum la Dua Mondmilito, kunulo suferis pro denta absceso. Post semajnoj da sufero li fine povis perdi la ĝenantan denton ĉe nia nova provizora hospitalo. Kiam mi demandis, ĉu la eltiro estis dolora, li respondis: “Jes, doloris, sed kompensis la doloron aŭdi oficiron diri: “Malfermu la buŝon!”

RECENZOJ

LA SENLINGVULO de Vladimir Korolenko. Tr. Maria Sidlovskaja. Eld. Dansk Esperanto-Forlag. Prezo \$4.15 A.E.A. Libroservo.

Jen libro, kiun mi jam de longe volis legi sed ĝi ne estis havebla. Nun dank' al la entreprenemo de Dansk Esperanto-Forlag ĝi estas unu el serio de valoraj verkoj, kiuj lastatempe aperis en nova eldono.

La aŭtoro, V. Korolenko, estis homo de granda kompatemo kaj simpatio por malfeliĉaj homoj. En "La Senlingvulo" li trafe prezentas al ni la timojn kaj miskomprenojn de enmigrinto en lando, kies lingvon li ne komprenas. Fakte temas pri Ruso en Usono, verŝajne en la fruaj jaroj de la nuna jarcento, sed leginte ĝin ni des pli bone komprenas la aktualajn problemojn de la "senlingvaj" migrintoj en nian landon.

Mateo kaj lia amiko Dima trovas provizoran hejmon en Brooklyn, ĉe judo el la hejma regiono. Dima emas rapide, eĉ tro rapide asimiliĝi en la vivon de la nova lando sed tiaj kompromisoj estas por Mateo tro malfacilaj. Vojperdiĝinte en Novjorko li spertas diversajn aventurojn, maltrankviligajn, komikajn, eĉ harstarigajn — kaj ĉiam plagas lin la lingva problemo. Fine, kun la helpo de samlandano li ekhejmiĝas en la nova lando.

La traduko fare de Maria Sidlovskaja (unua eldono 1922) estas klasike simpla kaj bela.

ĈU VI KUIRAS ĈINE? de Johan Valano. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag A.E.A. Libroservo \$5.00

Efektive ne temas pri kuirlibro, sed pri detektivromano originale verkita en Esperanto.

Jam sur la unua paĝo la aŭtoro prezentas al ni la tre simpatian detektivon-heroon Jano Karal. Elstare bela junulo estas venenita. Bunta kolekto da suspektitoj (ĉefe anoj de la kurso pri cina kuirarto al kiu la murdinto partoprenis) sin prezentas sur la sekvantaj paĝoj kaj donas al ni okazon dividi kun la detektivo la taskon trovi la murdinton. Mi konfesas, ke mi ne sukcesis diveni la solvon, sed feliĉe la detektivo kun la helpo de sia edzino kaj ties nevo sukcesas tion fari.

La libro estas interesa ankaŭ lingve. La aŭtoro (Laŭ informo sur la kovrilo)

estas esperantisto jam de la infanaj jaroj. Certe li manipulas la lingvon aplombe, eĉ kuraĝinte enkonduki "dialekton". Lia nomo "Johan Valano" ŝajnas pseŭdonimo — iom ofta fenomeno en la esperanta literaturo. Jen kelkaj interesaj esprimoj:

ŝi pantoflis kuirejen

banala torsotrikaĵo

salikaj branĉoj desupris ĝis la akvo ni estis samlitaj

restu ĉee

La uzado de "skandali" kun la signifo "fari bruon" ŝajnas ne konsilinda.

Entute tre bona distra legaĵo.

—R. McGrath.

POR VIA AMUZO

Studento: Bonvolu doni al mi revenbileton.

Bibletvendisto: Kien?

Studento: Ĉi tien, kompreneble!

Instruisto: Se unu homo povas konstrui domon en dek tagoj, dek homoj povas konstrui la saman domon en unu tago.

Inteligenta Studento: Laŭ tio, se unu ŝipo povas transiri la Atlantikon en ses tagoj, ses ŝipoj povas transiri la Atlantikon en unu tago.

Kio okazis kiam la virkoko penis demeti ovon?

Ĉu vi rezignas?

Ankaŭ la virkoko!

Unu homo ĝin faris; sed ne uzis ĝin.

Unu homo ĝin aĉetis; sed ne bezonis ĝin.

Unu homo ĝin bezonis; sed ne vidis ĝin.

Kio ĝi estis? Ĉerko.

Se homo naskiĝis en Ĉinujo,

instruiĝis en Anglujo,

kaj mortis en Japanujo,

kio tiu estus? Mortinta!

La suprajn ŝercojn sendis 15-jara Matthew Smith, Epping, N.S.K.

COLOMBIAN CONGRESS: The First Colombian Esperanto Congress, held in Medellin last December attracted about one hundred, enthusiastic and mainly young Esperantists. Despite travel arrangements in that South American country being difficult, many travelled quite long distances to get there. The Congress was arranged by the Antioch Esperanto League of Medellin and it was held at Pentifiĉa Boliviariana University.

NEWS - DIGEST

VISIT TASMANIA FREE: The Esperantist who wins the J. G. Pyke Essay Competition will be presented with a return air ticket to next year's Australian Esperanto Congress in Launceston, Tasmania. The topic set for the Pyke Essay concerns the re-activation of inactive Esperantists and full details are set out in the international language pages of this issue.

VERDANT PENTAGRAMS: Into the ranks of the philatelists, phillumenists, and numismatists comes a new species—the Collectors of Esperanto Badges. The collectors held their first international get-together in Opava in September 1974 and their "Bulletin for Collectors of Esperanto Badges" is published in Czechoslovakia by Ladislav Fiala of Podebrady and Vlada Hasala of Hodonin.

Hasala and Fiala themselves have amassed between them more than 350 badges ranging from simple verdant pentagrams to organisational badges such as those of UEA, SAT, and IFEF to those specially struck for national and international congresses. Another collector with a sizeable tally is Marinko Ghivoje of Zagreb, Yugoslavia. Ghivoje has 250 Esperanto badges although this figure includes some doubling-up. (Australian Esperantists start with an advantage in the badge-hunting stakes thanks to Ken Linton who arranges the distinctive Esperanto badges for our national congresses).

SWAP AT THE TOP. UEA's former Director of the Central Office, Dr. Victor Sadler, now heads the international association's Directorate of Exploration and Planning. The position of Director of the Central Office has been re-named General Director of the Central Office and will be filled by Mikulash Nevan. Incidentally, the UEA Executive Committee are currently considering moving Esperanto headquarters from Rotterdam to either Brussels or Antwerp.

JUBILATION! Staff of the International Esperanto Museum in Vienna are delighted with their research for this year's

Jubilee celebrations. It turns out that the Museum was officially opened on August 1st, 1929, by Wilhelm Miklas, the President of Austria. Which is two years later than previously supposed. This year's jubilee celebrations will still go on, but there will now be a second celebration in 1979 which will include a special exhibition of Esperanto memorabilia.

IRANIAN STUDENT: An Iranian woman, Mrs. Mould Saghafian, was one of nine students who successfully sat in January for a new style of Esperanto exam. The so-called "Language Comprehension Examination" was held in Paderborn, West Germany and was devised by Professor Helmar Frank. After passing the exam, Mrs. Saghafian went to Paris to stay with the French Esperantist, Mme. Haudebine, who is herself noteworthy for having taught the international language in India for many years.

JAPANESE ARRANGEMENTS: This year Japanese Esperantists will have the choice of more than a dozen different congresses, live-ins and seminars, where they can practise the international language. The gatherings are independently organised and the year started with a ski-way at Yamagata in February and is expected to finish with the 18th Tohokua Esperanto Congress at Tohokua in December. Overseas Esperantists visiting Japan during July are cordially invited to take part in the "Fourth International Esperanto Get-together" in Tokyo. The programme specifically promises them "Crocodile-free" discussions and amusements.

ACTION STATIONS: The eight radio stations which are offering regular broadcast in Esperanto (with country of origin in brackets) are: ORF (Austria); Radio Peking (China); Radio Roma (Italy); Radio Poland (Poland); IBRA Radio (Sweden); Swiss Short-wave Radio (Switzerland); Radio Zagreb (Yugoslavia); Vatican Radio (Vatican City). Details of times and frequencies are published in "Esperanto" magazine or can be had direct from the stations themselves.

CREDITS: News Digest again acknowledges the Esperanto News Service of Pilo Press for the preparation of this column.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O., Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario: S-ro S. Wickendon, 498 Pembroke Road, Leumeah, NSW., 2560

Kasisto: S-ro L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, NSW., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2056

N-ro 154 (234)

MELBOURNE

Aprilo-Majo, 1977

PREZIDANTAJ OPINIOJ.

La Redaktoro petis al mi, ke mi verku artikolon pri "La Pensoj de la Prezidanto", sed laŭ mi, kvankam konataj geniuoj kiel Pascal kaj Maŭ rajtas esprimi kaj eldoni profundajn kaj saĝajn "Pensojn", mi mem devas nur esprimi "Opiniojn" pri la aferoj de la Asocio, la Movado aŭ la mondo.

Antaŭ kvin jaroj kaj duono, la kongresanaro en la Melburna kongresaŭlo elektis min, kaj mi dejoris kaj dejoras en tiu ofico, sed forestis por viziti la Universalan Kongreson en Beogrado, kaj studi novajn instrumentadojn en Britio, dum ses monatoj en 1973. Nun mi intencas foriri denove, post la jusa emeritiĝo, por ĉeesti la Universalan Kongreson en Islando, kaj viziti survoje la parencojn kaj la plumamikojn, en Anglio kaj Usono. Mi nepre devos reveni por prezidi ĉe la venonta Aŭstralia Kongreso en Launceston, ĉar tio estas grava devo kaj privilegio de la prezidanto.

Efektive, tiuj kongresoj estas aparte gravaj por sukcesigi la movadon en nia vasta kontinento. Niaj membroj loĝas dise en ses ŝtatoj, kaj malofte ĝuas la okazon renkonti unu la aliajn, pridiskuti la progreson de nia afero, voĉdoni pri la elekto de niaj oficistoj, kaj amike partopreni distraĵojn, ekskursojn, konkursojn kaj bankedon. Grave estis elekti laboremajn, eĉ sindonemajn oficistojn, kiuj konsentos dejori almenaŭ du jarojn inter la kongresoj, kaj espereble plu. Kun granda bedaŭro mi antaŭ nelonge ricevis la in-

formon, ke nia sekretario, S-ro Simon Wickenden, volas ekŝiĝi. Li jam plenumis la pezajn taskojn de la sekretario dum dek ses monatoj; ni devas esprimi nian elkoran dankon al li. Bedaŭrinde li tute ne povos ĉeesti la 21an Kongreson en Launceston, kaj estos neeble danki lin vid-al-vide je la fino de la dujara periodo.

Mi esperas renkonti denove multajn miajn geamikojn en la bela insulo Tasmanio, kaj espereble multaj novaj geamikoj ĉeestos la kongreson. Antaŭ kelkaj jaroj la movado en Tasmanio estis vigla, kaj en 1960 oni okazigis sukcesan kongreson en Hobart, sed post la ekŝiĝo de fervoraj gvidantoj, la klub-agado iom velkis. Lastatempe ĝi revigliĝas, kaj la plej ĝojiga pruvo pri tio estas la propono aranĝi la 21-an kongreson. Estas nia devo subteni la agadon de niaj gesamideanoj en Tasmanio kaj kuraĝigi ilin per nia aliĝo kiel eble plej frue. Kelkaj samideanoj diris al mi, ke ili intencas ĉeesti la kongreson kaj poste ĝui turisman ekskurson ĉirkaŭ la insulon. Vee ili konstatas, ke oni devis aranĝi perŝipan vojaĝon, kun propra aŭtomobilo, minimume unu jaron antaŭ la kongreso, ĉar multaj aliŝtatanoj amas tiun insulon kaj revenas jaron post jaro por libertempoj en tiu bela ŝtato. Komprenoble estos eble flugveturi, sed, se vi intencas resti post la kongreso, ne hezitu! Vi devos pripensi viajn aranĝojn kiel eble plej frue.

Pri la drama-konkurso, mi devas averti ĉiujn partoprenontojn, ke mia kunludantino intencas venki denove en Launceston kaj jam komencas instigi min lerni novan rolon. Estu pretaj.

Dum mia foresto la vicprezidantoj sendube zorgos pri ĉiuj demandoj; mi ne restos ĉe unu adreso pli ol semajnon, sed intencas skribi kelkajn liniojn por nia gazeto kiel eble plej ofte. Ĝis la revido en Launceston.

(Prof-o) R. G. Robertson,
Prezidanto de A.E.A.

21st AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-8, 1978 — Launceston, Tas.

Mail your Congress Fee (\$11 Pensioners, Students, \$6) to the Congress Treasurer, Mr. Mac Le Fevre, 22 Belle Vue Ave., Launceston, 7250) Add \$10 for Room Deposit and enclose a stamped addressed envelope for your receipt.

Fourth List of Congress Members:

32. Mr. E. W. Chandler, Sydney
33. Mr. S. J. Campbell, Dorrigo, NSW
34. Mrs. M. Sanders, Melbourne
35. Miss M. Sanders, Melbourne

State Distribution: NSW 12; Victoria 9; Tasmania 8; Queensland 4; Western Australia 2.

The Congress Committee announces that the following Bus Tours are being organised for the Congress:

Half-Day Tour of the TAMAR VALLEY and crossing the spectacular Batman Bridge. Superb river and orchard views.

Full-Day Tour to POATINA-GREAT LAKE and return via Cataract Gorge.

Full-Day Tour of MERSEY-FORTH RIVERS and ENTALLY HOUSE.

A 3-Day Post-Congress Tour is planned, provided enough participants would announce their intention to take part. It would go through farmlands, mountains and forests to Scottsdale, in the North West on to St. Helens or Scamander on the East Coast for the first night; down the east coast to Hobart for the second night; sightseeing in and around Hobart and then on to Launceston.

S-ro ROBERT FELBY: Kiam vi legos ĉi tiun anoncon, vi konstatos, ke mi denove perdis vin. Bonvole komuniku vian novan adreson. Ken G. Linton.

Kiu konas la nunan adreson de S-ro Robert Felby bonvole skribu al nia redakcio.

NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto
Bun'ichi Iizaki)

HOKKAIDO: (situas en la plej norda parto de Japanujo). En la ĉefurbo SAPPORO okazis Esperanto-kurso por komencantoj ĉe la elementa lernejo, ĉiun mardon kaj vendredon. La unua periodo de oktobro ĝis novembro jam sukcese finiĝis. La dua periodo okazas de januaro ĝis marto. Gvidanto estas la estro de la 'Hokkaido Esperanto-Ligo', S-ro K. Kimura. La kurso okazis sub la protektado de la urbestro kiel unu el la kulturstudoj por urbanoj.

TOKIO: La Tokio-branĉo de Japana E-Instituto (Prezidantino S-ino Y. Isobe), kiu havas membraron de 125 pueronoj, kunvenis 19/1 en la lerno-ĉambro de la Instituto, kiel "Ĝenta kunsido". Temoj estis diversaj, liberaj kaj la kunvenintoj ĝuis la viglan Esperanto-babiladon. Ĉeestis i.a. kelkaj junulinoj kaj radio-amatoroj. Tiaj kunvenoj okazas ĉiumonate je la tria merkredo vespere. La kotizo (200 jenoj — proks. 66 aŭstr. cendoj) inkludas trinkaĵon. Vizitantoj estas ĉiam bonvenaj.

KIOTO: La 6-an kaj 1-an de novembro 1976 okazis la 3-a internacia Esperantorenkontiĝo ĉe Takara dera (budhisma templo) en Kioto. Gastoj estis Hans Adriaanse, Feron Adriaanse, junaj geedzoj el Nederlando, kaj S-ro S. B. Lenczewski el Pollando, junanima mezaĝulo. Vespere okazis prelego kun diapozitivaj pri iliaj landoj kaj sekvantan matenon S-ro Lenczewski prelegis pri "la sistemo de instruado kaj lernejoj en Eŭropo." Okazis vigla interŝanĝo de opinioj. Posttagmeze ni transiris en la prelegejon ĉe Japan-Itala Domo en la centro de Kioto por ĉeesti la aŭtunan prelegkunvenon de Japana Esperanto-Instituto.

YAMAGATA havis gastojn el Venezuelo, profesoro de anatomio. S-ro Levay, kun edzino, kiuj restis de la 28-a de septembro ĝis la 2-a de oktobro 1976. Ili salutvizitis la urbestron akompanate de Yamagata Esperanto-klubano. Tre plaĉis la urbo Yamagata al la vizitantoj.

OSAKA bonvenigis gesinjorojn Totten el Tajvano, je 5-a okt. 1976 kaj poste S-ron Decobert el Francio, U.E.A.-Delegiton de Pau kaj fabrikestron de Alcai-

Okaze de speciala kunveno de la Osaka Esperanto-Societo, je 7-a de okt: 1976, li prelegis pri "Parizo kaj Francujo" kun bone aranĝitaj lumbildoj.

La 64-a Kongreso de Japanaj E-istoj okazos de la 26a ĝis la 28a de aŭg., 1977 en Tokio. Cef-organizanto estas la konata Esperantistino S-ino Y. Isobe. En la kadro de la kongreso okazos kurso por kursgvidantoj, krom algrada, mezgrada kaj elementa kursoj, ekzamenoj de la Japana E-Instituto, Beletro kaj Oratora Konkursoj., Gaja Vespero, Bankedo kaj prelegoj.

"HOW TO RE-ACTIVATE NON-ACTIVE ESPERANTISTS"

This is the title of an Essay Competition, the prize for which is a free return-ticket by air from Melbourne to Launceston, to take part in the 21st Australian Esperanto Congress.

Esperanto Clubs throughout the world are continuously endeavouring to recruit new members, many of whom, after a short period of activity, become lost to the movement. What can be done to revive their interest and regain them as active members?

Send your contribution of about 1000 words, if possible type-written, by the 15th of October, 1977, to "ESPERANTO", Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

Portreto kaptis ŝteliston

En la kvara jardeko de la dek-oka jarcento vivis en Sudbury (Suffolk, Anglujo) infano, Tom Gainsborough, kiu tre ŝatis desegni bildojn. Kiam li estis ok-jara, li jam estis skizinta ĉiun arbon kaj ĉiun dometon en la distrikto. Li tre deziris, fariĝi vera artisto kaj volis transloĝiĝi al Londono, por tie preni lecionojn. Sed lia patro ne intencis, plenumi tiun deziron de la knabo, ĝis iutage io kaŭzis, ke li ŝanĝu sian opinion.

Dum Tom vagadis kun sia skizlibro ekstere, li ekvidis ŝteliston, kiu grimpis trans la muron de la patra ĝardeno. Li laborigis siajn viqlajn fingrojn kaj laŭ memoro rapide desegnis bildon de la viro. Tiu estis tiel bona portreto, ke la ŝtelisto poste estis kaptita kaj punita pro sia krimo.

La patro de Tom nun ekkomprenis, ke lia filo havas veran talenton, kaj—kiam Tom havis dek kvar jarojn—la patro sendis lin al Londono, por studi arton. Do, fine lia revo realiĝis.

Ne daŭris longe, ĝis kiam la juna Gainsborough faris sian nomon mondkonata. Liaj pejzaĝoj kaj liaj portretoj estis pendigitaj en la galerioj, kaj laŭmodaj personoj amasiĝis en lia art-laborejo.

Li pentris portretojn de la Reĝa Familio, de s-ino Siddons, fama aktorino tiama, de d-ro Johnson kaj de multaj aliaj bonkonataj homoj.

Kiam li mortis en 1788 (mil sepcent okdek ok) li postlasis nomon, kiu daŭre vivos en la arta mondo. . . . Sed krom pro la ŝtelisto en la patra ĝardeno Thomas Gainsborough eble neniam estus havinta iun ŝancon, atingi tian altan famon.

trad. el la angla: P. E. Schwerin.

UNIVERSALA KONGRESO en Rejkjaviko: Antaŭ la fino de aprilo aliĝis jam 1062. Inter ili troviĝas 15 aŭstralianoj. (Nur unu el Nov-Zelando).

ĈU KVALIFIKOJ POR JUĜI ?

Kial personoj, kiuj scias preskaŭ nenion pri la Internacia Lingvo, povas uzi sian postenon aŭ rangon por eldoni opinion, kiu kondamnas ĝin pro tio, ke ĝi estas artefarita, neefektivebla, kaj ne havas la literaturan riĉecon tiel necesan por ĉiu vivanta lingvo?

Estas konstanta fonto de mirigo por mi, ke persono povas arogi al si la rolon de juĝisto kaj jurio pri temo, pri kiu li pli ol evidente nenion scias, kaj ne nur verdikti, sed anonci sian decidon al la mondo kun tia absoluta memfido, kiun nur manko de scio povas doni.

Unue, Esperanto ne estas artefarita lingvo, ĉar ĉiu vorto estas prenita el la vivanta lingvo; due, nomi lingvon neefektivebla post preskaŭ naŭdek jaroj de preskaŭ konstanta progreso estas nepre ridinde; kaj, trie, krude diri, ke la lingvo havas nenian literaturan riĉecon, kiam ĝi posedas pli grandan trezoron de literaturo, ol multaj el la malpli grandaj nacioj, estas simple manifesto de profunda manko de scio; kaj, fine, rilate nuancojn de signifo, la moderna Esperanto povas alte teni sian standardon kompare kun iu ajn nacia lingvo.

Esperanto konstante pliriĝis, spite la klopodojn de tiuj, kiuj deziras teni ĝin en ĝiaj infanvestoj; kaj neniam ĝiaj vortoj ŝanĝiĝas, ĉar ili estas konstante garditaj de la Akademio de Esperanto. Male, se ni komparas malnovan anglan vortaron kun moderna, ni ne povas ne rimarki, ke multaj vortoj ŝanĝiĝis.

— Ken G. Linton.

AŬSTRALIA- =KRONIKO

PERTH: La dek kvin gesamideanoj, kiuj ĉeestis la kunvenon la 23an de marto, spektis interesajn bildojn el diversaj mondpartoj. Pluraj membroj elmontris siajn plej ŝatatajn diapozitivajn kaj prelegis pri la bildoj esperantlingve.

Ni bedaŭris la malĉeeston de S-ino Ruth McGrath, kiu estis en hospitalo. Plaĉas al mi kroniki, ke ŝi nun bone resaniĝas post ŝia operacio.

La kunveno de la Esperanto-Ligo je la 13a de aprilo translokiĝis al la Universitato "Murdoch". Liganoj kuniĝis en la biblioteko kaj kontrolis la elmontron de libroj, kiujn la Ligo pruntedonis provizore al la Universitato. La libroj ankoraŭ estas disponeblaj al la membroj kaj, aldone, al universitatanoj. Esperinde, tio helpas allogi studentojn al la "Murdoch" Esperanta klaso.

Je la 18/19 de marto S-ro Owen Loneragan ĉeestis konferencon ĉe Fremantle sub la aŭspicioj de la "W. A. Teacher Education Authority" en la ĉeesto de la Komisararo pri Homaj Rilatoj (S-ro Al Grassby). La konferenco pritraktis la temon "Multi-cultural furto and the schools". S-ro Loneragan raportis ke ĉiuj proponoj liaj pri Esperanto estis forpuŝitaj sencere monie. Ni esperu, ke niaj Brisbanaj samideanoj atingos pli da sukceso sekve de simila konferenco je la 16/17a de aprilo.

Dumtempe, en Perth, laboro daŭras por certigi, ke la radio-kurso "Jen Nia Mondo" aŭdiĝos per Radio 6NR je la 31a de majo.

—W. H. H.

●**MELBOURNE:** S-ro Ken Linton, 7/3, provizis la programon, legante tradukitajn rakontojn kaj artikolojn, amuzajn kaj kortuŝajn. Nia prezidanto, S-ro S. Kanacki, 21/3, montris filmon pri nia Zamenhof-festo (1976) kaj pri sia vizito al la naskiĝlando, Jugoslavio.

Daŭrigante sian prelegserion pri vojaĝo tra Eŭropo pasintjare, S-ro Ken Linton, 28/3, montris diapozitivajn kaj parolis pri vizito en Italio. Semajnon poste la membroj rakontis pri siaj plej elstaraj okazintaĵoj dum 1976. Nova membro, S-ino Kay Augunas, rakontis ke por ŝi la plej elstara okazintaĵo en 1976 estis la eltrovo de ekzistas Esperanto-klubo en Melburno al kiu ŝi tuj

aliĝis. I.a. por S-ro H. Koppel la plej elstara okazintaĵo estis la renkonto, ĉe la Melburna flughaveno, kun la japanaj kaj nov-zelandaj partoprenantoj ĉe la Pacifika kongreso.

Nia plej aktiva preleganto estas nuntempe S-ro Ken Linton. Je 18-a de aprilo li legis siajn tradukojn de tre dramecaj rakontoj kaj je 2-a de majo li denove faris lumbild-paroladon, ĉifoje pri vizitoj de Romo, tra Florenco, Venecio al Innsbruck (Aŭstrio) kaj al Svislando.

BUMERANGO nun ornamas la 'Aŭstralian Cambrn' en la U.E.A. Domo en Rotterdam, dank' al la iniciativo de S-ro Eino Loozits, Hobart.

●**SYDNEY:** 21/3/77: Ke "Preslibereco, estas bona por la homraso", estis temo por ronddiskuto, el kio diversaj opinioj venis, — homoj malbone uzas tion, kio estas libera; la gazetaro estas libera nur laŭ la deziro de la redaktoroj; redaktoroj presigas nur tion, kio vendigas la jurnalojn; riĉuloj povas regi la inform-mediojn. Konsentite, la libereco estas privilegio, pri kio oni devas respondi, sed se la gazetaro devas respondi, al kiu ĝi respondecu?

28/3/77: Jim Harwood menciis, ke preĝejo en tereno de malsanulejo de Hornsby estis iam domo de S-ro Arturo Collingridge, frua Esperantisto. Ankaŭ menciita estis la fakto, ke Senatoro Wriedt volas scii pli pri Esperanto. Ni vidis serion da lumbildoj de la firmao Agfa-Gevaert, nun haveblan el ties oficejo en Melburno. Ne estis multaj bildoj, sed bona estas la akompananta sonbendo. Mi rekomendas, ke ĉiuj grupoj prunteprenu ĝin. Sekvis lumbildoj de diversaj membroj.

4/4/77: Volo Gueltling legis diversajn verkojn de la satiristo Efraim Kishon. Ili temis pri modernaj aparatoj kiel lavmaŝino, komputero k.t.p.

—Margaret Chaldecott

●**MANLY:** S-ro A. Cocking gvidis kurson for komencantoj, dum progresintoj elektas mem la temon por diskuto. La programojn plivigliĝas membroj revenintaj de transmaro.

La E-klubo de Manly, 25/3/77, organizis vesperon por diapozitivaj ĉe la preĝejo St. Matthews por la publiko. D-ro K. Smith kaj Prof. R. Robertson prezidis. Skabeno Preacher funkciigis la diapozitivajn kaj, kiel kutime, aldonis al la valoro de la okazaĵo. Aŭskultantoj multe laŭdis lian kapablon.

La regionaj konsilantaroj de Manly kaj Warringah organizis, 3/4/77, grandan foiron ĉe Kierle Park, Manly. Klubanoj de Manly aktivis ĉe Ekspozicia Stando pri Esperanto. Al la multaj informetoj respondis S-inoj Betty Cleminson, E. Giles kaj Gilda Franze.

Responde al peto de la Maljunuloj de Dee Why, Betty Cleminson, Kay Morrison kaj Edna Giles prezentis tuthoran paroladon klarigan pri "Kio estas Esperanto kaj kiel tio funkcias tra la mondo", rezulte de kio nova klaso kunvenos en la venonta trimestro en la preĝeja salono Betty sin proponis kiel instruiston Arthur Cocking gvidas entuziasman klason ĉe la Metodista Centro en Sidnejo ĉiujaude.

24-an de aprilo okazis kradrosta festo en la ĝardeno de Betty Cleminson. Membroj ĉeestis grandamase. Wre Chandler prizorigis la kradrostadon, sin pruvante kapabla kuiristo. Honorgastoj estis Frans kaj Netty Hagen el Amsterdamo, kiuj planas poste viziti Perton.

En la sekvonta semajno S-ino E. Giles akompanis Ges-rojn Hagen al Ĉina Ekspozicio.

Klasaj ĉeestoj plibonigis ĉi-jare kaj promesas bone por la sekvonta trimestro. Trimestro-fina festo okazis en la hejmo de Ges-roj Ross, kie oni bonvenigis la novajn lernantojn de Arturo Cocking. Ĉiuj bondeziris al Marjorie Duncan okaze de ŝia emeritigo kiel instruistino ĉe "Far West Children's Home", kie ŝi plenumis multjaran servadon al kripligitaj infanoj. Oni dankis ankaŭ pro servado en la E-klubo de Manly.

—Edna GILES.

ST. LUCIA: Antaŭ nelonge aperis en la loka ĵurnalo "Courier Mail", letero pri la internacia lingvo. Do la A.B.C. kontaktis la Brisbanan E-Societon por organizi programeron por la TV-elsendo "Hodiaŭ-Vespere".

Prez. R. Ross petis, ke nia klubo partoprenu. Do je 6a de aprilo 1977 A.B.C. fotografis la klason por komencantoj, kiun kondukas Anni Spencer kaj la klason por progresintoj kondukatan de M. Jones. Oni intervjuis S-ron R. Ross, kiu donis detalojn pri la lingvo, ĝia fondinto, ĝia progreso kaj ĝia filozofio. Bedaŭrinde, tiutempe forestis en Japanujo nia estrino W. Greenhalgh.

Bondezirojn al niaj membroj Ruth Morrison kaj Decia Shonhan, kiuj baldaŭ forlasos nin por vojaĝi eksterlanden.

—M. JONES.

●**MORWELL, Vik.:** La ĝenerala kunveno de la klubo okazis je 8/3/77. La komitato por 1977 estas: Prez: S-ro W. Wybenga; Vic-Prez: S-ro I. T. Mad-

dern; Sekretario: S-ino M. Wybenga; Protokolanto: S-ino A. Schepers; Kasisto: S-ro B. Kelly; Komitatanoj: S-ino Elsie Maddern, F-inoj Helen Schepers kaj Sharon Wybenga.

Dum Pasko okazis en Yarram ekspozicio kaj S-ino A. Schepers organizis E-standon. Esperanto-libroj, gazetoj, poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj estis ekspoziciitaj.

EL LA FEDERACIOJ

●**KVINSLANDO:** La jarkunveno de la Esperanto-Federacio de Kvinslando okazis en Brisbano je la 14-a de februaro. La ĝisnuna prezidantino, S-ino Doris Sinclair, sciigis, ke ŝi ne plu povos servi en tiu ofico. La kunveno elektis novan estraron: Prez: S-ro Ray Ross; Vic-Prez: June Peters, Annie Spencer; Sekr. Sybil Martin; 2-a Sekr. Edna Jullie; Kasisto: Edna Mathers; Publicisto: Peggy Ross, Redaktoro: Ray Ross.

Laŭ la raporto de la kasisto, la Federacio havas bilanckonton de \$270.48. Malĝojiga estis la ontono, ke, pro manko de membroj, la Redcliffe Klubo ne plu ekzistas.

●**NOVA SUD-KIMRUIJO:** Federacia konferenco okazis la 16-an kaj 17-an de Aprilo. Sabate membroj kunvenis en Centennial Park, kie sub gvido de Wre Chandler, ili vizitis diversajn birdejojn. Poste membroj kunvenis en la Esperanto-Domo en Redfern kaj diskutis diversajn aferojn. La plej grava estis la fonda de Eduka kaj Kultura Komitato. Distra vespero sekvis vesperrangon. Dimanĉe, multaj kunvenis en la domo de Betty Cleminson en Harbord kaj ĝuis amikan etoson.

—Margaret Chaldecott

●**VIKTORIO:** La 6-a Jarkunveno de la Federacio okazis 19-an de novembro, 1976, en la Kvakera Domo en Toorak. Ĉeestis nur 14 membroj. Laŭ la raporto de la kasisto la Federacio havis kreditsaldon de \$299.68. La kunveno elektis la jenan novan estraron: Prez: A. Baldwin; Vic-Prez: R. Reed; Sekretario: S-ino B. Podmore; Kasisto: F-ino M. Sanders; Bulten-Redaktoro: H. Koppel.

Ne multaj partoprenis la teatran vesperon la 27-an de novembro en la teatro Clayton, sed tiuj malmultaj ĝuis la prezentadon de "The Sentimental Bloke", kiel ankaŭ la postan vesper-manĝeton de kokidajo kaj ĉampano.

Tre sukcesa estis aŭtobusa ekskurso al la Rezervejo Barringo je 26-a de februaro, 1977. Partoprenis 29 personoj,

kiuj defiis tre pluveman matenon por atingi la rendevuejon ĝustatempe. Felice la vetero pliboniĝis kaj la ekskursantoj ĝuis sian piknikan lunĉon en la rezerv-ejo, kie ili poste konatiĝis kun la amikemaj cervoj, valabioj kaj multspecaj akvobirdoj. Eble necesas diri, ke la amikemon multe stimulis la mangaĵoj al ili donitaj de la vizitantoj.

La aŭtobuso poste transportis la ekskursantojn al bela Mt. Macedon kaj al la "Oaks Tearoom", kie eksmembro de la Malvern-klubo, Geof. Casey kaj edzino servis eksterordinare bongustajn frandaĵojn kun teo kaj kafe.

OFICIALA INFORMILO

(malnova)

Novaj Anoj:

Maroschek, S-ro K., Inala, Q.
Crooks, S-ino N., Clearview, S.A.
Booth, S-ro P. I., Quakers Hill, NSW
McNeill, S-ro R. J., Rockhampton, Q.
Packham, S-ino M., Rockhampton, Q.
Norton, S-ino M., Rockhampton, Q.
McGrath, S-ro P. O., Parkdale, V.

Generala Fonduso:

Eden, S-ino M., Ravenshoe, Q. \$5
Sinclair, S-ino D., Peachester, Q. \$10
Gilbert, S-ro H., Wattle Park, V. \$10
Toth, S-ro I., West Heidelberg, V. \$1
Milligan, Ges-roj S. H. & J. I.,
Doncaster East, V. \$1

T.G.M.F.:

Anon, Turramurra, NSW. \$1
Sinclair, S-ino D., Peachester, Q. \$10
Howard, S-ro W. H., Floreat Park,
W.A. \$2
Milligan, Ges-roj S. H. & J. I.,
Doncaster East, V. \$1

F. R. Banham M.F.:

Koppel, S-ino F., Reservoir, V. \$15

OFICIALA INFORMILO

(nova)

Novaj Anoj:

Carman, S-ro C., Erskinville, NSW.
Mullett, Ges-roj J. & A., E. Malvern, V.
Capper, S-ro R., Glossodia, NSW.
Dibdin, S-ro C., Canberra, ACT.
Ellyard, S-ino M., Melba, ACT.

Generala Fonduso:

Wilkins, S-ino O., Bendigo, V. \$2
T.G.M.F.:

Wybenga, S-ino M., Morwell, V. \$5
Campbell, S-ro S. J., Dorrigo, NSW \$2
F. R. Banham M.F.:

Huelin, S-ino G., N. Epping, NSW \$100
(Fratino de la mortinto)

NIA HISTORIO

N-ro 17 PIONIRAJ ESPERANTISTOJ DE MELBURNO ...

J. A. CLARKE (77 Bourke Street, Melbourne) aliĝis al la Melburna E-Klubo en 1907 kaj estis komitatano en tiu jaro, ankaŭ en 1912 kaj 1913. Li estis la kluba kas-kontrolisto por 1912.

La donita adreso, kiu troviĝas en la Melburna urbcentro, estis probable komerca adreso. Tio ŝajnas pli kredebla ĉar la sama adreso estas donita por Esperanto-kolego, Cedric F. White. F-ino Ruby Ledger, nia pionira esperantistino el Benalla, diris, ke, kiam ŝi kaj Eva Warren (unu S-ino E. Bellis) partoprenis la 2-an Aŭstralian E-Kongreson en Melburno, en oktobro 1912, ili loĝis en la hejmo de certa S-ro Clarke—kredeble la sama bonulo. Parenteze, F-ino Ledger estas listigita en la "Suda Kruc" por oktobro 1921, kiel abonanto.

F. E. F. Cobb, kiu loĝis ĉe 7 Gurner St., St. Kilda, estis unu el la fond-membroj de la klubo (10/2/05), kaj ĝia kasisto en 1906 kaj 1907. Li estis ankaŭ membro de la Zamenhofa Ligo (N-ro 12,359)

PETER CONNELLY, kiu loĝis ĉe 4 Council St., Clifton Hill, estis alia fond-membro (10/2/05), kaj membro de la komitato en 1906.

EUGENE F. EBERBACH, Departamento de Internaj Aferoj, estis alia fond-membro kaj komitatano en 1906.

RICHARD C. MILLS (Queen's College, Melburna Universitato), aliĝis al la klubo je 7/9/06. Li estis bibliotekisto en 1911, komitatano en 1911 kaj 1912 kaj sekretario de la klubo en 1913.

D-ro SCANTLEBURY, (Cheltenham, Vik.) aliĝis al la klubo 7/9/06, kaj estis unu el la tri Vic-Prezidantoj en 1907.

WILLIAM SERVICE, (Bamfield St., Sandringham) aliĝis al la klubo 21/12/06. En septembro 1907 li komencis klub-gazeton "La Verda Stelo", sed ne povis daŭrigi ĝin post novembro 1907. Li kontribuis artikolon "Vekiĝo de l' Naturo" al N-ro 7 de "Australian Esperantist" de D-ro Barrington, novembro 1908.

(daŭrigota)

Mi vidis nur la unuan akton de la dramo, sed ne la duan.

Kial ne?

Mi ne povis atendi tiel longe. La dua akto, laŭ la programo, sekvos du jarojn poste.

Gramatike -

En la jaro 1908 Rene de Saussure proponis sian famekonatan "Dek ses Reguloj pri la Vortfarado en Esperanto". Unu el tiuj reguloj estas tiu pri "Neceso kaj Sufiĉo". Kvin jarojn poste agnoskis tiun regulon la Akademio de Esperanto en sia Oficiala Gazeto. Jen la anonco:

"La Akademio de Esperanto rekomendas al la Esperantistaj aŭtoroj, ke ili sekvu la jenajn du principojn, kiuj kontrastaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto:

- (a) "Principo de neceso: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentatan de tiu vorto;
- (b) Principo de sufiĉo: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonzufuzeble komprenata sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti eljetata kiel neutila kaj nenecesa."

Dudek du jarojn poste aperis Plena Gramatiko kun la jena komento:

"En la konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, afiksojn kaj finaĵojn, kiuj necesas, sed ne pli ol kiom sufiĉas por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan."

La aŭtoroj de PG atentigas, ke la ĝusta apliko de la principoj de neceso kaj sufiĉo necesigas scion pri la gramatika karaktero de la radiko uzata.

En la fruaj jaroj de la lingvo oni kutimis uzi tiujn vortojn, kiaj "kredemeco", sed evidentigis poste, ke tiaj formoj estas nenecese prezaj, kaj nenion aldonas al la pli simplaj formoj, kiaj "kredemo". Ankorau pli poste, sed konforme al la uzado de Zamenhof mem, fariĝis pli uzataj la simplaj formoj "skribo", "vesto", "planto", anstataŭ "skribajo", "vestajo", kaj "plantajo". En la verkoj de Lanti oni trovas tre oftajn ekzemplojn de tiaj senfinajaj vortoj, kiuj tamen sub lia plumo nenion perdas el sia klareco. Estus bedaŭrinde, ja regrese, se oni nun reirus al la malnovaj formoj nur por konformi al ia arbitra teorio, kiu ne respondas al la efektiva kaj aktuala lingva uzado, kaj mi estas tute certa, ke provo tion fari estus tute sensukcesa. Oni ĉiam memoru, ke la lingvon faras ties uzantoj, ne la

gramatikistoj aŭ la teoriuloj, kaj ke — ĉar la skribado kaj precipe la presado estas pli daŭraj ol la parolado—unualoke la literaturo registras la evoluon kaj la kreadon de novaj formoj, kiel ankaŭ la forvelkon de arkaikaj esprimmanieroj.
—Ken G. Linton.

BIRDOJ KAJ ESPERANTO

Ĉiujara organizita masakro de migraj birdoj minacas Eŭropon kaj Afrikon. Tio estas internacia problemo, do prave FONDAĴO MONDA ALTERNATIVO, kiu avertas kontraŭ tiu ekologia katastrofo, uzas Esperanton.

Birdoj estas niaj pli bonaj helpantoj kontraŭ la insektoj, kiuj formangas la nutrigajn kreskajojn antaŭ la rikolto. Ĉiujare oni mortigas 250 milionojn da migrobirdoj. En antaŭvidebla tempo jovos veni momento, en kiu mankas birdoj por celtrafe neniigi troaĵojn da insektoj, kaj insektoj kiuj estas imunaj kontraŭ pesticidoj plimultiĝos ekscese. Sekve de tio, malsato minacas la homaron.

Oni mortigas migrajn birdojn en multaj landoj, sed ĉefe en Italio. Tie ĉiujare oni detruas minimume 250.000.000 da migraj birdoj; tiom da insektmanĝantaj birdoj ekstermas proksimume 40.000 tunojn da insektoj . . . en unu monato!

La ĉesigo de la birdkaptado en Italio estas unualoke politika problemo. La politikaj partioj, ĉu dekstraj aŭ maldekstraj, ne kuraĝas (se ili volus) malpermesi tiun sporton, ĉar ĝi estas tre populara. Krome la ŝtato multe gajnas per ĉaspermesoj.

La ĉasistoj kaptas kaj pafas per ĉiam pli efikaj metodoj. Italio preskaŭ ne plu havas surlokajn birdojn; ili estis mortpafitaj, formangitaj. Ni ne toleru ke la ĉasistoj nun ankaŭ forprenas niajn internaciajn birdojn.

La Fondaĵo "Monda Alternativo" en sia laboro speritis altajn lingvobariilojn, kaj tial akceptis Esperanton apud la angla kiel laborlingvon.

Esperantistoj, kaptu tiun ŝancon por praktike kaj utile uzi Esperanton por valora celo. Kontaktu kun "Monda Alternativo", *Vondellaan 37 zw, Zandvoort Nederlando*, aŭ petu informojn de "Ornitologia Rondo Esperantlingva, kiu kunlaboras kun "Monda Alternativo".*)
—Albert Goodheir (en E. ein Skotlando)

106)

(*En Aŭstralio kontaktu S-ron E. W. Chandler, 57 Northcote St., Naremburn, 2065).

NEWS - DIGEST

COP THIS! The International Police Association currently represents 130,000 peace officers in 47 lands. Symbolic of this spread of membership is the Association's decision to have the motto for their coat-of-arms in the international language. It's "Servo per Amikeco".

HORSE SENSE: A report from the Esperanto colony "Bona Espero" in Brazil says that the members are noticing some differences between their former urbanised Western way of life and their present surroundings. "We used to have to look for a parking spot for our car", said one, "but now we have to find pasture for the horses when we go visiting".

RUSSIAN AROUND: During a forty-day visit to Bulgaria, Russian agronomist and UEA Vice-Delegate for Moscow, Sergei Nikolaevich Kranov, addressed several professional gatherings in both Esperanto and Russian. Kranov received the thanks of both governmental and Esperanto organisers for his efforts.

SOLDIERING ON: The Esperanto course for servicemen at Canungra, Queensland, now has fourteen students meeting every Thursday in the Canungra Education Centre. Leading the soldiers in their study of the international language is local Esperantist Siegfried Kunze.

SURPRISE PACKAGE: English Esperantist and Secretary of FBCE, Frank Rogers, has recently retired and from time to time helps out packing hymn books for the Church Society. Recently Frank was pleasantly surprised to find that the volunteer packer working alongside him was the son of Edward Millidge — famous among Esperantists for compiling the English/Esperanto Dictionary of 1912.

MUSICAL NOTE: The Musical Esperanto Language (MEL) has reported that they now have 76 members in eighteen different countries.

W.A.I.T. FOR IT! The Western Australian Institute of Technology in Perth

broadcast the Esperanto series, "Jen Nia Mondo" through its student radio service during February.

ZAMENHOF COIN: Regular readers of this column may remember our earlier item concerning the Polish Government's intention to mint a silver 100-Zloty coin depicting Dr. Ludwig Zamenhof, Esperanto's founder, on the obverse. The Polish coin magazine "Biuletyn Numizmatyczny" in issue 9/117 has indicated that not less than 50,000 of the Zamenhof Zlotys will be put into circulation in 1980.

BULGUE: The number of subscribers to Bulgaria's Esperanto magazine "Bulgara Esperantisto" has swollen to six thousand.

PORTUGUESE EXPOSITION: Considerable interest about Esperanto was generated in Portugal last December when a large exposition of Esperanto stamps and books were put on display at the headquarters of the Portuguese Tourist Authority at Lisbon's Palace Foz. Among the many visitors to the exposition was the Portuguese Minister for Social Affairs, Dr. Armando Bacelar — himself an Esperantist.

DIVINE COMEDY: On February 17th, a couple of Italian cultural associations joined forces to present an evening on the "Divine Comedy" of Dante Alighieri. The Dante evening was held in "Room 200" at Florence's Palazzo Vecchio and readings from his epic were given in both Italian and Esperanto. Italian Senator Pietro Bargellini, himself a well-known author, attended the readings; as did Professor Novarro Guarducci, a famous Dante scholar, who provided a critical explanation of the readings from the "Divine Comedy".

MONGOLIAN ESPERANTISTS: All forty members of the Mongolian Esperanto Union are currently working on putting together the very first Esperanto/Mongolian dictionary..

ADVERTISEMENT: If you want to take a full-page advert in the magazine of the Universal Esperanto Association it will cost you (on current rates) the equivalent of \$185. In return, UEA offers you a minimum circulation of 10,000 readers in eighty-six different lands.

NEWS DIGEST: Credits to Pilo Press, IEMW, UEA, BEA, and La Voĉo.

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Kasisto/Sekretario: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 155 (235)

MELBOURNE

Junio, 1977

Bonvole notu ke okazis eraro pri la numero de la lasta eldono
(Aprilo-Majo, 1977), kiu devus teksti: N-ro 154 (234)

THE BRAKES ON THE WHEELS OF PROGRESS

What is the curious psychological perversity, which promotes the majority of men to battle obstinately against every fresh advance in human thought? Is it cowardice, or just mass laziness?

Here we have in Esperanto a complete, effective, and simple solution to the language difficulty, which has hampered the progress of mankind for centuries, and yet most men are content to muddle on laboriously with the old mess of interpreters, translations, irregular verbs, dumb-show gestures, and abysmal ignorance of their neighbour's thoughts. It is a very costly attitude, and reflects no credit on their intelligence.

There is nothing new about this phenomenon, and therefore it is all the more surprising, that we have not yet learned our lesson from the past. Curiously enough, some of the advances in knowledge have been attacked on religious grounds, in which the Church has sometimes figured largely in the opposition.

The great astronomer, Galileo, was outcast and hounded to his death, because he dared to assert that the Earth was not flat, but round. There was a chorus of protest, when man first proposed to fly in the air. If God had intended man to fly in the air like a bird

they said, He would have given man wings like a bird. Today it is the most popular means of travel. When Lister humanised surgery by introducing anaesthetics, he was dubbed a scandalous heretic. One leading church authority actually accused him of robbing the Creator of the cries for Mercy, which were His due. There was also another outcry, when Stevenson proposed to run a locomotive engine on rails at the hair-raising speed of twenty miles an hour! It took him years to live down the pious prejudices of his time, and make railways an accomplished fact.

Graham Bell, too, had to struggle for many years against violent opposition, before he could get the telephone adopted. Where would modern commerce be without it? It took William Willet thirty years to get Summer Time accepted in England; he tried five times to get his Bill through parliament, and then succeeded, thanks only to the exigencies of a World War. We are trying to complete decimalisation of our weights and measures, and organisations are being formed to oppose it.

And so the tale goes on; nobody is ever up-to-date, because ninety-nine per cent of humanity is behind the times, and the other one per cent is trying to make themselves heard. "What was good

enough for my grandfather is good enough for me." God created these conditions for us to live under, and it would be presumptuous on our part to try to alter them'. "When it is generally adopted, it will be time enough for me to think about adopting it".

Don't you think it is all rather feeble and woolly-minded? Can you wonder that the world's affairs are in such a hopeless muddle, and that here we are, almost in the twenty-first century, and we still have to settle our differences in the prehistoric way, by baring our teeth, and killing each other? And so many of those differences are due to simple misunderstandings, which would melt away, if a frank and free interchange of thought were possible between the rank and file of all nations. We have even heard religious objections to Esperanto—God made Babel, and so it is man's duty to suffer from it.

Rubbish! All that is necessary is an enlightened public opinion, strong enough in volume to demand the introduction of Esperanto into all schools, in place of the time-devouring and all too-ineffective courses of French, German, Latin, and other difficult languages. Those, who have not the time to undertake the study of this wonderful language, could at least lend us financial support to help us against the ancient barriers that have been erected against all forms of progress. —K. G. LINTON

21st AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan 2-8, 1978 — Launceston, Tas.

Mail your Congress Fee \$13 (Pensioners, Students \$7.50) to the Congress Treasurer, Mr. Mac Le Fevre, 22 Belle Vue Avenue, Launceston, 7250. Add \$10 for Room Deposit at Tasmanian College of Advanced Education and enclose a stamped addressed envelope for your receipt.

Fifth List of Congress Members:

36. Mrs. A. Schepers, Won Wron, Vic.
37. Mr. I. Grahovac, Sydney.
38. Mr. A. Cocking, Manly, NSW
39. Mr. E. E. Thompson, Shepparton, V.
40. Miss B. C. Williams, Melbourne
41. Mrs. N. Moore, Emu Park, Q.
42. Mr. J. Moore, Emu Park, Qld.
43. Mrs. M. J. Hobbs, Auckland, N.Z.
44. Mrs. L. Box, Brisbane.
45. Mr. J. Box, Brisbane.
46. Mrs. E. Giles, Manly, NSW.
47. Mrs. A. Leereveld, Melbourne
48. Mr. M. Leereveld, Melbourne
49. Mrs. M. Ling, Warburton, Vic.
50. Mr. I. T. Maddern, Morwell, Vic
51. Mrs. D. Threlfall, Perth.
52. Mrs. C. Lindsay, Sydney.
53. Miss A. Curtis, N. Tamborine, Q.
54. Mrs. J. Jenkins, Sydney.
55. Mrs. M. Ellyard, Canberra, ACT.
56. Mr. S. Ellyard, Canberra, ACT
57. Mrs. K. McFarlane, Launceston, T.
58. Mr. T. Elliott, Sydney
59. Mrs. B. Pescod., Melbourne.
60. Mr. D. Pescod, Melbourne.
61. Miss J. Boyce, Sydney.
62. Mrs. M. Baxter, Malua Bay, NSW.
63. Mr. R. Baxter, Malua Bay, NSW.
64. Mr. H. Gilbert, Melbourne
65. Mr. K. Eatt, Perth.
66. Mrs. K. Eatt, Perth
67. Mr. W. Wybenga, Morwell, Vic.
68. Mrs. M. Wybenga, Morwell, Vic.
69. Miss S. Wybenga, Morwell, Vic.

State Distribution: Victoria, 22; N.S.W. 21; Tasmania 9; Queensland 9; Western Australia 5; Australian Capital Territory 2; New Zealand 1.

Due to the high cost of coaches, accommodation, etc., the Congress Committee has decided NOT to proceed further with a Post-Congress Tour. All other tours will take place as announced in our last issue.

15th OCTOBER, 1977

That is the date by which you should send in your contribution to the Essay Competition on the subject.

"How to re-activate non-active Esperantists"

What can be done to revive the interest of those, who after a short period of activity, become lost to the Esperanto Movement? ?

The Pyke Memorial Fund offers, as a prize for the best essay, a free return-ticket by air from Melbourne to Launceston, to take part in the 21st Australian Esperanto Congress.

Send your contribution to "ESPERANTO", Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

Dum la dancado sinjoro riverencas antaŭ fraŭlino.

Mi petas, fraŭlino.

Bedaŭrinde mi ne dancas.

Tamen mi ankoraŭ petas, fraŭlino, ĉar vi sidas sur mia ĉapelo.

A.E.A. SECRETARY RESIGNS

Due to pressure of work and the illness of his wife, Simon Wickenden has been forced to resign from his position as Secretary of the Australian Esperanto Association.

The Executive accepts his resignation with regret and expresses its thanks and appreciation for the valuable work performed by him.

The Treasurer, Les Scott, is taking over the duties of Secretary until a new appointment is made at the Launceston Congress in January. All correspondence, subscriptions, enquiries and applications for correspondence courses, etc., should be directed to him at 34 Ocean Road, Manly. N.S.W. 2095. Please take careful note!

1977 SUBSCRIPTIONS MOST WELCOME!

A.E.A. Treasurer, Les. Scott advises that several 1977 subscriptions are not yet paid. Readers are asked to check and if necessary, give it their early attention. Please save the time and expense of others . . . send your payment direct to the Treasurer, L. V. Scott, 34 Ocean Road, N.S.W. 2095.

NOTO PRI LA SUN-ENERGIO

Lastatempe ni vidis per la televido, kaj legis en la ĵurnaloj, pri aparatoj konstruitaj ĉe la Universitato de Sidnejo por utiligi la energion el la suno.

La plej amuza kaj populara aparato estis kuirilo. Iu helpanto de la profesoro kuiris lardon kaj ovojn; la profesoro prezentis la manĝaĵojn al la Ĉefministro, kaj la politikisto manĝis ilin, ne tro avide, ĉar efektive ili aspektis kvazaŭ kovritaj per oleo. Tio devenas de la kuirmetodo. Per parabolforma spegulo oni povas koncentri la radiojn de la suno sur la fritpaton, kaj estas eble atingi tri mil gradojn, se la spegulo estas sufiĉe granda.

Kompreneble la pato mem brulus aŭ eĉ fandiĝus, se oni ne metus sufiĉe da oleo en la ujon, ĉar la varmo estas koncentrita. La oleo bolas; oni enmetas ovojn kaj lardon, kaj la manĝaĵoj estas frititaj. Miaopinie, tiu kuirmetodo ne allogos mastrumantinojn, ĉar estas necese kuiri je taĝmezo, starigi en sunbrilo sen ŝirmilo, kaj konstante zorge alĝustigi la aparaton, ĉar la suno ŝajnas konstante moviĝi trans la ĉielo. Kiel

klarigis Galileo, ne la suno, sed la terglobo, moviĝas, sed la efiko estas egala. Se la suno ne brilas, la ĉefmango restas nekuirita. Ĉiaokaze la mastro revenas hejmen post la laboro, trovas la kaĉon malvarma, kaj koleriĝas kontraŭ la kompatindulino.

Alia aparato konstruita en la Universitato uzas la t.n. "varmdoma principon". Bienetuloj uzas tiun principon por kreskigi tomatojn, sed la universitatuloj uzas ĝin por hejti akvon. La radioj de la suno konsistas el ondoj, kiel unue klarigis Izako Newton, kurtaĵ, mezlongaj kaj longaj ondoj. La kurtaĵ ondoj estas la ultraviolaj: ili malfacile penetras vitron; la longaj estas la transruĝaj, kaj ili preskaŭ ne povas penetri vitron. Inter la ultraviolaj kaj la transruĝaj estas la videblaj: ili facile trairas vitrajn fenestrojn, kaj hejtas la tomatojn aŭ la akvon, kiuj denove radias longajn ondojn. Ĉiuj varmaj aŭ eĉ varmetaj objektoj en la universo radias: ju pli varmaj, des pli kurtaĵ la radioj. Eĉ vi, kara legantino, radias longajn ondojn, la transruĝajn, se vi estas varmeta, kaj oni povas observi tiujn, eĉ se vi sidas en la plej densa mallumo, per taŭga aparato.

Nu, la tomatoj radias, sed la transruĝaj ondoj ne povas eskapi tra la vitro, kaj la tomatoj ne malvarmiĝas: ili kreskas kaj ruĝiĝas. En la akvovarmiga aparato de la Sidneja Universitato, vitra tubo entenas la akvon, kaj ĉirkaŭ tiu tubo oni provizas vakuo, similan al la vakuo en via termos. Alia vitra tubo entenas la vakuo, kaj ĝi malhelpas la eliron de la varmeo. La interna vitra tubo anstataŭas la kutiman kupran tubon en la akvovarmiga aparato. Oni devas nigri la internan tubon per nova tekniko.

La ĉefa malavantaĝo estas la granda kosto de la aparato. Oni ofte diras, ke la energio de la suno estas senpage havebla, ĝi estas ĉie, kaj ne malpurigas la atmosferon aŭ la marakvon. Efektive, benzino kaj keroseno estas senpage haveblaj. La kruda petrolo estas sub la tersurfaco, sed oni devas eltrovi la lokon, bori ŝakton, porti la krudan ĝis la distilejo, k.t.p., k.t.p.

Bedaŭrinde, ĝis hodiaŭ la kosto de energio el la suno estas multfoje pli alta ol tiu de la petrolo, kaj malpli facile uzebla. Oni povas eniri benzinejon ĉie en la antaŭurbo, kaj, se striko ne malhelpas, postuli "Plenigu la benzinujon", sed sunenergiejo, ankoraŭ ne ekzistas. Espereble la novaj aparatoj en la uni-

versitatoj provizos malmultekostan energion, sed kiel inĝeniero mi rajtas averti vin, ke novaj aparatoj kutime funkcias sufiĉe glate en la laboratorio inter lertaj sciencistoj kaj inĝenieroj, sed en la hejmo ofte paneas. Ni atendu kelkajn jarojn, ne retenante la elspiron.

—R. G. ROBERTSON.

KUN TREVOR STEELE AL BRAZILIO

(Vidu "A.E." Marto 1977, paĝo 79)

LA LASTA ETAPO

Brasilia. Ni alvenas unu tagon antaŭ la interkonsentita dato, devas do reiri la sekvantan tagon por serĉi Giuseppe Grattapaglia. Dum li atendas nin en la alvena salono, ni surprizas lin de malantaŭe.

La esperantigo de la urbonomo ne estas senproblema. La plej ofta formo estas "Brazilio", kiu povas konfuzi, ĉar kelkaj SAT-anoj sisteme uzas "-io" por landnomoj. Eble oni povus adopti "Braziljo", kiu cetera preskaŭ redonas la lokan prononcon.

Tri tagojn ni pasigas en la urbo, kies giganta arkitekturo impresas eĉ tiujn, kiujn ĝi ne imponas. La tri tagoj ne estas ripozperiodo; ni rapidas de unu butikoj al la venonta, de unu rendezuo al alia. Benzino kostas pli ol \$2 (aŭst.) por unu galono, la aŭtomobiloj de "Bona Espero" forte soifas, kaj ĉiu vojaĝo al la civilizacio longas minimume 500 km. Ĉe ĉiu vizito oni plensarĝas la aŭton kaj parolas kun kiel eble plej multaj aŭtoritatuloj, amikoj, helpantoj ktp.

La lasta veturo: Iom post la ĉefurbo la asfaltita ŝoseo finiĝas. Pli ol 200 km oni devas lukti kontraŭ malglataj surfacoj. La regiono ĵus ricevis pluvegon, do la jipo trenas sin tra koto, sed almenaŭ neniu polvo ĝenas. La pejzaĝo surprizas. Eble sub la influo de bildoj de la amazonaj ĝangaloj, mi ial atendas arbaregojn, sed vidas nur la ebenajojn de la plejparte nefekunda savano. Dise kreskas torditaj arboj, herboj kaj herbaĉoj, nur laŭ la multaj riveretoj oni vidas densajn kronitajn de palmbarboj. Kaj — ĉu miraĝo? — tiuj altaj arboj — jes vere, estas niaj hejmaj eŭkaliptoj! Ankaŭ la bestoj estas etskalaj, oni demandas sin, ĉu la ĉevaloj kapablas porti dikan homon. La plej interesa faceto de la pejzaĝo estas la konturoj de la montetoj, kiuj ekspensigas

pri iu verda Arizono. Ni trapasas tri vilaĝojn, senvorte. Por ni senmeritaj favoritoj de la sorto, la unua rigardo estas nedireble morna, kaj mi ne povas ne senti dankon, ke nia hejmo estas aliloke. Sed baldaŭ la tempopaso ebligas al ni juĝi pli objekte.

'Bona Espero': Ni deflankiĝas por la plej lasta etapo. Pro la lastaj pluvegoj ni ne povas veturi la tutan distancon. Felice nur unu ponto sur la ŝoseo estas detruita, kaj la kolonio disponas pri du aŭtoj. Ni malŝarĝas la jipon, balance kaj popaŝe trenas la multajn aferojn trans la ruino de la ponto, kaj ŝarĝas la 'Komb'ion'. Kaj fine la bonveniga ŝildo ". . . kie oni laboras sub la standardo de Esperanto". Ursula kaj la knaboj entuziasme salutas nin, kaj sur la tabulo estas skribite grandlitere: "Bonvenon. Trevor kaj Edita!"

— Trevor Steele.

AŬSTRALIA = KRONIKO

PERTH: Je la 27a de Marto, membroj de la Esperanto-Ligo aŭskultis du sonbendojn pretigitajn por la elementa kurso "Jen Nia Mondo" disaŭdigita de Radio 6NR. Poste nia libro-perantino, F-ino Hunt, elmontris stokon de libroj kiujn la Liganoj trafolumis kaj diskutis. Tiu-ĉi instigis la vendiĝon de diversaj libroj kiuj alie restadus en la perantina ŝranko.

La kunveno ĉe la Instruista Kolegio, Nedlands, je la 10-a de Aprilo koncentriĝis sur parolado de S-ro Howard rila ĉe al Nov-Gvineo. Komence li klarigis ke li vizitis ĝin nur unufoje, sed li pri-skrribis siajn spertojn dum unusemajna ekskurso antaŭ pluraj jaroj.

Li, kun kelkaj kamaradoj irisflugmaŝine al la vilaĝo "Mt. Hagen" kuŝant inter la montoj interne de Nov-Gvineo. Tiam sekis vojaĝo en la ĝangalon kie troviĝas bird-sekurejo starigita kun la financa helpo de Sir Edward Hallstrom. Laŭdire, tiu-ĉi promesis pluan donacon por evoluigi kaj subteni la sekurejon sed, pro lia morto, tio ne realiĝis. Tamen, multaj belegaj birdoj estis viditaj kaj la vojaĝantoj ĝuis bongustan "alfreskan" tagmanĝon en la ĝangalo.

La sekvintan tagon la 146-mejla aŭtobusa vojaĝo de Mt. Hagen al Goroko daŭris de la oka matene ĝis la sesa vespere. S-ro Howard priskribis la vojon laŭ la montdeklivoj, la indiĝencojn, iliajn kabanajn kun malgrandaj garden-terpecoj, ktp. Dumvojaĝe la vizitantoj haltis ĉe "Kundiawa" (Ĉimbu Distrikto) kie oni regalas ilin per luksa tagmanĝo.

Revene al Perth-aj aferoj, "Perry Lakes" estis la ejo por Lig-pikniko dimanĉon al 1-an de Majo. Kvankam la lagejoj suferis pro la senpluveco de la pasintaj monatoj, 17 gesamideanoj kaj ĝeamikoj ĉeestis. Bedaŭrinde komenciĝis pluveto kaj Ges. Einihovici bonkore invitis ilin al sia hejmo.

La Ligo lastatempe starigis konkurson inter lernejoj pri la desegno de afiŝoj por propagandi Esperanton. Kvankam cirkuleroj estis senditaj al ĉiuj altlernejoj kaj kolegioj, proponante premiojn estas granda bedaŭro ke ni ne ricevis eĉ unu respondon. —W.H.H.

● **MELBOURNE:** "La Nutrado" estis la titolo de prelego de nia multflanka Vic-Prezidanto Harold Beechey. Li priskribis multajn vitaminojn kaj informis en kiuj planĉoj ili troviĝas (9/5). Semajnon poste, S-ro H. Koppel parolis pri "Novaĵoj el Esperantujo".

Je 23/5 Prezidanto S. Kanaĉki montris memfaritajn filmojn dum sia vojaĝo tra Jugoslavio. La monatan amuzvesperon (30/5) gvidis S-ro K. Linton. Li daŭrigis sian serion pri vizito en Eŭropo. Svisujo estis la ĉefa temo, kiu inkludis grandiozajn montopejaĝojn kaj senspirigajn monto-ŝoseojn, fervojojn kaj bildojn pri kablo-vagonoj.

Je 6-a de junio S-ro H. Beechey parolis pri la signifo de tiu tago, la datreveno de la invado en 1944 de Normandio, en kiu li, deknaujarulo, partoprenis. Tre detale li povis priskribi kaj la preparckercadon kaj la entreprenon mem, inkluzive la veteron.

● **SYDNEY:** Nederlandano Franz ten Hagen, kiu vizitis nin kun edzino (18/4) priskribis laboron faritan de Esperantistoj en Nederlando. La lingvo estas instruata en ŝtatlernejoj; ĝi aperas, kun 4 aliaj lingvoj, en telefonejoj, kaj menuoj por "Wagon Lits, kaj la firmao "Thomas Cook" estas en Esperanto. Parolis ankaŭ S-ino ten Hagen, ĉefe pri virinaj aferoj.

D-ro Keith Bowling (2/5) parolis pri la plej grava nuklea reaktoro — la suno. Kvankam la suno elradias 4,000 tunojn da energio tage, estros fufiĉe por la venon-

taj 15,000,000,000 jaroj! Ĉia energio venas el la suno, karbo kaj oleo, kiel ankaŭ pluvo, vento, tajdoj. Oni trovis kiel utiligi ondojn por fari kunpremitan aeron, sed la politikistoj ne subvencias, ĉar ili kredas ke la karbo daŭros multajn jarojn. Sed pruviĝis ke ĉiuj fosilajg bru-lajoj estos foruzitaj ĝis la jaro 300.

David Gould, 9/5, montris filmon pri Nov-Zelando faritan de li mem en 1963 Dum nur 3 semajnoj, li vidis multon kaj spertis ĉian veteron. Wre Chandler, 16/5, kun bildoj kaj sonbendoj, parolis pri birdoj de la pluv-arbaro.

Parolantoj je 23/5 estis denove Ges-roj ten Hagen. Krom vizitantoj el Manly, ĉeestis Andy Kariks kaj S-ro Bernstein. Andy estas studento de la Akademio de S-ro I. Maddern. S-ro Bernstein el Wellington, Nov-Zelando eklernis Esperanton uzante la Slosilon por nur 2 pecoj antaŭ la milito, kaj vizitante la Esperanto-Klubon de Londono. Li trovis nian nomon en senkosta periodaĵo "This Week in Sydney". S-ro ten Hagen ekstudis Esperanton en 1931, gajnis diplomon kaj ĉeestis SAT-Kongreson en Stockholmo, 1933. Li tre aktivis en la laborista E-movado en Amsterdamo.

Kvizprogramo, sub gvidado de S-ino M. Chaldecott, kiu uzis demandojn el grandaj krucvortenigoj en la "Sydney Morning Herald", estis la programo de la 30-a de majo. Je la 6/6 okazis "Ronddiskuto" pri la temo "Kiu kaj kial ni estas?", sub gvidado de Tom Elliott. —M. Chaldecott.

● **MANLY:** S-ro Arthur Cocking daŭrigas sian instruadon de komencantoj ĉe la "Central Mission" ĉiujaude. George Thatcher instruas la progresintojn. Plaĉas al George ke aperis en "Telopeo" artikoloj de S-inoj Elsie Currie kaj Betty Cummins, kiuj lernis dum 3 jaroj.

En la Klubo de emeritaj civitanoj de Dee Why estas nun klaso kun 15 entuziasmaj studentoj. Dum la foresto de Betty Clemons en Bali, Ges-roj ten Hagen el Amsterdamo instruis la klason. —Edna Giles.

● **BRISBANE:** En la Greka Klubo (11/3), la "Modern Language Teacher Assoc." starigis vesperon nomitan "Discover Your World". "S-ro Al Grassby estis la ĉefparolanto. La celo estis prezenti la kulturojn de diversaj naciaj grupoj; ĉirkaŭ 650 partoprenis, inkluzive 17 anojn de la Brisbana E-Societo. Je 12/3, ĉe la Germana Klubo komitato starigis por prepari multkulturan konferencon. S-ro Gassby denove parolis kaj la E-Societo partoprenis la diskut-

don. Ray Ross partoprenis la Konferencon (16/17 de aprilo) kaj metis la Esperanto-vidpunkton al la diskut-grupo pri Etnikaj Lingvoj en elementaj-lernejoj. La fina rezulto estis ke deputitaro, kiu enhavis la italan kaj grekan konsulon, renkontis la Ministron pri Edukado kaj ŝajnas ke la plej atendeblaj lingvoj estos la greka, itala, germana kaj serbokroata.

Samvespere, raportisto de "Courier-Mail" telefonis kaj petis la opinion de la Esperanto-movado pri la enkonduko de la menciitaj lingvoj en la lernejojn. La sinteno de la E-Societo estis, ke la sola logika lingvo, krom la angla, speciale en elementaj lernejoj, estas Esperanto. Artikolo sekvis en "Courier-Mail".

La 1-an de junio, Winsome Greenhalgh kaj Ray Ross renkontis la Ministron pri Edukado, kiam ĉestis ankaŭ la estro pri Stata Edukado. Tre afable la ministro parolis kaj multe demandis dum 3/4 horo. Nia fina peto estis, ke oni konsideru Esperanton por la lasta jaro en elementaj lernejoj. Ŝajnas ke estos ŝanĝo pri lingvo-instruado kaj eble nia sugesto estos iom fruktodona; almenaŭ ni esperantistoj gajnis tiun impreson.

—Ray Ross.

NIA HISTORIO

N-ro 17 PIONIRAJ ESPERANTISTOJ DE MELBURNO (daŭrigo)

Frank A. Russell, kiu tiam loĝis en Queen's College, aliĝis al la klubo 7/9/1906 kaj estis ĝia sekretario en 1908. Li ankaŭ helpis pri sekretaria kaj biblioteka laboro en 1913.

Charles Whitehead Thonger (103 Drummond St., Carlton) aliĝis al la klubo je 7/4/1905, nur 2 monatojn post ĝia fondiĝo, kaj fariĝis sekretario en junio 1905, posteno kiun li tenis ankaŭ en 1906 kaj 1907. Li estis membro de la Zamenhofa Ligo (N-ro 11, 881).

William H. Vogt (79 Power St., Hawthorn) aliĝis al la klubo 8/12/1905. Lia numero, 12,941, kiel membro de la Zamenhofa Ligo, indikas, ke li eble jam estis Esperantisto en 1901. Li estis kompostisto ĉe la gazeto "AGE". Lia plej granda merito por Esperanto estis ke li varbis la junan Frank Banham, provajleganton por "AGE", al la Esperanto-movado en la fruaj dudekaj jaroj. Frank Banham fariĝis Esperanto-spertujo, kaj

redaktoro de niaj oficialaj organoj de 1929 ĝis sia morto en aŭgusto 1974, kvardek-kvin-jara valora servado.

Cedric F. White (77 Bourke St., Melbourne) aliĝis al la klubo je 7/12/1906, kaj estis ĝia Vic-Prezidanto en 1908. Ŝajne li foriris el Viktorio en 1908, por viziti Nov-Zelandon, kaj poste vojaĝis al Anglujo per la ŝipo "Suevic". Li verkis plurajn interesajn leterojn por "Australian Esperantist" de D-ro Barrington, el kiuj la unua (en la eldono Novembro 1908) menciis ke li renkontis la esperantistojn Hermann Ritz kaj S-inon Harcourt en Hobarto, kaj S-rojn Kornel kaj Dusart en Durban, Suda Afriko. Pluaj leteroj aperis en la eldonoj por januaro kaj februaro 1909, kiuj donis Esperanto-novajojn el Anglujo kaj Eŭropo. Fine, ni aŭdas pri li de-nove, 12 jarojn poste, kiam aperis lia nomo, C. F. White, Glasgow, Skotlando, kiel abonanto de "La Suda Kruco", en decembro, 1921.

Gerald Whiteford, Departemento pri Internaj Aferoj, Melbourne, estis membro de la Zamenhofa Ligo (N-ro 19, 294) kaj aliĝis al la klubo en 1907. Li sekvis John Booth (1905-1909) kiel Prezidanto de la klubo en 1910 kaj 1911, kaj li estis Vic-Prezidanto en 1912. Lia traduko Esperanten rilate konkurso pri la plano por Canberra aperis en "Esperanto" de U.E.A. kaj instigis al partopreno francan arkitekton Agache kiu gajnis la trian premion.

—I. D. Maddern.

POSTMILITA ANEKDOTO

En 1933, en Berlino, germana oficiro parolis al estra membro de la Brita Ambasado kaj faris la strangan rimarkon, ke la Britoj estas ĝentlemanoj, sed ke la francoj ne estas tiaj. Demandite, kion li volas diri, li klarigis:

"Vidu, iutage en 1920, kelkaj personoj de la Internacia Militara Kontrol-Komisiono, sub gvido de unu franca kaj unu brita oficiroj, venis al la kazerno, de kiu mi estis la komandanto. Ili diris, ke ili havas kaŭzon opinii, ke mi kaŝas aron da pafiloj malantaŭ brik-muro, kontraŭvene al la Paca-Traktaĵo.

Mi neis tion kaj donis mian honorvorton kiel germana oficiro, ke mi ne kaŝas iujn pafilojn en la kazerno.

Nu, via brita oficiro estis ĝentlemano; li akceptis mian honorvorton kaj foriris. Sed la franca oficiro ne estis ĝentlemano, li ne volis akcepti mian honorvorton. Li detruis la brikmuron kaj li forprenis miajn pafilojn . . .

—P. E. S.

PARADOKSO: "Kiel paradoksa estas la fakto, ke ankoraŭ duono de la homaro malsatas, dum la homaro posedas duoblan de la necesa kvanto da nutraĵoj? . . . La jara kvanto de la grenoj manĝataj de ratoj en Hindujo, ekzemple, povas pleniĝi ŝarĝvagonaron longan je 5.000 kilometroj." La rektoro de la Universitato de U.N. Hester en sia prelego tiel atentigis la neceson de serioza analizo pri perdo kaj de esploro pri reala metodo de efika distribuo. ("UN kaj NI" - 5).

La Ruĝa Maro

Iu avara, maljuna nobelo volis, ke Hogarth pentru por lia ŝtupĉjo bildon pri la deŝruo de la faraona armeo en la ruĝa maro. Li tiom marĉandis pri la prezo, ke Hogarth fine konsentis, far la laboron por la duono de ĝia vera valoro. Post du tagoj, je la surprizo de la nobelo, Hogarth anoncis, ke la pentraĵo estas farita. Kiam la kurteno estis forprenita, oni povis vidi nenion krom tutege ruĝ-kolorigitan kanvason.

"Dio mia!" ekkriis la avarulo. "Kion signifas tio? Mi mendis scenon pri la ruĝa maro!"

"Tie vi havas la ruĝan maron. . ." respondis la artisto.

"Sed kie estas la Izraelidoj?"

"Ili ĉiuj jam transiris . . ."

"Kaj kie estas la Egiptoj?"

"Ili ĉiuj dronis—"

—P. E. Schwerin.

Gramatike-

CIFERO. Skribsigno de nombroj. (arabaj 1, 2, 3, romanaj I, V, X)

NOMBRO: Unuo, aŭ aro da unuoj aŭ frakcioj. Ekzemple: five, four hundred and sixty two, mil ducent.

NUMERALO: Vorto uzata por indiki nombron. Ekzemple, bazaj aŭ kardinalaj numeraloj; unu, du, tri; ordaj numeraloj: unua, dua, tria.

NUMERO: Cifero aŭ numeralo montranta la vicon de iu objekto. Ekzemple, numero de paĝo, de seĝo, aŭ de periodaĵo.

ENTJERO: Iu nombro el la senfina vico: 1, 2, 3, aŭ -1, -2, aŭ -3.

FRAKCIO: La kvociento de du nombroj, kie la numeratoro estas dividita per la denominatoro. Ekzemple: ordinara: frakcio, aŭ decimala frakcio.

GAZETO: Perioda presajo de konstanta formo kaj prezo, prezentanta ĉiujn aktualaĵojn.

JURNALO: Ĉiutaga gazeto.

MAGAZINO: Perioda ĝenerala revuo, ordinare ilustrita kaj enhavanta artikolojn pri tre diversaj temoj.

REVUO: Perioda sufiĉe ampleksa presajo, speciale dediĉita al unu fako. Ekzemple: literatura, scienca, medicina, aŭ teatra revuo.

PROCEDO: Agmaniero aplikata por atingi difinitan rezulton, speciale farmetodo sekvata por fabriki, presi, foti, aŭ alimaniere fari ion.

PROCESO: Juĝafero, jure submetita al tribunalo; juĝa persekuto.

PROCEZO: Natura sinsekvo de fenomenoj disvolviganta sen efiko de ekstera forto, kaj rigardata en sia tuteco, iompostioma progresado.

PROCEDURO: Maniero laŭ kiu estas kondukataj la aferoj konforme kun la kutimo, statuto, regularo, aŭ leĝo.

—K. G. LINTON.

KOMITATO

Komitato estas aro da gravaj personoj, kiuj unuope povas nenion fari, sed kiuj kune povas, post longa diskuto, decidi, ke oni povas nenion fari, krom lasi la aferon al la Sekretario por konvena agado.

A: Kial vi aspektas tiel malĝoja, kara amiko?

B: Ho, ve mia fianĉino subite mortis.

A: Tio estas, kompreneble, granda malgajno por vi.

B: Certe, ke jes. Malgajno de kvindek mil markoj.

Aviadisto. Ĉu vi konas la faman sentencon: "Vidu Napolon kaj poste mortu".

Pasaĝero: Jes, mi bone konas tiun dirajon.

Aviadisto: Bone! Ni nun ŝvebas super Napolo kaj la motoro de nia aviadilo jam ne funkcias,

NEWS - DIGEST

SWISS ENTERPRISE: Swiss Esperantist Oliver Tzaut and his "Esperanto In The Schools" Committee have achieved remarkable success in the two years since their committee was formed in February 1975. Tzaut, a school-teacher, and a number of his colleagues started by sending a circular to many hundreds of people outlining the world language problem, and then drawing their readers' attention to the situation as it is in Switzerland today.

The letter ended by inviting financial assistance, and initially 45 people — mainly teachers who were sympathetic towards Esperanto but who did not themselves speak the international language — agreed to help in this way. Later 120 people agreed to participate in a monthly-donations scheme and in two years the Committee's kitty rose to \$8,900. Commenting on this, Oliver Tzaut said, "The greatest problem was to convince them that their sympathy was important, but their financial aid was much more useful!"

As a result, more than 1,500 Swiss school-children have been acquainted with Esperanto and it is now widely accepted among the general public as the solution to the language problem. The Committee is now using teachers' conferences to further sow the seed.

GREEN PASTURES: Coincidentally, the 64th International Esperanto Congress will be held in 1979 in Lucerne, Switzerland. The mayor of Lucerne, Dr. H. R. Meyer, will be Congress Patron.

EGYPTIAN ACTION: Two Egyptian Esperantists, Dr. Tadres Megalli and Ahmed Khadr, are working to start an Esperanto course for children in Alexandria.

UEA AT THE ECC: The Universal Esperanto Association took steps to make its voice heard at a special Congress of the European Community in May. It was the Third European Congress for

Information-Systems and Networks. Three days were given over to the theme: How Can the Language Barriers be conquered? It is not surprising that UEA made a point of getting in touch with the Common Market's conference organisers.

PUBLISHERS MERGE: The two Esperanto publishing houses "Stafeto" and "Eldonejo TK Torben Kehlet" have joined forces to produce high-quality books in the international language from Denmark. During the quarter century prior to this merger, "Stafeto" had published almost ninety titles solely in Esperanto.

LISTEN TO THIS: According to a report in "Sueddeutsche Zeitung" it is possible for West Germans to tune in to thirteen hours of Esperanto airplay every week.

DIPLOMAS DISTRIBUTED: Eleven Italian students at the G. R. Carli State High School in Trieste received their diplomas at an award night earlier this year for successfully completing the 1976 Esperanto course run in their high school.

NEIGHBOURLY IDEA: The Hamburg Esperanto Society officially opened the doors of its Esperanto House on March 24th. As well as inviting the usual functionaries to their opening, the Esperanto Society's members also invited in their neighbours from the adjoining buildings and along the street. The Hamburg Esperanto House is located at 15 Vehrenkampstrasse, Hamburg-Langenholtz.

UNIVERSITY COURSE: Budapest's Eotvos-Lorand University still has places in the Esperanto Course of Professor I. Szerdahelyi. The course lasts five years and foreign applicants may join the course proper after successfully completing a one-year course in the Hungarian language and passing the University's entrance exam.

CREDITS: This issue to UEA, IEMW and Esperanto News Service "Pilo Press".

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Kasisto/Sekretario: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 156 (236)

MELBOURNE

Julio-Aŭgusto, 1977

TRA LA KONGRESA SEZONO

Julio-Aŭgusto estas feria tempo en la Norda Hemisfero. Ĝi estas ankaŭ kongresa tempo por feriantaj esperantistoj. Jen raportoj ricevitaj el diversaj fontoj, inkluzive de aŭstraliaj esperantistoj, kiuj ĉeestis:

En la islanda ĉefurbo **REJKJAVIK** okazis de la 30. 7. ĝis 6. 8. 1977 la **62-a Universala Kongreso de Esperanto**.

En la ĉeesto de la ŝtatprezidanto, S-ro Kristjan Eldjarn, la alta protektanto de la kongreso, kaj de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, senegalano Amadou-Mahtar M'Bow, UEA-Prezidanto D-ro Humphrey Tonkin malfermis la kongreson la 31-an de julio. Ĉeestis pli ol 1000 kongresanoj el kvardeko da landoj. La kulturministro V. Hjalmarsson, nome de la islanda registaro, bonvenigis la kongresanojn en Esperanto. Ankaŭ la urbestro de Rejkjavik, S-ro B. Isleifur, salutis en Esperanto.

La enkondukan paroladon faris S-ro Amadou-Mahtar M'Bow. Li parolis france, sed la ĉeestantoj ricevis tradukon en Esperanto. Li parolis pri la klopodoj de UNESKO per internacia konvencio nove difini la "rajton je komunikado". Sur la kampo de internacia komunikado la lingva demando ludas gravan rolon kaj la Ĝenerala Direktoro de UNESKO rekonis, ke la Universala Kongreso de Esperanto surpris sur sin la taskon pritrakti la lingvajn aspektojn de komunikado.

La aŭstralia ambasadoro ĉe UNO, S-ano Ralph Harry, faris enkondukan prelegon pri la kongresa temo. "La rajto je komunikado". "Ni anoj de la Esperanto-movado", diris Ralph Harry,

"scias la detruajn rezultojn de la limigo de komunikado. Esperantistoj en multaj landoj estis malhelpataj per cenzuro, per tuta malpermeso kaj per la bruligo de iliaj libroj. Multaj suferis malliberigon, torturon, eĉ martiran morton. Kaj tamen Esperanto ne estas minaco. Ĝi estas 'dangera lingvo' nur por diktatoroj, ŝovinistoj kaj reakciuloj".

Dum la inaŭgura ceremonio ĉeestis diplomataj reprezentantoj el 12 landoj, inkluzive el Ĉinio, Sovetunio kaj Usono. La solena malfermo de la kongreso okazis la saman posttagmezon, dum kiu salutis la reprezentantoj de la landaj asocioj. Kiel unua salutis Prof. "Robbie" Robertson, en la nomo de Aŭstralia E-Asocio. La festparoladon faris UEA-Prezidanto Humphrey Tonkin.

La Pola Radio surbendigis multajn erojn pri la kongreso kaj elsendis sonraportojn dum la sekvintaj tagoj. En la kadro de ĝia "Esperanto-Ekspreso" eŭropaj aŭskultantoj aŭdis ekstraktojn el la paroladoj de D-ro H. Tonkin, de la islanda kulturministro, de Ralph Harry kaj salutojn de landaj reprezentantoj.

Okazis novelekto de la UEA-Estraro. D-ro H. Tonkin reelektiĝis kiel prezidanto de UEA. Vicprezidantoj fariĝis Magistro W. Auld (Britujo) kaj D-ro C. Stop-Bowitz (Norvegio). La ĝisnuna vicprezidanto, D-ro Werner Bormann (Germanio) elektiĝis kiel nova ĝenerala sekretario. Pluaj estraranoj fariĝis S-ino U. Grattapaglia (Brazilo), D-rino F. Szabo-Felso (Hungario), S-ro G. Maertens (Belgio) kaj S-ro A. Pettyn (Pollando).

Inter la 26-a kaj 29-a de julio okazis en la Universitato de **STIRLING** (Skotlando) la oficiala **antaŭkongreso de la 62-a ...UK**. Gesinjoroj A. Einihovici (Perth) partoprenis kaj D-ro Einihovici raportis jene:

"La antaŭkongreso en Stirlingo, ĉefe organizita de William Auld, estis brila ekzemplo de perfekta organizado. Mi neniam vidis unu personon kiu posedas tiom da kapablo, energio, takto kaj fizika belaspekto. Ĉiuj virinoj enamigis, kaj ĉiuj viroj admiris kaj enviis lin. La Universitato, kiu gastigis la antaŭkongreson, situas en belega parto for de la urbo kaj prezentas veran juvelon".

En la kadro de la kongreso prelegis i.a. Marjorie Boulton, Albert Goodheir kaj William Auld.

En la bavara urbo **AŬGSBURG** okazis de la 30-a julio ĝis 5-a aŭg. la **50-a SAT-kongreso**. 300 kongresanoj el 18 landoj kolektiĝis en la festsalono de la Urba Domo, kiam urbestro Prof. Fischer malfermis la kongreson kaj poste akceptis reprezentantojn de la movado. Nome de la frakcio de la Socialdemokrata Partio en la urba konsilantaro salutis en Esperanto, Erich Sandner. Transdonis salutojn ankaŭ reprezentantoj de la sindikata movado, de la Germana E-Asocio (Hermann Behrmann), de la Germana E-Instituto (Gerald Tucker) kaj nome de UEA la en Aŭstralio konata Stefan McGill.

La malfermon ĉestis reprezentantoj de la Bavara Televido, kiu la septantan tagon elsendis mallongan raporton.

Laŭ la oficiala SAT-gazetarservo, la kongresanoj trapasis en harmonia etoso belegan semajnon, kiu estis pleningita ne nur de kunsidoj, sed ankaŭ de 5 interesaj prelegoj kaj 2 ekskursoj. Tutaga ekskurso kondukis al la Bavaraj Alpoj. Ekskurso al la lupolregiono finiĝis en Pfaffenhofen, kie la loka E-grupo aranĝis festprogramon kaj salutparolis la bavara ministro por agrikulturo.

La pariza Esperanto-teatro **TESPA** prezentis kvinaktan dramon "La Justuloj" de A. Camus, kiu rikoltis merititan aplaudon. La venetosomera SAT-kongreso okazos pli frue ol kutime, de la 13-a ĝis 20-a de junio 1978 en la urbo Lectour, en sudorienta Francio.

En **EDINBURGO** okazis, 23-a ĝis 30-a de julio 1977, la **29-a Internacia Kongreso de la Kristana E-ista Ligo Internacia (KELI)**. 90 personoj partoprenis la kongreson, kiu okazis en ejo de la Edinburqa universitato. Diservo okazis en la ĉefa preĝejo de Skotlando, la Katedralo Sankta Giles, kie antaŭ 50 jaroj estis solene anoncita la baldaŭa eldono de la tuta Biblio en Esperanto.

La jarkunveno de **KELI** decidis ne aranĝi propran kongreson en 1978, sed rekomendi al siaj membroj aliĝi al la 63-a Universala Kongreso en Varna (Bulgario), kie okazos **KELI-fakkunveno**.

Kongresanoj partoprenis grandiozan kulturen vesperon en la universitato de najbara urbo Stirling, kie okazin la oficiala antaŭkongreso de UEA. Sub gvido de William Auld prezentis sin skotaj arĥistoj per dancoj kaj muziko kaj la konata E-poetino Marjorie Boulton deklamis proprajn poemojn.

La 11-a Internacia Konferenco de la Internacia Ligo de E-Instruistoj (ILEI) okazis en **LUKSEMBURGO**, de la 14-a ĝis 24-a de julio, 1977. Partoprenantoj el 13 landoj kunvenis en Hotelo "Holiday Inn". La konferenco akceptis ampleksan rezolucion, el kiu ni i.a. citu:

peti la edukinstancojn de Luksemburgio eksperimente starigi kurson en almenaŭ unu klaso de iu elementa lernejo,

peti la urbestron de la urbo Esch (la dua pli granda urbo de la lando) eksperimente instrui Esperanton en unu klaso de elementa lernejo.

Konferencanoj veturis per propraj aŭtomobiloj, ornamitaj per verdaj steloj, al la urbo Esch, por viziti modernan lernejon por korpe kaj mense malhelpitaj infanoj kaj plenkreskuloj. La direktoroj de la lernejo regalas la konferencanojn per refreŝigaĵoj. En la urbdomo la urbestro akceptis la vizitantojn kaj regalas ilin per ĉampanjo kaj ĉiuj sinjorinoj ricevis rozkolorajn diantojn. Okazis ankaŭ vizito ĉe la loka gazeto "Tageblatt" en kies sabata eldono aperis longa artikolo pri Esperanto "Ideo ĉirkaŭis la mondon".

Konferencanoj ankaŭ surbendigis longan intervjuon al la Luksemburga Televido. I.a. S-ro Ingusz parolis en Esperanto pri la Budapeŝta Universitato, kie oni oficiale instruas Esperanton. Lian prelegon bonege tradukis S-ro Turin en la francon lingvon.

La jubilea (25-a) kongreso de la **Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko** okazis en la Georgetown-Universitato de **WASHINGTON**. La usona ŝtat-prezidanto Jimmy Carter sendis salutojn al la kongreso. Tio estas la unua fojo en la historio de la Esperanto-movado de Usono, ke salutoj venis al Esperanto-kongreso el la 'Blanka Domo'.

LASTA ALVOKO

Ĉu vi ŝatus gajni senkoston, flugbileton de Melbourne al Launceston kaj revene, por partopreni la 21-an Aŭstralian E-Kongreson? Se jes, verku Eseon pri la

temo.

**"KIEL REAKTIVIGI NE PLU
AKTIVAĴN ESPERANTISTOJN"**

Sendu vian eseon, ĝis la 15-a de oktobro 1977 al la adreso "ESPERANTO", Box 2122 T., G.P.O. Melbourne, 3001.

**21st AUSTRALIAN
ESPERANTO CONGRESS**

Jan. 2-8, 1978 — Launceston, Tas.

Mail your Congress Fee \$13 (Pensioners, Students \$7.50) to the Congress Treasurer, Mr. Mac Le Fevre, 22 Belle Vue Avenue, Launceston, 7250. Add \$10 for Room Deposit at "Tasmanian College of Advanced Education" and enclose a stamped addressed envelope for your receipt.

Sixth List of Congress Members:

70. Mr. E. C. Tronerud, Tweed Heads, N.S.W.
71. Mrs. B. Frame, Sydney.
72. Mr. D. E. Guy, Rockhampton, Q.
73. Mrs. P. Guy, Rockhampton, Q.
74. Miss D. Hasluck, Sydney.

State Distribution: N.S.W. 24; Victoria 22; Queensland 11; Tasmania 9; Western Australia 5; Australian Capital Territory 2; New Zealand 1.

From 28 Dec., 1977 to 2 Jan., 1978, a camp for young Esperantists will be organized near Launceston. Transport from the airport to the camp and afterwards to the Congress will be provided.

All-inclusive cost for participation will be only \$25. For registration mail \$10 deposit to Miss Edith Gibson, P.O. Box 638, Launceston, 7250.

**AŬSTRALIA=
=KRONIKO**

● **PERTH:** Je la 24a de Aprilo, la ĉefa amuzajo dum la kunveno ĉe Nederlands estis la elmonro de lumbildoj, kiujn la diversaj membroj klarigis Esperantlingve. Poste la Liganoj ekzercis sin per vortkonkursoj aranĝitaj de F-ino Olive Hunt, kaj per legado kaj traduko.

La 8an de Junio, S-ro Jack Hawks estris la starigon de diskutoj kun interpretistoj. La membroj dividiĝis en grupojn. Ĉiu grupo konsistis el tri personoj el kiuj unu parolis nur la Anglan

lingvon (almenaŭ provizore), unu parolis nur la Esperantan kaj la tria (kiu estis dulingva) rolis kiel interpretisto. Tio estas ne nur helpema kaj interesa ekzercado sed ankaŭ ebligas al komencantoj, aŭ ne-esperantistaj vizitantoj, kompreni kaj eĉ partopreni la diskutadon. La vespero daŭris kun legado kaj traduko.

Dudek Liganoj kuniĝis ĉe S-ino Threlfall dimanĉon la 12an de Junio inter la 11a matene kaj la 5a posttagmeze laŭplaĉe. Ili distriĝis per muziko, lumbildoj kaj babilado. La okazo estis tiel ĝuinda ke estas decidite ripeti ĝin ĉe Ges.. Dean venontmonate.

La elementa kurso. "Ĝen nia mondo" komenciĝis ĉe radio-stacio 6NR je la 31a de Majo. Pro la multeco da petoj ricevitaj telefone de la radio-stacio oni ripetis la unuan lecionon la postan semajnon. Dumtempe ni spertas malfacilaĵojn por satigi la petojn por la kurs-libroj. Ducent sesdek kvar jam vendiĝis kaj ni atendas la alvenon de plua kvanto el Anglujo.

La radio-kurso estas ne pli ol elementa kurso kaj estas esperinde, ke multaj el la aŭskultantoj decidis daŭrigi la studadon de la lingvo kaj aniĝi al la Esperanto-Ligo.

—W. H. H.

(La supra raporto estas la lasta verkita de S-ro W. H. Howard antaŭ ol li mortis.)

● **MELBOURNE:** S-ino F. Koppel, 20/6 gvidis aprezon pri "Vole, Novele" (de R. Schwartz), al kiu kontribuis ankaŭ S-ino K. Augunas kaj S-ro H. Koppel. Poste klubanoj gratulis kaj regalis S-ron H. M. Cohen okaze de ties 75-a naskiĝtago.

Speciala jarmeza programo okazis je 27-a de junio. "Mia Hobio" estis la temo de la pluraj trafaj paroladetoj. La premion por la plej interesa hobiaĵo gajnis S-ro Errol Chick ("Moderna Komunikado"). Li ankaŭ gajnis la premion por la plej bona parolado en angla lingvo. La premion por la plej bona parolado en Esperanto gajnis Pastro J. Midgley ("Kolektado kaj klasifo de informo"). S-ino M. Frogley entuziasme rakontis pri sia ĝarden-hobio, S-ro H. M. Cohen priskribis kaj montris la fabrikadon de ŝuoj por malnormalaj piedoj, S-ro N. Butkunas rakontis pri "Multflanka okupado de emerito". Prezidis la vesperon S-ro Don Pescod (de la Malvern grupo) per sia kutima kapablo kaj takto.

"Unua Helpe" estis la temo de prelego de S-ro H. Beechey (4/7). Ĉiintente la "Orajn Regulojn", li montris ŝranketon, kiun li mem konstruis kaj pleniĝis

per multaj helpiloj. Fine li demonstris plurflankan aplikadon de la sukuro. Kunlaboris kiel "akcident-viktimo" S-ro H. Koppel.

● **MANLY:** "Ĉiuj kvar klasoj, tiuj de la emeritoj de Chatswood, Sydney kaj Dee Why, kaj la klaso en la Vesper-Lernejo de Manly, bone progresas.

Je 22/7 S-ro ten Hagen, el Amsterdamo, prelegis por la konversacia klaso, pri sia rondveturo en Aŭstralio. Vidu aliloke detalan priskribon.

—Edna Giles.

● **SYDNEY:** 27/6 Les Scott el Manly distris per buŝojenoj—entute li posedas 11. Post priskribo de la historio de tiu muzikilo, konata en Ĉinio preskaŭ 3000 jarojn a.K., li rakontis plurajn anekdotojn pri uzintoj pli modernaj, inklude unu vojaĝanton al la luno. Konkluda ludado malkaŝis ĝiajn multvariajn eblecojn.

4/7 Wre Chandler montris la poezian arton de Tim Timmins rilate ties verkadon post la Pacifika Kongreso en Melbourne, kaj Volo Gueltling, jus reveninte el Hamburgo, parolis pri la Esperanto-Societo tie, antaŭ ol komenciĝis 3-tema rond-diskuto: "Ĉu en Esperanto eldoniĝu malgentilaj libroj?", "Ĉu libereco sen respondecado estas revo?" "Ĉu la nuntempa lerneja instruistemo estas bona aŭ male?". Tom Elliott menciis malfacilaĵojn ĉe la Doganejo rilate kelkajn librojn dubinde valorajn.

11/7 Oni trovis bonvena artikolon en gazeto ("Inside Information") eldonata por la Eduka Departamento de N.S.K. La tri paĝojn da informo sub la titolo "Esperanto por Infanoj" verkis la estroj de du lernejoj en Dorrigo. Samvespere parolis S-ro Jim Harwood pri "Uranio—jes aŭ ne." Li emfazis la bezonon por nova fonto de energio kaj klarigis la avantaĝojn kaj malavantaĝojn koncerne ekspluatadon de Uranio, el kio ŝajne venis la konstato, ke restas solvenda la grava problemo prizorgi ties postlasaĵojn.

—M. Chaldecott.

● **BRISBANE:** Momente nia societo estas preskaŭ senhejma. Martin Chambers suferis pro fajro ĉe la ĉefelektra ŝaltotabulo; rezulte, ne estas elektra povo. La konstruaĵo mem ne multe estas difektita. Per uzado de kerosenaj lampoj mi instruas la du klasojn por komencantoj, sed ne estas sufiĉe da spaco por la tuta grupo. La ĝeno ne daŭros dum pli ol du/tri semajnoj, espereble. — Ray Ross (Laŭ raporteto ricevita komence de julio.)

W. M. HOWARD MORTIS



Kun granda bedaŭro ni raportas, ke la 30an de junio mortis W. H. (Bill) Howard, subite, sed tute trankvile, ĉe sia hejmo, en la aĝo de 67 jaroj.

Li naskiĝis en Mee-katharra, Okcidenta Aŭstralio, kaj aliĝis al la Stata Servo en 1926. Kiam li emeritiĝis, antaŭ du jaroj, li estis jam de 15 jaroj estro de la fako pri transportado (angle: Commissioner of Transport). Efektive, en ĵurnala raporto pri lia morto oni aludis pri li kiel "Sinjoro Transportado".

Li aliĝis al la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio en 1962, jam lerninte la lingvon aŭtodidakte, sed daŭrigis la studadon en klasoj de la Ligo. En Decembro, 1965, li fariĝis sekretario de la Ligo, en kiu funkcio li estis tiel ege kompetenta, ke oni ŝanĝis la statuton de la Ligo — kiu limigis oficperiodon de komitatanoj al du jaroj—por ke li povu daŭre teni tiun oficon.

Dum la 17a Kongreso de A.E.A. en Perth, 1970, S-ro Howard fariĝis vicprezidanto de A.E.A., eksigante el tiu ofico du jarojn poste. Pri lia rolo en tiu kongreso la "A.E." raportis: "Vicprezidanto 'Bill' Howard, ne nur gvidadon, sed, laŭ ĉiu senco de la esprimo 'Giganto' de la 17a Kongreso" — laŭdo, kiun ĉiu partopreninto certe ehus.

Li estis ne nur ege kompetenta en administraj sferoj, kun abunda energio kaj laboremo — pri kio atestas la dikaj arhivoj, kiujn li postlasis, sed ankaŭ homo aparte bonhumora kaj varilerta.

Homo tre okupata, eĉ post la emeritiĝo, li tamen trovis tempon por verki artikolojn por "La Nigra Cigno" kaj klubraportojn por "A.E.". Kun kvazaŭ-profesia lerto li desegnis reklamafiŝojn por niaj iniciatoj. Lia okupateco ne malhelpis, ke li ĉeestu ĉiujn klubkunvenojn kiam li estis en la urbo. Tute tipe, nur unu-du tagojn antaŭ lia morto, komitatoj ricevis de li detalajn proponojn por la plibonigo de klubprogramoj.

Longe ni memoros lian humanecon, lian bonkoran helpemon, lian tutan mankon de memfiero.

Al lia amata edzino, Sue, ni sincere kondolencas.

—R. McG.

JESSIE FELDMAYR

La 29-an de julio mortis en Sidnejo S-ro Jessie Feldmayr, vidvino de S-ro A. Feldmayr. La tuta familio Feldmayr multe helpis, finance, praktike kaj morale, dum la fondo de la Sidneja Esperantodomo en Redfern. Ili donis bonan instigon al aliaj familioj fari same.

Niaj profundaj kondolencoj iras al la du filinoj.

—John Matasin.

NOVAĴOJ EL NOV-ZELANDO

La 43-a Kongreso de la Nov-Zelanda E-Asocio okazos komence de januaro en la Universitato McMaster en Palmerston North (Norda Insulo). Aŭstraliaj esperantistoj estos bonvenaj kaj ne pagos kongreskotizon. Por rezervi ĉambron en la Universitato sendu \$10 (NZ) al New Zealand Esperanto-Association, P.O. Box 330, Wellington 1.

La 42-a Kongreso, kiu okazis en januaro 1977 en Auckland, kun partopreno de 7 aŭstraliaj esperantistoj, rezultis en profito de \$867.06. La N.Z. E-Asocio decidis dediĉi grandan parton de la profito al vasta reklamado.

S-ro David McGill, multjara kaj multmerita esperantisto, foriris al Japanujo la 15-an de julio por eniri Budhanan monaĥejon.

En majo neatendita vizitanto al la Wellingtona Klubo estis S-ro Barry Newman, raportisto de "The Wall Street Journal". Li atente observis la agadon en la klubejo kaj la postan tagon intervjuis Majoron H. W. R. Petersen, redaktoron de "N.Z. Esperantisto" en ties hejmo pri ĉiuj facetoj de la movado kaj lingvo.

En julio "La Rondo" en Wellington konkuris kontraŭ la aĉa vetero ne tre sukcese! Tamen, la kuraĝa grupo, kiu ĉeestis, plene ĝuis la prezentadon per ronbendo de la sciencfikcia novelo de H. G. Wells, tradukita de Ralph Dearnley kaj aranĝita kaj elparolita de Daĉjo McGill.

TERURA ERARO

Mark Twain ŝatis rakonti kortuŝan historion pri sia jun-aĝo. Ŝajnas, ke laŭ tiu rakonto li naskiĝis ĝemelo. Li kaj ĝemelo, aspektis tiom simile, ke neniu —eĉ ne ila patrino— povis aparte distingi ilin.

Iutage, kiam la flegistino banis ilin, unu el ili eklitis en la kan-kuvo kaj dronis. Neniu iam sciis, kiu ĝemelo dronis.

"Kaj tio", diris Mark Twain, "kaŭzis la tragedion. Ciu pensis, ke mi estas tu, kiu travivis; sed mi ne estas tiu; estis mia frato, kiu vivis. Mi estas tiu, kiu dronis"

—P. E. Schwerin

ROND-VETURO EN AŬSTRALIO

Kiel gastoj en Aŭstralio, ni estis petitaj raportoj pri kvarsemajna aŭtobusvojaĝo tra granda parto de Aŭstralio. Nia grupo ne tute okupis ĉiujn sidlokojn (42), sed tio montriĝis bonŝanca. De Sidnejo ni ekiris la 13-an de junio kaj atingis Coffs Harbour antaŭ krepusko, kio favoris por starigi la tendojn. La vespermanĝo estis bone kaj rapide preparita de kuiristino, kiu ĉeestis la tutan vojaĝon kaj havis je sia dispoŝo veturantan kuirejon ligitan al nia aŭtobuso.

La dua tago kondukis nin al la Ora Marbordo: bela strando, sen homoj, ĉar frupesere ni alvenis: Luksa butikcentro estis preta enspezi oron aŭ monpaperon. Kampoj da sukerkano multajn kilometrojn akompanis nin. La vetero estis belega. Ni pasis simbolan pordegon inter N.S.K. kaj Kvinslando. Ĉe bieno kun kolosa reklam-ananaso, ni vidis diversajn tropikajn fruktojn: zingibrojn, ananasojn, avokadojn, bananojn, kustardpomojn, pasifruktojn (bot. grenadilojn), kiujn ni neniam antaŭe vidis kreskantaj.

La kvaran tagon ni atingis Rockhampton kaj Mackay, kaj pasis la tropikan linion, kion ni konstatis pro ŝtona monumento. Ni konstatis ŝanĝon de la vetero. Ni estis proksime de la koral-insuloj, restis 2 tagojn sur South Molle, alian tagon sur Daydream-insulo, Green Island kaj Hayman-Insulo. En boatoj kun vitraj karenoj ni povis vidi kio vivas en la koralrifoj. En subakva observatorio ni vidis fiŝojn kaj ceterajn organismojn, tute liberajn. Estis ĝuindaj tagoj.

La ceterajn tagojn ni pasis Cairns, Georgetown, Normanton, monton Isa, lokon en kiu oni elterigas ferercon. Renner Springs, Katherine Gorge, Darwin sekvis. Tiu urbo atingis tutmondan atenton pro ciklono, kiu, kristnaskon 1974, detruis grandparte la urbon. Parte ĝi estas rekonstruita. La distancoj estas longaj, vojoj el ruĝa sablo kaj malgrandparte bitumitaj. La indiĝenoj okaze nomas sin "popolo de la ruĝa tero".

De Darwin ni veturis al Centra Aŭstralio: Alice Springs (kie ni ĝuis naturvarman banejon), la Olgas, Ayers Rock. Post tio ni estis en Coober Pedy, la opalurbo. Subtere oni bonvenigis nin, klarigis la akiron de la opaloj kaj la

avantaĝojn logi subtere: somere ne tro varme, vintre ne tro malvarme. Subtere ni vidis modelan loĝejon, eĉ preĝejon. Tra Mildura ni daŭrigis al Sidnejo pasante la famajn Blujn Montojn.

La pasaĝeroj konsistis el junaj kaj pli ol mezaĝaj personoj. Niaj spertoj pri tendoj estis de antaŭ pli ol 20 jaroj. Sed sen peto niaflanke oni helpis nin. Ni spertis malvarmajn noktojn, ricepe en la dezerta centra Aŭstralio. Lacegaj kaj malpuraj ni finis la vojaĝon. Amikoj demandis nin ĉu ni estis kontentaj. Jes, ni estis. Ne por ripeti, sed ĝi vidigis Aŭstralion al ni multe pli intensa ol restado en granda urbo povus fari.

Geedzoj ten Hagen, el Amsterdamo.

MIA ESPERANTISTA VIVO de K. G. LINTON

En majo, 1931, mi legis artikolon pri Esperanto en la literatura suplemento de la melburna "Age". Mi poste eltrovis, ke Reg Banham verkis tiun artikolon, kiu logis min inter la fratanaron. Kiam mi legis la nomon, Esperanto, mi jam rekonis, ke temas pri la Internacia Lingvo, kio pruvas, ke mi havis antaŭian scion pri la lingvo, sed kia ĝi estis, mi ne memoras. Ĉe la malsupro de la sama paĝo en la ĵurnalo aperis reklamo: "Rawson's Bookshop: All Esperanto Books in stock".

Baldaŭ poste mi vizitis Roy Rawson en lia butikio, sed mi ne sciis, ke li estas sekretario de la Melburna Esperanto-Klubo kiel la nuna Melburna Esperanto-Societo tiam nomiĝis. Mi aĉetis "The Course in Esperanto" far L. N. M. Newell, kaj la Edinburgan Vortaron far John Warden.

Mia nazo malofte eliĝis el tiu libro dum tri semajnoj, ĝis mi tute tralegis kaj denove vizitis Roy Rawson, kaj demandis, ĉu li havas librojn por progresintoj, sed li ne kredis, ke mi mastris tiun libron, ĝis li elprenis libron de sur la breto kaj elprovis min. Eĉ tiam li apenaŭ povis kredi, ke iu povas mastri tiun libron dum tri semajnoj. Mi ne diras tion por fanfaroni, ĉar mi firme kredas, ke iu ajn povas fari la saman. Nur necesas, ke li aŭ ŝi posedu la saman entuziasmon kiel mi.

Je mia dua vizito li vendis al mi "Esperanto — Grammar and Commentary" far George Cox, sed kiam mi vizitis la trian fojon post pluaj ses semajnoj, li diris, ke li povas nenion plu fari por mi, krom rekomendi, ke mi vizitu la Melburnan Esperanto-Klubon, kiu tiutempe kunvenis en la Aŭstralia Preĝejo en la "State Theatre Building" en Russell strato.

Mi aliĝis al a klaso de F-ino Merle Cruickshank, kie mi renkontis Allan Turner, kiu logis proksime de mia domo, eble duonmejlon for. Baldaŭ poste ni kutimis kune promeni ĉiun dimanĉan matenon, parolante pri ĉio, kion ni povis vidi. Se unu el ni ne sciis a necesan vorton, la alia ĝin provizis, sed, se ambaŭ ne sciis, ni devis konsulti la vortaron, kiun ni portis en la poŝo. Sep monatojn post kiam mi komencis studi, mi skribis mian unuan leteron al rusa korespondanto, kiun mi tenis ĝis 1937, kiam Stalin malpermesis Esperanton.

Tiel ni tre rapide progresis, kaj en novembro, 1932, ni ambaŭ gajnis kun honoro nian elementan diplomon, kiu tiutempe estis kondukita far la Pyke-Memoriga Fonduso. S-ro Pyke ĵus lastatempe mortis, kiam mi aliĝis al la melburna klubo, sed Allan bone lin konis, kiel ankaŭ Marsh Cohen, kiu ankoraŭ estas membro. Roy Rawson estis sekretario de la Fonduso, kaj ankaŭ melburna delegito por Universala Esperanto-Asocio.

Ni deziris provi la sekundaran diplomon, kiu estis kondukita far William Drummond, kiel reprezentanto de la Brita Esperantista Asocio, sed ni devis atendi ĝis junio, 1933.

En junio de la sekvinta jaro, Allan Turner kaj mi gajnis la Diplomon de B.E.A. kun honoro.

En 1934 mi abonis tiun famekonatan revuon, "Literatura Mondo", kaj en 1935, mi aliĝis al Universala Esperanto-Asocio. En 1939 eksplodis la milito, kaj mi varbiĝis en la Reĝa Aviada Korpuso, kaj ne revenis al Melburno ĝis Decembro, 1945, kaj revizitis la Melburnan Klubon en februaro 1946, kiam la prezidanto, Bill Drummond, petis min prelegi pri miaj aventuroj en Novgvineo dum la milito. La membroj tiel bone akceptis tiujn prelegojn, ke mi devis ripete prelegi pri la sama temo. Tiutempe Bill Drummond konsilis al mi verki libron, sed mi nur ridis pri tio, ĉar mi ne kredis, ke mi kapablas fari tion, sed io alia poste ŝanĝis tiun sintenon.

En la jaro 1947 mi renkontis D-ron Fred Williams, al kiu mi ofte skribis, kiam li estis misiisto en Novgvineo antaŭ la milito, kaj en la jaro 1948 alvenis en Melburno Herbert Koppel, aŭstro, kiu elmigris al Kanado, kaj poste al Aŭstralio. Surprizis lin, ke A.E.A. ne okazigis kongreson de post la Sesa en Perto en la jaro 1929, kaj li tuj agitis la melburnanojn tiucele, kaj rezulte li organizis la Sepan, kiu okazis en januaro, 1950. Mi estis unu el la unuaj, kiuj li varbis en tiun komitaton.

Tiu kongreso okazis en Melburno kun granda sukceso: Elektiĝis prezidanto, D-ro Cyrus John Caldera, kaj elektiĝis sekretario Herbert Koppel. Tiuj du homoj, kune kun Reg Banham, kaj Len Newell, kiu poste alvenis en Aŭstralio, plej multe influis mian Esperantistan vivon, kaj tiu kongreso markis la komencon de la dua ĉapitro de la rakonto (daŭrigota)

RECENZOJ

BODIL KAJ LA BANDO de Eva Hemmer Hansen. El la dana lingvo tradukis Gudrun Riisberg. Dansk Esperanto Forlag, Aabyhoj, 1976. Aŭstralia prezo \$3.25. Havebla ĉe A.E.A. Libro-Servo.

Jen realisma romaneto domaventura po: ĵurnaloj sufiĉe protektataj. Skribis ĝin veterana dana verkistino kun gusto por moralprediko pri sociaj aferoj, kiu zorge direktas la historion por ke la realo prezentiĝu laŭ plej eta detalo, sed ke ties pli kruda flanko restu iom vualita.

Rezulte estas ke la moraliza kadro batalas kontraŭ la rakonta lerteco, kondukante foje al banala realismeta foje al streĉa intereso La komploto estas rivelata laŭ malgrandaj eroj, tiel ke la kompreno de Bodil, kaj de la celata legantaro, malrapide kaj senŝoko larĝiĝas pri la iom grizaj aspektoj de la homa karaktero traktataj.

La problemoj estas ke Bodil estas treege pasiva. Ŝi skvas, vidas, primiras, sed preskaŭ nenion faras. Estas ia aplombo en la aĉro. Ĉiu bona homo

havas saman opinion pri socio kaj moralo. Ĉiu havas danan saĝan vidpunkton pri sekso, tamen neniu faras. Nur friponoj misedukitaj faras malbonon, tamen nur modere.

La traduka lingvo estas flua kaj supla, malgraŭ nombro da lingvaj pekoj kiu primokas la etiketon 'lingve kontrolita'. La taŭgeco de Esperanto por la ĉiutagaj ordinaraj evidentiĝas. Makulas ĝin nur kelkaj centpiedulaj kunmetaĵoj neeviteblaj.

—Frank Dunn.

RUZO

Chauncey Depew iam elruzis Mark Twain je iu okazo, kiam ambaŭ devis paroladi ĉe bankedo.

Mark Twain parolis unue dum eble dudek minutoj kaj estis entuziasme aplaudita. Kiam estis la vico de Depew, tuj poste, li diris: "S-ro tost-estro, sinjorinoj kaj sinjoroj! Antaŭci tiu bankedo Mark Twain kaj mi konsentis, interŝanĝi niajn paroladojn. Li ĵus donis al vi la mian kaj mi dankas pro via aplaŭda akcepto. Mi bedaŭras, ke mi perdis lian paroladon kaj ne povas rememori ion ajn, kion li volis diri."

Li sidigis multe aplaudita.

—P. E. Schwerin

JUST PUBLISHED

"Studlibro por la Supera"
by K. G. Linton.

The essential handbook for those aiming at the 'Supera Diploma' of A.E.A.

\$2.50

from the A.E.A. Book Service
8 Lone Pine Pde., Matraville, 2036

NEWS - DIGEST

PARLIAMENTARIANS MOVE: One hundred and forty Hungarian parliamentarians have petitioned the President of the Parliamentary Cultural Commission to set up a standing committee to look into the possibilities for the adoption of a common international language. Their petition proposes that both parliamentarians and specialists in the world language problem should sit jointly.

WORKERS OF THE WORLD: If the Spanish Socialist Workers' Party has its way, the workers of the world should

unite in learning Esperanto. At a recent meeting, they unanimously decided that all the socialist parties of the world should adopt Esperanto for their purposes and as the language of the working class.

EFFRONTERY? According to Dr. T. Carlevare, quoted in IEMWS "Informilo", the Marquis Louise de Beaufront was neither a marquis nor a de Beaufront. According to Dr. Carlevare, the founder of Ido was in fact one Louis Eugene Chevreux. Esperanto scholars may wish to debate this, but Dr. Zamenhof himself, on 30th November, 1911, gave credit to de Beaufront's grammar book as the first to use a green five-pointed star.

Since October 1974 NEWS-DIGEST was edited by Mr. Arnold Baldwin (Melbourne), whose firm recently promoted and transferred him to its Sydney Office. As a result of his increased responsibilities, Arnold feels that he cannot devote the time necessary for these columns. A.E.A. regrets the loss and wishes to thank him for his valuable service.

Readers will, however, welcome in this issue the first contribution of a very capable successor, Mr. Arthur Cocking, President of the Manly Esperanto Club, who has consented to take over this page.

CARRY ON CAMPING: All through the European summer, there are encampments organized by and for Esperantists. These range from the Mediterranean to the Arctic. Perhaps an even better way of getting the message into the camp of the "unbelievers" is a shared camp, such as that at Grado, Italy—"the most modern and well equipped camp between Venice and Trieste"—where Esperantists are specifically invited—and an Esperanto prospectus is available, but not exclusively for Esperantists.

ON THE RIGHT TRACK(S): European railway workers know only too well the barriers of language. It's not surprising, then, that they are often the driving forces behind Esperanto activity. All Esperantists (not just railway employees) are sure of a welcome at Railmen's holiday "camps"—in tents, motels, hotels, hostels and even castles ranging from Spain to the Land of the Midnight Sun. One such delightful holiday week is held in Switzerland every September. This year it is in a little village near Interlaken, nestling at the foot of the Jungfrau.

Another was at Swanwick in Britain where the International Railmen's (and Women's) Esperanto Federation held its 13th Congress early in summer. The 346 members from 17 countries were entertained by the well known Esperanto poetess MARJORIE BOULTON whose unlikely topic was, "The Art of Insulting and Scolding in Esperanto, with special application for and by Railwaymen".

A month later, the Esperanto railmen of the STUTTGART district of Germany met in the dining room of the Central Station, shared a meal, listened to tapes and saw pictures about the Swanwick Congress.

SUMMER SCHOOL NEAR THE HAUNTS OF HAMLET: S-ro Friis, world known for the "Friis method" of instruction, has for over 40 years (each

July) conducted his "live in" classes in the International High School at Elsinore in Denmark. A highlight of the many excursions is always, of course an inspection of the castle where Hamlet's father was wont to walk the ramparts.

A STRAW IN THE WIND? The Swedish Esperanto Federation announces that it has increased its membership beyond 1700. Though the percentage increase is not great, it is significant and is deemed to be "proof that the tendency to stagnation and falling numbers is broken".

IN NOBLE COMPANY: The world renowned Austrian National Library (Vienna) has a very diverse exposition. It includes collections of Papyrus (or is it Papyri?) of Music, of Maps, of Plays of (feathered) Bird Pictures etc. One of the showcases displayed the Noble Koran, the Thoughts of Mao Tse Tung and various examples of Esperanto literature including the Manual of Esperanto and an anthology of poetry.

FOR PHILATELISTS: This year marks 100 years since the first stamp was issued in the postage stamp Republic of San Marino. The stamp displays are of special interest to Esperantists. Particulars from Presso l'Ufficio Filatelico della Repubblica di San Marino.

INDIAN DANCE TRICK: Most of this digest has been Eurocentred. Now something from India. We have an interesting comment, originally from the "Decan Herald". A keen woud-be Teacher of Esperanto generously offered free Esperanto lessons. No takers. So, he began dancing lessons, with a small, nominal charge. Ten young beginners, to whom he taught dancing AND Esperanto. Great interest. More and more students—now keen dancers and keener Esperantists.

(Credit: Pilo Press)

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Kasisto/Sekretario: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 157 (237)

MELBOURNE

Septembro, 1977

VOJAĜA MOZAIKO

De D-ro A. Einihovici

Post la Islanda Kongreso ni haltis en Kopenhago dum dek tagoj por partopreni kongreson de fakkuracistoj. Ni kontaktis kelkajn esperantistojn kaj ankaŭ partoprenis kunvenojn de Konversacia Esperanto-Klubo. La prezidanto, E. Hansen, recenzis la libron "Colomba" de Merimee. Ni kontribuis al la diskutado, kiu estis interesa kaj vigla.

De tie ni flugis al La Chaux-de-Fonds, Svislando, por ĉeesti la kurson "Enkonduko al Literatura Kritiko", organizitan de Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj gviditan de Giorgio Silfer, redaktoro de "Literatura Foiro". Li estas tre talenta kaj klera lingvisto, kritikisto kaj verkisto. Bedaŭrinde, mia edzino surbendigis nur parton de tiu neforgesebla, eduka kurso, kaj mi aŭskultadis lian perfektan Esperanton tiel atente, ke mi faris tre malmulte da rimarkoj en mia notlibro. Sed por montri la fortegan impreson, kiun mi ricevis de tiu kurso, sufiĉas diri, ke dum kaj post la kurso mi venis al konkludo: malgraŭ mia plujara studado mi nun nur komprenis, ke la vera kompleta plezuro en la vivo estas sendube la penado por la lernado.

La kurso daŭris kvar horojn ĉiutage, du por lecionoj kaj du por la diskutado. La kursmaterialo uzata — kvante kaj kvalite — dum tiu seamajno superis mian imagon. S-ro Silfer analizis la individuajn personecon kaj la verkojn de preskaŭ ĉiuj Esperanto-verkistoj — de Zamenhof, Kabe, Grabowski ĝis la modernaj, Kalocsay, Baghy, Schwartz, Auld, Carlevaro (kiu vizitis nin dum la kurso) ktp.

Oni diskutadis detale pri ĝenerala arto kaj literaturo, kaj precipe pri Esperanto-literaturo: pri la taskoj de kritikisto — juĝo kaj prijuĝo, objektivismo, utilismo, neologismo ktp.

Li parolis pri la evoluo de la Esperanto-literaturo en diversaj epokoj — krea (aktiva), kritika (pasiva); pri la konceptoj de verkado — heteronomio kaj aŭtonomio; kaj pri aŭtoroj laŭ tiuj konceptoj (formo aŭ enhavo, "kion diri" aŭ "kial diri").

Silfer konsideras la poezion kiel la plej gravan formon de literaturo kaj pritraktis tiun parton tre detale kaj emfaze. La poetoj, li diris, ne naskiĝas — ili nur ricevas tion kion ili vidas en la naturo. La poeto konstruas — Dio kreas.

Pro tio ke, laŭ lia opinio, Esperanto estas Eŭropa fenomeno, la progreso de la Esperanto-kulturo dependas de tio, kiel Eŭropo retrovos sin mem, reaktiros la prestiĝon. Esperanto-poezio, li diris, estas poezio de doloro, poezio de sufero kaj Grabowski estas la patro de Esperanto-poezio. Li emfazis kaj reemfazis pri la internaceco de la lingvo. Ne ĉio kio estas verkita en Esperanto estas internacieca. Oni diskutis la metrikan problemon, la gravecon kaj la diferencon inter originalaj kaj tradukitaj verkoj, pri subkulturo, indiĝenkulturo, kaj fontkulturo, pri provincialeco kaj multaj, multaj aliaj temoj.

Konstatende, mi prezentis nur kelkajn rimarkojn elĉerpitajn de la interesaj lecionoj. Kompreneble ne eblas pli detale pritrakti en raporto, kia ĉi tiu. Ĉiuj partoprenantoj de la kurso tre entuziasmiĝis kaj revas revidi kaj reaŭdi. Dum unu el miaj personaj konversacioj kun Silfer, li esprimis deziron viziti Aŭstralion

kaj Nov-Zelandon dum venonta Pacifika Kongreso.

La Kultura Centro Esperantista kiu organizis la kurson estas tre solida kaj grava centro. La esperantistoj jam posedas du domojn kaj tuj akiros aliajn du domojn. La kurso okazis en unu el tiuj domoj kaj ĉiuj partoprenantoj loĝis tie kaj travivis en ideala esperantista etoso. La loko portas la nomon "Privat Gastejo", kaj situas iom for de la urbeto, sur monto kun belega vidaĵo. La urbeto mem estas nomata "urbo en la kamparo", kaj estas la plej alta en Eŭropo. La sekretario, Claude Gacon, estas tre energia kaj lerta esperantisto, kiu laboras sindediĉe por plibonigi la centron. Mi konsideras tiun centron iaspeca "Bona Espero", kies aktiveco estas dediĉita al la kultura kaj lingvistika flanko de la movado. Pro la geografia situacio kaj perfekta svisa organizado ĝi promesas grandan sukceson. La plej valora posedaĵo en "Privat Gastejo" estas la grandega biblioteko kaj libroeldonejo.

De La Chaux-de-Fonds ni vojaĝis al Vengen por partopreni la fervojistan Eŭropan Esperantan Semajnon. Kiel kutime la organizado estis perfekta. La lecionoj matene, la ekskursoj en altajn montojn — Jungfrau, kaj aliaj posttagmeze, muziko teatraĵoj, poemlegado, ludoj, bonegaj manĝaĵoj — ĉio en perfekta horaro kreis varman amikan etoson kaj kontentigis la grandan nombron de esperantistoj. La belega hotelo estis tute okupita de esperantistoj.

Post tiu laciga dumonata aventuro ni survoje hejmen haltis en Matricio por dek du tagoj, kie ni ripozis fizike kaj mense apud belega marbordo kaj en kvieta romantika kabano.

TREVOR STEELE RAPORTAS EL "BONA ESPERO"

Post nur sesmonata restado, estas tro aŭdace fari juĝojn. Sed ni tro aŭdacu. Kiel ĝi nun funkcias, la bieno-lernejo 'Bona Espero' pruvis sian ekzistecrajton (vidu N-ron 5 de TRANSOCEANA), Tamen ĝia plua vivo dependas de facile rompebla ĉeno de cirkonstancoj, el kiuj miaopinie la plej grava estas la plua laborado de la geedzaj Grattapaglia. Eble ili estus anstataŭeblaj, sed oni malfacile povas imagi, kiu alia povus gvidi la komunumon kun egala sindediĉo.

La financa bazo estas ankoraŭ tre necerta. Krom etan subvenciojn de la registaro kaj kontribuojn de la bone-speranoj mem kaj kelkaj bonvoluloj, la kolonio ne havas enspezojn. Eble oni

povus ekspluati la agrikulturajn eblecojn de la bieno, sed transporto al la sola ebla merkato (Brasilia) estas treege kosta. Oni foje diskutetas la proponon konverti parton de Bona Espero en feriejon por aventuremaj turistoj, prefere adeptoj de nia lingvo. Alian eblecon indikis peto lastatempe ricevita: konata aŭtoro petis nin traduki unu el liaj libroj. Sed la tago, kiam oni povas per tio enspezi sufiĉe, estas ankoraŭ fora.

Krom la utila poresperanta propagando en la brazilaj amaskomunikiloj, la plej okulfrapa sukceso estas la fakto, ke la geknaboj de la kolonio malgraŭ sia malfavora vivkomenco nun povos partopreni la pli riĉan vivon de la alfabetuloj. Kaj ili ja parolas Esperanton. Diskuto pri tiu parolkapablo aperos en TRANSOCEANA N-ro 7.

Ankaŭ la najbarojn oni volas helpi, ĉefe per provizado de vestoj sendataj de diversaj esperantistoj. La rezulto de tiu donacado estas enigma. Vi nunaj legantoj apenaŭ povus imagi la malriĉecon de tiuj najbaroj. Por ili eĉ vojaĝo al la "apuda" urbo Brasilia estus malofta luksaĵo, kaj ili supozas, ke ni, kiuj venis de malproksime, estas riĉuloj, al kiuj ne gravas, se ili prenas pli, ol ni proponas. Sed sendube moralaj konceptoj rezultas grandparte el la vivkondiĉoj kaj ni, kiuj neniam en la vivo malsatis, ne rajtas senti nin superaj.

La geedzaj Grattapaglia foje miras pri la fluo de okazajoj, kiuj direktis ilian vivon laŭ ĝia unika vojo. Kelkfoje ili bezonas kuraĝon por daŭrigi. Laŭ ili ekzistas supera plano por Bona Espero kaj neniu venas hazarde. La motivoj de Edita kaj mi por la vojaĝo ĉi tien ankoraŭ ne tute klariĝis, ĉu do "oni" sendis nin . . . ? Ĉiukaze ni ne bedaŭras la decidojn. La turista ĝuo de novaj pejzaĝoj iam cedas al sopiro je la hejmaj. Oni ricevas konstantan plezuron de la ĉiutaga uzado de la kara lingvo, kaj a vivo sen polucio kaj malŝparo en ĉi tiu trankvila ĉirkaŭaĵo estas nepre avantaĝo, sed ni ne forgesu la svarmajn pulojn kaj iksodojn, la izolecon kaj la iom unutonan nutradon. Sed antaŭ ĉio ni ricevis en Bona Espero novajn spertojn kaj eksciojn, kiuj daŭre influos nian vivon.

MIA ESPERANTISTA VIVO de K. G. LINTON (daŭrigo)

Kiam D-ro Caldera elektigis prezidanto en 1950, li tuj starigis por si celon: la realigon de sia ambicio, ke A.E.A. konduku siajn proprajn terciarajn ekzamenojn, por eviti la neceson vojaĝi al Eŭropo por tiu celo. Mi eble scias pli

bone ol iu alia la laboron, kiun li faris sed li atingis sukceson en 1951, kiam S-ro J. R. G. Isbrucker, la tiama prezidanto de la Akademio de Esperanto, konsentis elekti provizoran komisionon.

Li petis D-ron Caldera nomumi la plej kompetentajn Esperantistojn en Aŭstralio, kaj inter tiuj nomoj estis la mia, kaj mi forte sentis la deziron akceptiĝi en la nomumo je sep provizoraj komisbrucker kondukis provojn, kiuj kulminis en la numumo je sep provizoraj komisionanoj, kiuj agus ĝis la tempo, kiam ni jam havos almenaŭ tri niajn proprajn Klerecajn Diplomitojn. Ili estis laŭ alfabeto ordo: S-ro F. R. Banham, D-ro C. J. Caldera, Pastro C. C. Cowling, D-ro A. Fridenbergs, S-ino I. P. Hanks, S-ro K. G. Linton, kaj S-ro P. E. Schwerin, kun D-ro Caldera kiel provizora komisionestro.

En tiu sama jaro, 1951, okazis alia grava evento (Jes, mi scias, ke "evento" estas "grava okazaĵo", sed mi persistos per tiu esprimo, ĉar ĝi estis sufiĉe grava por la pleonasmo). Tamen mi devas reveni al la jaro, 1948, kiam Herbert Koppel alvenis en Aŭstralio. Tiujare du fraŭtinoj el Adelejo (Mi malakceptas la vorton, "Adelajo", ĉar ĝi ŝajnas erare registrita en nia vortaro), Fay Andres kaj Win Addis (Win estas Dumviva Membro de U.E.A. kaj delegito de U.E.A. por Adelejo antaŭ mia memoro) vizitis Melburnon, kaj renkontis Herbert Koppel. Mi ne insistas, ke estis amo je la unua vido, sed ili revenis al Melburno por la kongreso en 1950, kaj Fay kaj Herbert geedziĝis en 1951. Fay Koppel, kiel ŝi nun estis, poste okupis tre gravan lokon en mia Esperantista vivo.

La 8-a Aŭstralia Esperanto Kongreso okazis en Sidnejo, kaj tie mi ricevis tre grandan surprizon — mi elektiĝis prezidanto de A.E.A. En tiu sama jaro Roy Rawson ekzistis kiel delegito por Melburno, kaj mi anstataŭis lin. Tuj poste Roy elektiĝis membro de la Viktoria Parlamento.

La 9-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en Perto en 1954, la sola kongreso, kiun mi ne povis ĉeesti de post mi fariĝis Esperantisto, sed mi reelektiĝis prezidanto la duan fojon malgraŭ mia foresto. Tiun saman jaron mi konsentis fariĝi Ĉefdelegito por U.E.A. en Aŭstralio, kiam Les Pfahl ekzistis.

En la jaro 1955 D-ro Caldera sukcesis pri la Aŭstralia Norma Klereca Diploma kun honoro, kaj do fariĝis la unua konstanta komisionano. Ankaŭ en tiu jaro S-ro Len Newell alvenis en Aŭstralio, sed mi ne sciis tion, ĝis la sekvinta jaro, kiam li skribis al mi por ekscii la kotizon al U.E.A. Kiam li legis

la nomon: L. N. M. Newell, mi apenaŭ povis kredi al miaj propraj okuloj. Ne povis esti du homoj kun tiu nomo, kiun mi konis tiel bone, ne nur en la lernolibro, sed ankaŭ pro liaj kontribuoj al Literatura Mondo. Lia baldaŭa respondo konfirmis la veron. Jen la homo, kiu insruis al mi Esperanton, sed li ankoraŭ ne sciis tion, ĝis decembro 1958, kiam mi vizitis Adelejon kaj mi fine renkontis lin por komenci firman amikecon.

En la jaro 1956 la 10-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en Kanbero, Mi nomumis D-ron Fred Williams por sekvi min kiel prezidanto, kaj mi elektiĝis kasisto, ofico al kiu mi ege sopiris, ĉar nia landa asocio estis konstante senmona, kaj mi kredis, ke mi povas tion ŝanĝi.

En la jaro 1957 mi fariĝis Dumviva Membro de A.E.A., kaj en 1958 la 11-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso denove okazis en Melburno, kaj D-ro Fred Williams elektiĝis prezidanto la duan fojon, kaj mi la unuan fojon renkontis D-ron Ross Robbins.

La sekvinta jaro, 1959, estis la jarcenta datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, kaj por marki tiun gravan okazon ni organizis en Aŭstralio la Zamenhofan jarcentan Fonduson, de kiu Ralph Harry, reveninta el Singapuro, estis la ĉefa organizanto. Tiucele regule kunvenis kun la prezidanto, D-ro Fred Williams en lia oficejo, Ralph Harry, Herbert Koppel kaj mi. Mi mem markis tiun jaron farigante Dumviva Membro de U.E.A. Ankaŭ en 1959 fondiĝis en Melburno pro la instigo de Herbert Koppel kun la helpo de D-ro Andrew Fridenbergs la Esperanto Advancement Cooperative Ltd. Tiu organizo estis fondita por ke la Melburna Esperanto-Societo akiru sian propran domon. Herbert Koppel fariĝis sekretario kaj mi fariĝis kasisto, oficoj, kiujn ni ankoraŭ tenas hodiaŭ.

En la jaro 1960 okazis la 12-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Hobarto.

Ĝi estis organizita de Marcel Leereveld, kiam li estis instruisto ĉe la Friend's School tie. Elektiĝis prezidanto Ralph Harry. Tiun saman jaron eldoniĝis mia verko, "Kanaĉo el Kananam", kiun mi verkis por prezenti al la Provizora Ekzamena Komisiono, kiel tezon, laŭ la konsilo de Bill Drummond antaŭ dek kvar jaroj, do ĝia apero multe kontentigis lin. Eldonis tiun verkon la Esperanto Publishing Co., kiun estris Cecil Goldsmith, iama ĝenerala sekretario de U.E.A. kaj kun kiu mi multe korespondis dum la antaŭaj kelkaj jaroj pri la eldono. Ankaŭ en tiu jaro mi fariĝis la unua komitatano en Aŭstralio de U.E.A., kaj

en tiu sama jaro Ralph Harry gajnis la Ordenon de la Brita Imperio. Mia verko estis akceptita kiel tezo, kaj en 1961 kun granda ĝojo mi fariĝis la dua Aŭstralia Klereca Diplomato, sed tiam saman jaron frapis min granda malĝojo, ĉar mi perdis mian karan amikon, D-ron Fred Williams

En la venonta jaro komenciĝis la tria ĉapitro de mia rakonto.

(daŭrigota)

U.E.A.

Nia ĉefdelegito bedaŭras anonci dekreprocentan altiĝon en la kotizoj al U.E.A. por la jaro 1978. Ili nun estos M. J. \$8.40 kaj M. A. \$21.00 Aliflanke plaĉas al li informi, ke la revuo estonte alvenos al ĉiu membro en Aŭstralio per aera poŝto. Ni do ni plu legos novaĵojn jam ne aktualan.

Korespondi deziras 13-18 jaraj estonaj komencantoj. Skribu al la instruisto S-ro J., Palu, 200016 TALLIN, Solme 21 Estonia, USSR. (Informojn ankaŭ donas S-ino J. Lehane, 2a Harms St., Toowoomba, Q'ld. 4350)

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **Perth:** Ĉe la kunveno de 27/7 ni bonvenigis S-ron W. Illingworth, kiu revenis de transmara vojaĝo. F-ino O. Hunt gvidis vort-ludon, membroj partoprenis en legado de teatraĵo kaj poste partoprenis en "unu-minutaj alparoloj".

Je 10/8 F-ino Olive Hunt gvidis ludon "Kiu mi estas?" kaj ekzercis frazojn pri la angla vorto "get". Klubanoj kune legis kaj tradukis tekston el la libro "Liliputo".

Dimanĉon, la 21-an de aŭgusto, membroj estis gastoj en la hejmo de F-ino O. Stempel; pro pluva vertero nur 10 partoprenis. S-ro Dean akompanis per piano kantadon de E-kantoj. F-ino O. Stempel prelegis kun diapozitivaj pri siaj lastatempaj vojaĝoj tra la insulo Norfolk kaj Nov-Zelando.

En la klubĉambro en Nedlands, 24/8, ni bonvenigis Eunice Graham el Manly. Je 14/9 S-ro J. Hawks legis leteron de D-ro Einihovici el Danlando kaj membroj legis denove el la libro "Liliputo".

Dimanĉon, 25/9, S-ino E. Palmer invitis membrojn al sia nova hejmo ĉe

Bull Creek. S-ino Buckingham montris diapozitivajn pri vizito al la valo Yosemite kaj kelkaj pacifikaj insuloj. S-ro J. Hawks montris lumbildojn pri la Panama Kanalo.

● **MELBOURNE:** Prezidanto C. Kanaĉki, 11/7, priskribis jugoslavajn hospitalojn, en kiuj li estis paciento kaj rakontis diversajn travivaĵojn en ili. La imponaj konstruaĵoj kaj parkoj de Parizo estis la temo de parolado kun diapozitivaj far S-ro K. Linton.

"Novajoj el Esperantujo" estis la temo de prelego de S-ro H. Koppel (1/8) kaj je 8/8 S-ro S. Kanaĉki priskribis la vivciklon de silkraŭpo kaj la procedon produkti silkon, laboro kiu okupis lian patron kaj la familion en lia junaĝo.

Je 15/8 prelegis S-ino Fay Koppel pri semajnfina ekskurso en 1957 de 3 Melburnaj esperantistoj al la neĝregiono de Viktorio, Vic-Prezidanto H. Beechey parolis (22/8) pri la temo "Pli pri la Vitaminoj". —F. K.

La grupo en **MALVERN** havis sian ĝeneralan kunvenon je 8/2 kaj elektis novan estraron: Prez: Don Pescod; Sekretario: Barbara Podmore; Kasisto: Beryl Pescod; Grup-Gvidanto: S-ino A. Paling.

Nia sekretariino, Barbara Podmore, partoprenis la Universalan Kongreson en Reykjavik. Kun bedaŭro ni devas raporti ke Anita kaj James Mullett translokiĝis al Wagga. Ili intencas fondi novan grupon tie.

La grupo en **OAKLEIGH** elektis novan estraron je 2-a de februaro. Prez.: Jack Fallu; Vic-Prez: N. Butkunas; Kasisto: Ann Hearn; Sekretario: Bob Reed; 2-a Sek. kaj Libro-Servo: S-ino Ivy Fallu.

Ann Hearn kaj Bob kaj Eva Reed revenis de siaj transmaraĵoj kaj ni antaŭvidas kun ĝojo iliajn vojaĝraportojn kaj diapozitivajn. Kun plezuro ni povas raporti, ke jam 50% de niaj membroj aliĝis al la Aŭstralia E-Kongreso en Launceston.

● **MORWELL, Vik:** La estraro por 1977 konsistas el: Prez: S-ro W. Wybenga; Vic-Prez: S-ro I. T. Maddern; Sekretario: S-ino M. Wybenga; Protokol-Sek: S-ino A. Schepers; Kasisto: S-ro B. Kelly.

Ĉe la kunveno de 5/8, kiu okazis en la hejmo de Ges-roj Maddern, S-ino M. Wybenga montris memfaritan filmon pri ŝipvojaĝo al Nov-Zelando, Tahiti, la Panama Kanalo kaj vizitoj al Jamaiko, Nederlando, Britujo kaj Danlando.

● **MANLY:** Spite de la malvarma vetero ĉiuj klasoj estas regule kaj multnombre frekventataj. La "paroligan rondon" vigle gvidas Eunice Graham per tradukoj de interesaj leteroj de ŝia filino Jane, kiu vojaĝas nuntempe tra foraj partoj de Hindujo.

Niaj nederlandaj vizitantoj Ges-roj ten Hagen invitis klubmembrojn al la hejmo de sia nevino por adiaŭa vespermanĝo. S-ro ten Hagen montris filmon faritan dum vojaĝo tra Aŭstralio. La ĝinda vespero finiĝis per kantado. Al Ges-roj ten Hagen ni ĉiuj deziris agrablan vojaĝon hejmen.

—Edna Giles.

● **CAPRICORN COAST:** Klasoj okazas ĉiumarde ĉe "La Nesto", Emu Park, kun meznombre kvin bonaj studentoj, uzantaj la libron "Esperanto Teacher".

Je 21/9 John Moore estis gastparolanto ĉe la jarkunveno de la CWA Emu Park, antaŭ proks. 60 ĉeestantoj. Post la parolo, oni invitis lin paroli al alia CWA-branĉo kaj al klubo de la TOI-asocio. Ankaŭ unu korespondlernanto sin anoncis ĉe la kunveno.

● **BRISBANE:** La Stata Konferenco de la "Modern Language Teachers Association" de Kvinlando okazis de la 13-a ĝis la 15-a de aŭgusto. Post la Multkultura Konferenco en aprilo, la Brizbana Esperanto-Societo ricevis inviton ĉeesti kaj prezenti traktajon pri Esperanto. Do Winsome Greenhalgh kaj Ray Ross akceptis tiun inviton, kaj Ray Ross prezentis dudek-minutan prelegon "Esperanto 1887-1987". Poste estis respondoj al multaj demandoj.

La 11-an de aŭgusto, Ray Ross parolis al YWCA Grupo en Wynnum (mARBORDA antaŭurbo). Ĉirkaŭ dudek virinoj ĉeestis kaj per viglaj demandoj montris intereson.

La 12-an de julio, Ray Ross parolis al la "Lone Parents Association". Bedaŭrinde la vetero estis malagrabla kaj malmultaj ĉeestis. Tamen anoj montris intereson kaj promesis disdoni novaĵojn kaj foliojn pri Esperanto al aliaj membroj.

— Ray Ross.

● **ST. LUCIA:** Post la ferio Esperanto-klasoj denove okazas en la hejmo de Winsome Greenhalgh. Dawn Degn gvidas novan klason por komencantoj, Winsome Greenhalgh estras klason por mezgraduloj kaj Margaret Jones la progresintojn.

● **IPSWICH:** En la Edukada Centro okazas ĉiujauĉe kurso por komencantoj sub la gvidado de Ray Ross.

● **TOOWOOMBA:** Bonvojaĝan festeton Ĉe "Pizza Hut Restaurant" honore al F-ino M. O'Mara ĉeestis dek membroj. Estis gaja okazo. Poste foto aperis en la "Toowoomba Chronicle". F-ino O'Mara ferias transmare kelkajn monatojn.

Kelkaj monataj kunsidoj ne povis okazi pro manko de kvorumo. Tio ne estis stranga, ĉar kelkaj anoj feriiis.

Dum junio, ĝis sep samideanoj kunvenis ĉiusemajne ĉe F-ino Evans por studi la lingvon.

—Jean Lehane.

NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto
Bun'ichi Išizaki)

La 26-a Kongreso de Esperantistoj en Kantoo-Distrikto (Tokio kaj ĉirkaŭaĵo) okazis 25-an kaj 26-an de junio en la urbdomo de Haĉicojiŝi. La inaŭguran kunvenon prezidis S-ro M. Nakamura en ĉesto de 121 partoprenantoj, inter ili 3 gastoj, la urbestro, la estro de la civitana domo kaj F-ino Aliĉja M. el Pollando.

La urbestro, S-ro Gotoo salutis la kongreson kaj reprezentantoj de ĉiuj grupoj kaj ligoj prezentis mesaĝojn de la respektivaj grupoj. S-ro W. Schmid (el Germanujo), S-ro A. L. Blatt (Usono) kaj F-ino Aliĉja M. faris paroladojn. Memora fotado, fakkunsidoj kaj Solena Fermo konkludis sukcesan kongreson. La 27-a kongreso okazos venontjare en Coohu.

La 64-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazis en Tokio de la 26-a ĝis la 28-a de aŭgusto. Entute partoprenis 548 personoj.

Je 26-a de aŭgusto okazis 4 kursoj, nome elementa, mezgrada, altgrada kaj kurso por kursgvidantoj. Tiuj kursoj daŭris la sekvantan tagon.

La 27-an de aŭgusto okazis la inaŭguro, raportoj pri la movado, debato pri la stato de la movado, fakkunsidoj kaj la ĝenerala kunveno de la Japana Esperanto-Instituto.

Trege valora estis la t.n. "Kurso pri kursoj", fakte kurso pri la organizado de kursoj, metodologio kaj instrumaterialoj. Lektoroj estis S-roj J. Kaziwara, J. Takeuchi kaj aliaj.

Okazis Kongresa Universitato. Profesoro Sinichi Kawamura parolis pri "Vitamino C aŭ Askorbata Acido, kemiaj proprecoj kaj nutraj signifoj".

Profesoro Sakutaro-Tadokoro parolis pri "Kiel diferencas drogoj kaj venenoj."

La 28-an de aŭgusto okazis publika preleg-kunveno. La fama aktoro T. Sasaki parolis pri "Esperanto, ĉu vivanta lingvo?" D-ro F. Egami, Prezidanto de la Japana Esperanto-Instituto prelegis pri "Naturscienco kaj Esperanto". S-ro Raif Makarian (Britujo) parolis pri "Socia pozicio de Esperanto rilate la anglan lingvon".

ESPERANTO KAJ WALL STREET JOURNAL

En la lasta eldono de "A.E." ni raportis pri vizito de S-ro Barry Newman, raportisto de "Wall Street Journal" al kunveno de la Wellingtona E-Klubo. Surbaze de tiu vizito je malvarma, vintra vespero, en malkomforta klubejo, aperis artikolo sur la unua paĝo de "Wall Street Journal" en la eldono de la 23-a de junio. La artikolo estis verkita en sarkasma, iom stulta maniero.

La konata usona esperantisto Prof. D-ro Richard E. Wood sendis leteron al la Redaktoro (ĝis nun ne represita), en kiu li esprimis la opinion, ke la artikolo pli respegulas la socian etoson de la ĉefurbo de Nov-Zelando, trankvila izolita mezgranda urbo, ol la veran gravecon, etendiĝon kaj celon de la tutmonda Esperanto-movado.

Vere tiu okazaĵo estu bona leciono por ni esperantistoj. Tro ofte nerealis-maj esperantistoj atendas gravan profiton por Esperanto per invito de gravaj gazet-raportistoj al niaj mizeraj kunvenoj. Kian impreson povas gajni reprezentanto de grava gazeto, kiam li vizitas klubkunvenon en malnova domo en sensignifa flankstrato? Tute ne gravas ĉu ĉeestas dekduo aŭ dudeko. (Plej ofte ĉeestas nur sepl!)

Laŭ la nuna stato de nia movado estus saĝe inviti ĵurnalistojn nur al landaj aŭ universalaj kongresoj, kie ili povas vidi Esperanto-Ekspoziciojn, belajn libro-standojn kaj povas intervjui eksterlandajn vizitantojn.

Dez. korespondi kun aŭstralianoj 20-jara studento el Siberio. Skribu al: U.S.S.R. 625009, TŬUMENJ - 9, a. k. 139, Laharov Viktor

NEKROLOGO W. H. HOWARD

S-ino E. L. Palmer (Perth) atentigas nin, ke enŝteliĝis eraro en la nekrologon pri S-ro W. H. Howard. Estis dum la 16-a Kongreso de A.E.A. en Manly 1968, ke S-ro W. H. Howard fariĝis vic-prezidanto de A.E.A.

ALFRED ROY COHEN

La 16-an de junio, 1977, nur 2 semajnojn antaŭ la 80-a naskiĝtago, mortis en Tweed Heads, N.S.K., Alfred Roy Cohen, unu el la fruaj esperantistoj de Aŭstralio.

Li naskiĝis la 1-an de julio, 1897 en Fitzroy, antaŭurbo de Melburno. Li aliĝis al la Melburna klubo en 1915 aŭ 1916. Iuokaze, kiam mi aliĝis al la klubo, la 21-an de marto, 1919, mia kuzo, "Roy" Cohen, kiel oni kutime nomis lin, estis jam la sekretario de la klubo. En julio 1920 li fariĝis Vic-Prezidanto de la Aŭstralia E-Asocio kaj en 1923 ĝia prezidanto. (A.E.A. tiam ne estis tutlanda organizo, sed nur alia nomo por la iama Melburna E-Societo.)

Li estis samtempulo de la famaj aŭstraliaj esperantistoj James G. Pyke, Maurice Hyde, Percy Hudson, Charles Ballard, G. Gordon, Roy Rawson kaj W. J. Drummond. Profesie li estis reprezentanto por dentistaj bezonaĵoj.

Pro familiaj devoj li iom post iom retiriĝis el la movado. Postvivas lin vidvino kaj 2 filoj (filino lia jam mortis antaŭ keikaj jaroj.).

—H. M. (Marshall) Cohen

21st AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-8, 1978 — Launceston, Tas.

Mail your Congress Fee \$13 (Pensioners, Students \$7.50) to the Congress Treasurer, Mr. Mac Le Fevre, 22 Belle Vue Avenue, Launceston 7250. Add \$10 for Room Deposit at "Tasmanian College of Advanced Education" and enclose a stamped addressed envelope for your receipt.

The College of Advanced Education has made arrangements that delegates wishing to arrive on Sunday, Jan. 1st may occupy their rooms on that night, provided they notify the Congress Treasurer, Mr. Mac Le Fevre (address see above) BEFORE Friday, 9th December, 1977. The time for arrival must be between 5 p.m. and 5.30 p.m., but please note that meals CANNOT be provided Sunday night or Monday morning.

Enrolments will commence at the College on, Monday, Jan. 2nd at 11.00 a.m. Tea, coffee and biscuits will be available at midday.

Those wishing to stay in their room on the night of Sunday, 8th Jan. may do so, but please note that meals will NOT be provided.

All members of the Launceston Esperanto Club are looking forward to meeting you at the Congress.

RECENZOJ

NIA ORIGINALA PROZO de Heide Apolloner. Dansk Esperanto Forlag. 58p. Aŭstralia prezo \$2.00. Havebla ĉe A.E.A. Libro-Servo.

Jen tre utila libreto. Per ĝi la aŭtorino prezentas super-rigardon de la originala esperanta prozo. Literaturamanto, ŝi sentis la mankon de kompleta bibliografio pri sia preferata kampo, la prozo. Tial ŝi komencis surpaperigi siajn impresojn pri la legitaj originalaj verkoj, kaj jen la rezulto.

La modesta amplekso de la libro permesas nur tre mallongan pritrakton de individuaj aŭtoroj kaj verkoj, tamen kelkfoje ŝi donas pli detalajn impresojn. Aparte valora estas la pritrakto de la frua prozo literatura, ĉar troviĝas notoj pri multaj verkoj nun malfacile haveblaj kiuj meritas elserĉon. Kiel diras Heide Apolloner "La verkoj de niaj pioniroj havas ne nur literaturan, sed precipe idean signifon por la evoluo de tutmonda literaturo".

Si celis pritrakti ĉiujn gravajn verkojn kaj kvankam ne ĉiuj konsentos pri ŝiaj elektoj kaj preterlasoj, mi estas certa ke ĉiu literaturamanto trovos la libron tre havinda. —R.McG.

ili ĝenerale Auld elstaras, speciale en polurita tekniko, sed estas Boulton kiu provizas la plej trafajn pecojn. Vere estas ke malgraŭ la intereso de la tuta verko, neniam falanta al banalo, tamen io mankas.

Kaj ĝi same mankas en la ĉirkaŭ 50 poemetoj pri domaj kaj personaj aferoj kovitaj de Daphne Lister. Du etaj eroj (japaneskaj senrjuoj) donas la guston de ŝia ciniko kaj morneta defetismo:

Skeptiko savas/En fido kaj sincero/
kuŝas danĝero. (p.27)

Eta talento/Briletis, tremis, meĉis/Jen malevenio. (p. 45) La talento estas videbla, sed kukumajn sandviĉojn ne ĉiu frandas.

Ĉar mi tre admiras la kapablon de Auld, kaj volas nur ke li trovu taŭgan medion por eternigi sian genion, mi kaj bonvenigas kaj prigrumbas la nunan iom antikviĝintan specimemon. Ĝi estas ja interesa, kiel ĉu lia verko, ĝi montras elstaran inventemon kaj teknikan talenton, kaj tamen

Pri la tri estas la sama plendo: estas multe da spleno kaj enuo; oni plendas pri la homa sorto, la milito, la kio ajn. Miasmas defetismo kaj sinkompatio. Sed estas iel artifice, kaj venas kiel subita flagro inter la cindroj la pasia denunco de Boulton:

Damnita estu la cenzuro!

Fiŝangaj kaj en prudaj skvamoj

Eŭnukoj kaj glaciaj damoj

Kastras kulturon pro "sekuro". (44)

Ha! Jen poezio! —Frank Dunn

RIMLETEROJ, de Marjorie Boulton kaj William Auld. GIS NUN, de Daphne Lister. Ambaŭ eldonis Esperantaj Kajeroj Manĉestro, 1976. Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo.

Inter la Esperantistoj, poezio estas lingvo de homo. La Esperanta poeto verkas por ono de ono; tamen tiu oneto frandas la lingvon bele uzatan, kaj ne multe toleras strangajojn. Eble la procento de la lingvanaro kiu verkas poemcjin estas en Esperanto la plej granda en la mondo. Tial la poezio uzigas ne nur por grandaj aferoj sed ankaŭ por aferoj hejmeaj aŭ bagatelaj.

Jen du libretoj tiurilataj, en modesta tamen tre klara kaj taŭga formato por malkoste liveri specimenojn de la kreivo de niaj poetoj.

Auld kaj Boulton dum ok monatoj de 1953-54 interŝanĝis koresponde 84 rondelojn pri la ordinarajoj de la vivo. En

DUMVIVAJ MEMBROJ DE U.E.A.

F-ino W. Addis, S.A.

S-ro R. W. Baxter, N.S.W.

D-ro C. J. Caldera, W.A.

S-ino H. Cooper, Tas.

S-ino M. Duncan, N.S.W.

F-ino E. Gibson, Tas.

S-ro S. H. Grant, S.A.

S-ino I. P. Hanks, Vic.

S-ro R. J. Hanney, S.A.

S-ro R. L. Harry, A.C.T.

F-ino M. Hodge, S.A.

S-ino F. Koppel, Vic.

S-ro K. G. Linton, Vic.

S-ino R. McGrath, W.A.

S-ro I. T. Maddern, Vic.

S-ro J. Matasin, N.S.W.

D-ro R. G. Robbins, A.C.T.

S-ino K. R. Schwerin, N.S.W.

S-ro L. V. Scott, N.S.W.

S-ino D. M. Sinclair, Qld.

S-ro D. H. A. Thorp, W.A.

S-ro E. W. Woodruff, N.S.W.

NEWS - DIGEST

ESPERANTO LIBRARIES: In our last issue we mentioned the Esperanto collection in the Austrian National Library in Vienna. Of course, in that city there is a most impressive library devoted exclusively to Esperanto works.

Another Esperanto library we call to mind is situated in an imposing ex-monastery-cum-castle on an imposing hill outside the Italian city of Massa. In the courtyard is an imposing statue — of Zamenhof, of course.

THE LINGUIST OF VENICE: Dr. Pennacchietti, Professor of Semitic Studies of Venice (and an Esperantist) together with Prof. Szerhadilyi of the University in Budapest where Esperanto is an integral part of the curriculum, has arranged for a symposium to be held on inter-linguistics, with special emphasis on Esperanto.

Sorry, even if you are in Venice next May, you may NOT attend. It is exclusively for Italian and Hungarian scientists.

WHAT, NO CULTURE? Those prejudiced against us maintain — loudly, for if your argument is weak your voice must be strong — that Esperanto has no culture. What of these:—

In Warsaw the Grabowski theatre is about to present a new play — "Hypnotism" in Esperanto. It was written by Cwojdzinski, a Polish author now living abroad.

The Bulgarian Esperanto Theatre Group is of professional standing.

Also, musical evenings, art shows, puppet shows etc. are features of life for European Esperantists. Perhaps typical of such entertainments is an Esperanto week-end to be held at Herzberg-Harz. (No, we won't rob you of the fun of finding it in an atlas. As a hint, "Berg" is German for mountain.) One evening will be devoted to music — choirs, orchestras, bands and soloists, with a little bit of magic as comic relief.

As a gesture of welcome and goodwill, the six first "foreign" guests will be given free "bed" and "board".

NOT A TOWER OF BABEL: Dr. Haarman of Hamburg recently gave an

address on "Language Politics in the European Community". He said that many languages are considered to be discriminatory, hence tensions among ethnic groups such as the Flemish and the Walloons. His solution? Esperanto, which has no national taint.

THAT PLACE: In English, in the Luxembourg Weekly, appears this profound thought: "We will always need translators and interpreters for heads of state. But it is sad if toilets still have to be marked in 10 different languages".

HONORABLE MENTION: In a recent issue, "Informilo" published in Vienna mentions our Jan. 1978 Australian Congress in Launceston.

It stresses the youth camp to be held prior to the Congress.

Details from F-ino E. Gibson, Box 638 Launceston 7250, Australia.

WHEN, NOT HOW: Heard about the Red Indian whose greeting was always "When?"

A friend rebuked him with, "You should say "How", not "When". His reply — "Me already know how. WHEN?"

We know how to solve the world communication problem. The question is, "When?" Are you doing your bit to hasten things? **ONE WAY YOU CAN DO YOUR BIT IS TO BE SURE YOU HAVE PAID YOUR SUBSCRIPTION FOR 1977. \$10. (\$5 pensioners and juniors) direct to Les Scott, 34 Ocean Road, Manly 2095. N.S.W.**

CREDITS: Pilo Press, Informilo.

PREDIKO

Mark Twain kelfoje ĉeestis la diservon de D-ro Doane, kiu tiam estis pastro en Hartford. Iun matemon, post fino de la servo, M.T. diris al li: "D-ro Doane, mi tre ĝuis vian servon ĉi-matene. Mi bonvenigis vian predikon kvazaŭ malnovan amikon. Fakte, mi havas hejme libron, kiu entenas ĉiun vorton de via prediko".

"Vi certe ne havas", indigne respondis la pastro..

"Mi havas!"

"Nu, vi sendu al mi tiun libron, mi ŝatus vidi ĝin".

"Mi sendos ĝin," promesis Mark Twain. La postan tagon li sendis al D-ro Doane kompletan ne-mallongigitan vortaron.

—P. E. Schwerin.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Kasisto/Sekretario: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 158 (238)

MELBOURNE

Okt.-Nov., 1977

NIA GAST-ARTIKOLO

SEN VERDA STELO

(J. Kohen-Cedek-Jerusalem)

Kiam mia amiko, la verkisto dro A. Karmon prezentis min al sia pliaĝa duonfrato — la prof. Nahum Sloušc, mi sentis min flatita. Ĉar konversacii kun tiu ĉi fama, multfaka scienculo estis tre interese, kvankam unue li impresis kiel senkolora homo de velka aspekto. Li estis malalta, rondventra hometo kun brilanta kalva kapo kaj pinta, jam griza barbeto, sed kun agrablamiento. La interkonatiĝo okazis en Tel-Avivo dum la brita landokupacio. Kiel unua temo servis rememoroj pri nia komuna naskigejo, — la cara rusŝtata Litovujo. La sciencisto parolis per troemfaza, elmodiĝinta, jam arkaikiginta stilo de hebrea lingvo, rakontante per ĝi freŝe pulsintajn epizodojn.

— Se estus liaj rakontoj akvo, — rimarkis poste la pli juna duonfrato, — estus ni dronintaj en ĝi . . .

La multparolema sciencisto ŝatis rakontadi pri la aŭtoroj de tiuj verkoj, kiujn li tradukis hebrean dum sia junaĝo: pri Flaubert, Zola kaj Maupassant, kaj anekdotojn pri sia iama kolegaro. — la profesoroj de Sorbono, kie li okupis katedron pri hebrea literaturo. Li fiere rimarkis, ke ĝuste li estis la unua, kiu pruvis, ke ekde la renesanco la hebrelingva literaturo disvolviĝis samŝtupe kaj samtendence, kiel ĉe aliaj eŭropaj nacioj, sed . . . kun malfruiĝo je tempo daŭro de unu generacio. Kvazaŭ senintence li rimarkis, ke li verkadis en tri

lingvoj: en hebrea, en rusa kaj en la franca. Tiun multlingvecon malaprobis la duonfrato:

—Mi verkis nur du romanojn, sed ambaŭ en la sama lingvo, — diris dro A. Karmon.

—Du pekoj kune ne faras eĉ unu virtagon? — ŝerce respondis la profesoro, kio vundetis la ambicion de la romanisto. Kaj mi trovis kiel necesa laŭdi ties verkadon. La maljunulo respondis:

—Vi uzas tiajn varmajn vortojn, ke mia koro degelas, malgraŭ la vintra temperaturo . . .

D-ro A. Karmon scipovis sin mem defendi:

—Vi estas kompatema rilate al mia verkado, same kiel bankisto, kiu rifuzas pruntedonon.

Je tio la maljunulo sarkasme respondis:

—Kun tri homspecoj ne valoras disputi: kun brita enmigro-oficisto, kun psikologo kaj kun romanverkisto!

Dum alia renkontiĝo rakontis N. Sloušc pri siaj reserĉaj komparstudoj, aperintaj sub titoloj: "Judoj kaj Fenicianoj" kaj "Judoj kaj Berberoj"—rezulte de esplor-ekspedicioj al Nordafriko, kie li je granda miro trovis tribon de judaj "trogloditoj". Estis ili judoj saviĝintaj de islamaj persekutoj en la kavernoj de la Atlasa montaro, kie ili vivis dum jarcentoj kiel brutbredistoj (nuntempe ili ĉiuj vivas en Israelo).

Ankaŭ li ŝatis rakontadi pri siaj esploroj de feniciaj komercpunktoj, kiuj posttempe fariĝis urboj, kiel ekz. Kadeŝ (hebreo : Sanktejo) — la nuna Cadiz (=Kadiz), aŭ Malha (hebreo : Salejo), — la nuna Malaga.

De historiaj esploroj ĝis arkeologiaj elfosadoj estas nur unu paŝo. La maljuna profesoro gvidis diverslokajn elfosadojn kiel ĉefo de "Palestina Arkeologia Esplorasocio" kaj ŝatis rakontadi pri siaj trovitaĵoj en Tiberio, en Kidrona valo (de Jerusalemo) kaj en Transjordanio.

Memkompreneble, ke kiel multe pli juna, mi elektis la ronon de aŭskultanto. Tial mi ne havis okazon prezenti min kiel esperantisto. La profesoro forpasis en j. 1969 preskaŭ centjaraĝa. Nur poste mi hazarde eksciis ke LI ESTIS ESPERANTISTO. Sed kaŭze de siaj multfakaj agadoj li ne povis aktivi kiel esperantisto. En la ĉijara Julia numero de la revuo "Esperanto" (859/1977) mi trovis artikolon de N.Z. Maimon pri prof. N. Slouŝĉ, titolitan "La forgesita pioniro."

Konklude mi povas nur bedaŭri, ke dum niaj konversacioj mi ne tuŝis la temon Esperanto.. Se la kvinpinta verda stelo estus tiam ornaminta mian jakon, la aferoj estus eble disvolviĝintaj totalie.

TRANSMARAJ SPERTOJ

Dum mallonga vizito en Israelo, mi havis la plezuron viziti la U.E.A.-Delegiton de Jerusalemo, S-ron Josef Kohen-Cedek.

Mi anoncis mian viziton letere kaj telefonis lin post alveno. Kvankam li sciis pri mi nur unu solan fakton, nome ke mi lernis Esperanton, li akceptis min tre varme kiel unu akceptas malnovan amikon.

Super kafo ni babiladis kaj nur en Esperanto, ĉar tiu estis nia sola komuna lingvo, kvankam li scipovas 4 lingvojn, sed ne la anglan. Mi montris al li fotografiajn de Viktoriaj esperantistoj, kiujn li rigardis kun intereso. Kiam mi donacis al li malgrandan aŭstralian flagon, li akceptis ĝin kun granda plezuro. Li honorigis min donacante al mi aŭtograftan ekzempleron de libreto kiun li verkis "Natan Ben-cion Flavkin, Ekzemplo de homa vivo".

Sinjoro kun barbo li ŝajnis al mi 70-jara, kiel poste pruviĝis. Post kiam mi fotografis lin, li akompanis min al la bus-haltejo. Li ĝentile adiaŭis min kaj petis ke mi transdonu salutojn al aŭstraliaj esperantistoj.

Kiam mi eniris la aŭtobuson, sinjorino kiu observis nin, alparolis min

anglalingve. Ŝi deziris informiĝi pri la nomo de mia amiko, kies vizagron ŝi kredis rememori. Kiam mi informis ŝin ke tiu estas S-ron Josef Kohen-Cedek, la sinjorino rakontis al mi ke antaŭ 2 semajnoj li ricevis la honor-titolon "Eminentia Jerusalemano" pro sia 35-jara pedagogia kaj 45-jara kultura agado en Jerusalemo. Depost 1967 la urbestro de Jerusalemo faris tiun honorigon al dek atestimataj civitanoj, por solenigi la unuigon de la nova kaj malnova urboparto.

Vizitante Atenon mi havis la oportunon telefoni S-ron Georgios Miggas laŭ S-inon Adamantia Sakellaropulu, kiu estas dentistino. Ĉar ŝia oficejo ne estis tre malproksima de mia loĝloko, S-ino Sakellaropulu povis viziti min dum sia sista-tempo kaj ni havis gajan interbabiladon. Mi transdonis salutojn de aŭstraliaj esperantistoj kaj montris al ŝi fotografiajn. Kiam mi transdonis al ŝi aŭstralian flageton, ŝi promesis meti ĝin en taŭgan lokon en la klubejo. Malfeliĉe por mi, mi ne troviĝis en Ateno merkredvespere kiam la Esperanto-klubo kunvenas, nek en Tel-Aviv je jaŭdo, vespero de kunveno de tiu klubo.

—Isabel Gale.

MIA ESPERANTISTA VIVO

de K. G. LINTON

(Fino)

La 13-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en Sidnejo en 1962. D-ro Ross Robbins elektigis prezidanto de A.E.A. Tiun jaron, instigite de D-ro Cyrus Caldera, mi forte penis persvadi Reg Banham entrepreni la Klerecan Diplomon, sed, ĉar li nenio faris, mi direktis miajn pensojn al Len Newell. La reago estis rapida, kaj li gajnis la diplomon kun honoro la saman jaron, do ni jam havis nian Konstantan Triopan Komisionon, kun la rezulto, ke la Provizora ĉesis funkcii. Tamen baldaŭ poste en tiu sama jaro Reg Banham pruvis, ke li vere interesiĝis, kiam li intreprenis la ekzamenon, kaj gajnis la Klerecan Diplomon kun honoro, do antaŭ ol finiĝis tiu jaro la komisiono estis kvaropa. Baldaŭ poste Len Newell fariĝis komisionestro pro la fakto, ke li estis profesia instruisto.

La 14-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en Melburno en 1964. Marcel Leereveld elektigis prezidanto. En tiu jaro mortis tiu tre estimata kaj amata Esperantisto, Bill Drummond, al kiu mi tiel multe ŝuldis. Reg Banham akceptis la oficon de sekretario de la Pyke-Memoriga Fonduso, kiun Bill Drummond s'avice transprenis de Roy Rawson.

La 15-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en Kanbero en 1966. Partoprenis Cecil Goldsmith, antaŭa Generala Sekretario de U.E.A. Elektigis prezidanto de A.E.A. Ivan Maddern. Mi transprenis de Reg. Banham la oficon de sekretario de la Pyke-Memoriga Fonduso.

Ce la Koncerta Vespero D-ro Ross Robbins, kiu jam estis Dumviva Membro de U.E.A., kaj mi kiel ĉefdelegito lanĉis kampanjon por kolekti la sumon de \$1250, kiu estis necesa por donaci ĉambron en la domo de U.E.A. en Rotterdam. Ce la fino de tiu vespero ni povis anonci, ke ni jam kolektis la sumon de \$396, pruvante la sindonemon de la aŭstraliaj Esperantistoj. Ni atingis nian finan celon ĉe la venonta kongreso.

La 16-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en Manlio en 1968, kaj estis organizita de Cecil Goldsmith, kiu transprenis la oficon de sekretario, kiun Herbert Koppel plenumis dum la pasintaj dek ok jaroj. Mi elektigis prezidanto la trian fojon, kaj Audrey Dennys elektigis kasistino anstataŭ mi, kiu servis en tiu ofico dum dek du jaroj.

En tiu jaro ni fine persvadis Fay Koppel entrepreni la Klerecan Ekzamenson. Ŝi tro modeste subtaksis sian kapablon, sed mia juĝo plene praviĝis, ĉar ŝi gajnis la diplomon kun honoro. Ni nun havis kvinopan komisionon, sed tiu forto mallonge daŭris, ĉar Len Newell, post vizito al Londono, mortis en Parizo kurvoje al Italio, kie lia edzino libertempis kun siaj parencoj. Reg Banham lin anstataŭis kiel komisionestro. Mi nun sentis la urĝan neceson aldoni al nia nombro, kaj mi komencis forte serĉi kandidatojn por plenumi tiun esencan rolon.

La 17-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en Perto en 1970, kiam la ĉefa organizanto estis Bill Howard, sekretario de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio. Tiutempe mi komencis persvadi Ruth McGrath entrepreni la Klerecan Diplomon, sed simile al Fay Koppel, ŝi tro modeste subtaksis sian kapablon, kaj ankoraŭ ne ĝin entreprenis. Dum tiu kongreso establiĝis la Honorinsigna Komisiono por honorigi Esperantistojn, kiuj atingis elstarajn farojn por la movado en Aŭstralio. Elektigis al tiu komisiono: Fay Koppel, Volo Gueltling, kaj Ruth McGrath. La sekvintan jaron, 1971, mortis Roy Rawson.

La 18-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso denove okazis en Melburno en 1972. Prof. Robbie Robertson elektigis prezidanto, kaj Russ Baxter akceptis la oficon de sekretario, kiam Cecil Goldsmith esprimis deziron eksoficiĝi. Fay Koppel

pro siaj laboroj en la Ekzamena Komisiono eksigis el la Honorinsigna Komisiono, kaj ŝin anstataŭis nia kara Timmie, kies vera oficiala nomo estas S-ro V. J. Timmins.

La Manlia grupo gajnis la trofeon por sia teatra prezento dum la kongreso. Ĝi estas oficiale titolita "La Herbert Koppel Dramo-Trofeo de A.E.A." Ciu gajninto rajtas teni ĝin ĝis la venonta kongreso. Tiun saman jaron mortis Cecil Goldsmith, kaj la sekvintan jaron mortis Allan Turner, mia iama kunlernanto, kaj prezidanto de A.E.A. por la jaro 1941-42.

La 19-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en 1974 la unuan fojon en Brizbano (Mi rifuzas skribi "Brisbano", ĉar neniu elparolas la nomon tiamaniere). Prof. Robby Robertson elektigis prezidanto la duan fojon. Dum tiu kongreso laŭ la sugesto de Herbert Koppel ni decidis okazigi kune kun la 20-a en Melburno la Unuan Pacifikan Esperanto-Kongreson. Dum tiu kongreso mi notis kaj penis instigi kvar eblajn kandidatojn por la Klereca Diplomo: Trevor Steele, kiu estas tre talenta kaj sufiĉe juna, Ray Ross, Winsom Greenhalgh, kaj Beverley Allatt. Trevor Steele ankoraŭ ne entreprenis la Superan Diplomon pro siaj aktivecoj ĉe la universitato, sed la aliaj tri jam sukcesis pri la Supera kun honoro. La Brizbana grupo gajnis la Dramo-trofeon per teatraĵo verkita de Trevor Steele.

En novembro de tiu jaro mortis Reg Banham, kio estis forta frapo al la movado. Mi transprenis liajn devojn kiel komisionestro, kaj Herbert Koppel transprenis liajn devojn kiel redaktoro de "Australian Esperantist", sed lian morton eĉ pli forte sentis la Ekzamena Komisiono, ĉar restis nur Fay Koppel kaj mi krom la nun jam ne aktiva D-ro Caldera, tiel urĝigante la aldonon al nia nombro. La Honorinsigna Komisiono jam aljuĝis du honorinsignojn respektive al Herbert Koppel kaj Reg Banham, kaj mi havis la privilegion prezenti tiun insignon al lia edzino, Hilda Banham ĉe la Zamenhofa Festo en 1974. La Titolo de la Honorinsigno estas "Fratulo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio", kaj la ricevinto rajtas skribi post sia nomo la literojn F.A.E.A.

La 20-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazis en 1976 en Melburno kune kun la Unua Pacifika Esperanto-Kongreso. Kunlaboris kun ni la Novzelanda Esperanto-Asocio. Alvenis multaj transmaraj vizitantoj. Kiel oni povus facile konjekti, la plej multaj venis el Novzelando, sed

ni tre ĝojis, ke venis 9 el Japanio, sep el Usono, kaj kvar el diversaj landoj de Eŭropo.

Prof. Robbie Robertson elektigis prezidanto la trian fojon kaj Simon Wickenden elektigis sekretario. La honorinsigna Komisiono nomumis tri pluajn Esperantistojn por la Honorinsigno: D-ro Cyrus Caldera, S-ro Ralph Harry, C.B.E., kaj mi. Mi sentis grandan honoron, ke mia nomo aperis kun tiuj du. La Dramo-Trifeon regajnis la Manilia Klubo.

En marto de tiu jaro mi atingis mian sepdekan jaron, kaj mi tre ĝojis kiam la Melburna Esperanto-Societo faris prezentacion al mi. En julio mi plenumis longe sopiratan ambicion, kiam mi ĉeestis la 61-an Universalitalan Kongreson en Ateno, kie mi povis partopreni la inspiraĵajn komitatajn kunvenojn de U.E.A. En decembro de tiu jaro D-ro Caldera atingis sian naŭdekan jaron.

Nun estas la jaro 1977, kiam ni preparas nin por la 21-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, kiu okazos la duan fojon en Tazmanio, ĉifoje en Launceston. La 30-an de junio mortis nia amiko Bill Howard, sekretario de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio kaj organizinto de la 17-a kongreso.

Mia plej grava celo nun estas akiri kandidatojn por la Klereca Diplomo por certigi la daŭrigon de nia Aŭstralia Ekzamena Komisiono. Tiucele mi ĵus verkis Studlibron por Kandidatoj por la Norma Supera Diplomo de A.E.A. bone konstatante, ke el tiuj, kiuj sukcesas tiun ekzamenon kun honoro, ni trovos niajn estontajn komisionanojn.

PRAKTIKA SERCO

Mark Twain iam renkontis ĉe la ĉeval-konkursoj amikon, kiu diris: "Mi perdis ĉiun mian monon; mi ŝatus, se vi aĉetus por mi la reir-bileton al la urbo."

Twain diris: "Bone; mi mem estas preskaŭ senmona, sed mi diras al vi, kion ni faru. Vi kaŝu vin sub mia sidloko kaj mi kovros vin per miaj kruroj".

La alia konsentis kaj Twain iris al la biletejo kaj aĉetis du biletojn. Kiam la trajno moviĝis kaj la supozita kaŝvojaĝanto estis komforte sub la sidloko, la konduktoro venis kaj Twain donis al li la du biletojn.

"Kie estas la alia pasaĝero?" demandis la konduktoro.

Twain signife frapetis sian frunton kaj diris laŭtvoĉe: "Tio estas la bileto de mia amiko. Li estas iom stranga kaj ŝatus vojaĝi sub la benko..."

—P. E. Schwerin.

21st AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-8, 1978 — Launceston, Tas.

Mail your Congress Fee \$13 (Pensioners, Students \$7.50) to the Congress Treasurer, Mr. Mac Le Fevre, 22 Belle Vue Avenue, Launceston, 7250. Add \$10 for Room Deposit at "Tasmanian College of Advanced Education" and enclose a stamped addressed envelope for your receipt.

75. Mr. S. Kanački, Melbourne
76. Mrs. O. M. Chandler, Sydney.
77. Mrs. S. Martin, Brisbane.
78. Mrs. J. Peters, Brisbane.
79. Mr. R. Weis, Toowoomba, Q'ld.
80. Miss C. A. Sullivan, Brisbane.
81. Mr. J. Fallu, Melbourne.
(Supporting Congress Member)
82. Mrs. I. Fallu, Melbourne.
(Supporting Congress Member)

State Distribution: Victoria 25; N.S.W. 25; Queensland 15; Tasmania 9; Western Australia 5; Australian Capital Territory 2; New Zealand 1.

Who will be Congress Member No. 100 ? A.E.A. Assistant Secretary and Editor Herbert Koppell has donated an Esperanto Book for the person who will have Congress Number 100. Mail your Enrolment today to Mr. Mac Le Fevre.

Proponoj por la 21-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso

(1) La postenoj de Sekretario kaj Kasisto de A.E.A. estu kombinitaj, ĉar multaj taskoj de la du oficistoj interrilatas. Se tiu propono estos aprobita, la elektita oficisto bezonos la helpon de kelkaj aliaj, nome por korespondaj kursoj, varbado de novaj membroj, informado, eksterlanda korespondado.

(Les Scott, 34 Ocean Rd., Manly, 2095)

(2) La \$2000 (U.S.), kiujn A.E.A. heredis laŭ la testamento de la angla mondmigrinto William Lionel Simpkins, estu investitaj en registaraj obligacioj, sub la nomo "W. L. Simpkins Memorial Fund". La interezo el la fonduso estu uzata por donaci Esperanto-librojn al bibliotekoj, laŭ proponoj de lokaj Esperanto-kluboj. (Melbourne Esperanto-Societo).

(3) La A.E.A.-Adresaro NE aperu antaŭ la 1-a de majo 1978 por certigi ke la enhavo estu aktuala. La Adresaro, kiu aperis en februaro 1976, enhavis mortintojn, nomojn de kluboj kiuj ne plu ekzistas kaj nomojn de klub-estraranoj kiuj ne estis re-elektitaj en 1976. (Melbourne Esperanto-Societo).

Ĝenerala Kunveno de A.E.A.

La Ĝenerala Kunveno de A.E.A. okazos en la kadro de la 21-a Aŭstralia E-Kongreso en "Tasmanian College of Advanced Education", Launceston, inter la 3-a kaj 6-a de januaro, 1978.

Tagordo:

- (1) Raportoj de la Asocio (Sekretario/Kasisto, Libro-Servo, "Zamenhof Memorial Fund", Redaktoro de "A.E.").
- (2) Elekto de nova Estraro kaj de 3 Kuratoroj de Zamenhof-Fonduso.
- (3) Proponoj de membroj kaj kluboj
- (4) Loko de la 22-a Kongreso
- (5) Eventualajtoj

Kluboj kaj individuaj membroj sendu proponojn por la Ĝen. Kunveno kaj nomojn por la nova Estraro ĝis 15-a de dec. 1977 al A.E.A., 34 Ocean Rd., Manly, 2095. Elektendaj estos prezidanto, 2 Vic-Prezidantoj, 2 Sekretarioj, Kasisto, 3 Kuratoroj por la "Zamenhof Memoriga Fonduso", Public-Oficisto, Libro-Servanto, Redaktoro. L. V. Scott, Aganta Sekretario, Herbert Koppel, Vic-Sekretario.

OFICIALA INFORMILO

Novaj Anoj:

Casey, S-ro G., Mt. Macedon, Vic.
 Craig, F-ino F. M., Toobea, Qld.
 Daniels, F-ino J., Rockhampton, Q.
 Dickenson, S-ino M. P. Holland Park, Q.
 Deans, S-ro J. Darlinghurst, NSW.

Ĝenerala Fonduso:

Leung, S-ro H. C., Rydalmere, NSW	\$5
Koppel, S-ro H., Melbourne	\$5
Oliver, Ges-roj A., Orelia, W.A.	\$5
Leereveld, Ges-roj M., Belgrave, Vic.	\$5
Stevenson, S-ro C., Windsor Gardens, S.A.	\$2
Publica Fonduso:	
Oliver, Ges-roj A., Orelia, W.A.	\$5
F. R. Banham, M.F.	
Hasluck, F-ino D., Cheltenham, NSW.	\$10
Les V. Scott., Aganta Sekretario	

A: Ĉu vin iam trafis akcidento dum viaj multaj vojaĝoj?

B: Jes, unufoje, en tunelo, mi iam erare kisis la patron anstataŭ la filinon.

La ideala loko por pikniko estas kutime iom pli malproksima.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Ce la kunveno de 28/9 Prez. S-ro Hutts bonvenigis Ges-rojn A. Einihovici jus revenintajn de la kongreso en Islando. D-ro Einihovici parolis pri kantisto S-ro Silva, kiu bele kantis ĉe la kongreso kaj S-ino Einihovici ludis sonbendon de la kantado. Si ankaŭ rakontis pri svislandano kiu lanĉis grandegan balonon kun la vorto Esperanto en grandegaj literoj. La balonisto ne estis esperantisto, sed fariĝis intertempe.

Je 12/10 S-ro Hawks montris bildojn pri la regiono ĉirkaŭ Dongarra, ankaŭ kelkajn pri Tahiti. Dimanĉe, 9/10, membroj kunvenis en la hejmo de Ges-roj Dean kaj bonvenigis S-ino Margaret Lister de la E-klubo en Manly.

● **MELBOURNE:** Je la amuz-vespero de 29/8, S-ro K. Linton parolis kun diapozitivaj pri vizito en Anglujo. Ges-roj H. Koppel parolis, 12/9, kun diapozitivaj pri la Suda Insulo de Nov-Zelando. Je 19/9 S-ro Ken Linton denove distris la membrojn, ĉi-foje per rakontoj tradukitaj.

Nia ĉiujara merkat-vespero "American Tea" okazis la 26-an de sept. Ĉeestis nur 14 (lastjare 26). Post vendado de multspecaj varoj kaj lotumado de grandega ĉokolada torto, sekvis luksa vesper-manĝeto. La fina rezulto estis \$43 (Lastjare \$54.60) inklude donacojn de Ges-roj J. Fallu, F-ino A. Hearn (de la Oakleigh-Grupo) kaj Gesroj E. McKenzie, kiuj ne povis persone ĉeesti. Parto de la profito estos uzita por la tutaŭstralia eseo-konkurso de la Pyke Memoriga Fonduso.

● **LAUNCESTON, Tas** Membroj de nia klubo estis gastoj ĉe la edzinigo de Edith Gibson al Ken Kerr je 9-a de oktobro. La ceremonio okazis en la bela ĝardeno "Cliff Grounds" de "Cataract Gorge" dum agrabla vetero. Luksa regalo sekvis la akceptadon de la gastoj.

—M. Le Fevre.

● **MANLY:** Sub la aŭspicioj de la Manly E-Klubo okazis prelego de Skabeno F. Preacher pri vojaĝo al

Norda kaj Suda Vjetnamio (23/9). (23/9).

Dum septembro Eunice Graham kaj Edna Giles vizitis Perton. Eunice vizitis la E-Ligon, dum Edna estis gasto de Eileen kaj Arthur Oliver. Edna raportis pri la multaj interesaj horoj, kiujn ŝi pasigis esplorante la Esperanto-Muzeon en la hejmo de Ges-roj Oliver.

Inter la maloftaj troviĝas tie la unuaj numeroj de la gazeto "Esperanto" (1905) kaj "Heraldo de Esperanto" (1920). Ges-roj Oliver posedas ankaŭ kompletan kolekton de "British Esperantist" de la unua numero el la jaro 1905 ĝis la nuna jaro kaj ankaŭ fotografaĵojn de la fruaj kongresoj, inklude de Felix Zamenhof, frato de la Majstro.

—Edna Giles.

VETERANA ESPERANTO-KLUBO

Laŭ la Statuto de V.E.K., la plej longdaŭra esperantisto ĉe la jarkunveno aŭtomate fariĝas Prezidanto de la Klubo por la sekvanta jaro. Tiel mi fariĝis Prezidanto por 1977-78 dum la jarkunveno en Rejĵaviko Samtempe la Sekretario, S-ino Julie Winter, petis min ĝisdatigi la membroliston por Aŭstralio.

Bonvolu, se vi esperantiĝis antaŭ 1938, sciigi min pri (a) la jaro de via nasikiĝo kaj (b) la jaro de via esperantiĝo. Laŭ la statuto, "Anoj de VEK pagas neniu kotizon". Post 40-jara scipovo de Esperanto, vi estas aŭtomate "Veterano", post 50-jara scipovo "Jubileano". Necesas nur ke vi anoncu vin por esti membro de VEK.

Skribu, do al S-ro E. W. Chandler, 57 Northcote St., Naremburn, 2065. Se vi deziras aldoni resumon pri viaj agadoj por Esperanto dum via longa Esperantista vivo, tio estos ja bonvena. Mi deziras fari raporton ĉe Launceston pri "La Veteranaj de Aŭstralio".

—E. W. Chandler.

RECENZOJ

VIVO DE ZAMENHOF de D-ro Edmond Privat; represo de la 5-a eldono —Jun. 1977—de "The Esperanto Publishing Company", Orelia (W.A.); bele bndita; 133 tekstpaĝoj, 15 fotoj; prezo A\$5.00. Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo.

Jen ankoraŭ unu tre bonvena kaj gravega represo de verko ne malhavenda por ĉiu studento de Esperanto. Ci tiu

biografio pri la kreinto de la lingvo konsistas ankaŭ detalan historion pri la frua historio de la Esperanto-Movado.

Kiu pli bone taŭgas verki pri epoko ol tiu, kiu mem travivis ĝin? Edmond Privat, kiel juna studento, partoprenis la unuan Universalan Kongreson kaj poste vivis kaj kreskis kun la lingvo, farante ne malgrandan kontribuon al ĝi progreso. Lia preskaŭ neimitebla stilo, ĉiam tre mallongaj, simplaj, tamen elegantaj frazoj havigis al lernantoj, ne nur gravan kronikon pri la nasikiĝo kaj fruaj jaroj de Esperanto, sed facilan kaj modelan legolibron por ekzerco.

Precipe interesa rilate la koncernan represon estas, ke ŝajne tiu estas la unua libro presita kaj eldonita en Aŭstralio. Pli fruaj eldonaĵoj, "Pri la Iamaĵ Tasmalianoj" kaj "Esperanto por Infanoj", estas nur broŝurgrandaĵoj. Cetere estas instige al esperantistoj ĉirkaŭ Aŭstralio, ke malnovaj samideanoj Ges-roj Arthur kaj Eileen Oliver nun dattirigas la laboron de "The Esperanto Publishing Company" en Okcidenta Aŭstralio.

—F.K.

KIEL AKVO DE L' RIVERO: de Raymond Schwartz; represo de Dansk Esperanto-Forlag; 488 paĝoj; 2-vol. broŝ.; prezo \$9.65. Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo.

Originale verkita en Esperanto, tre bonvene reapertis en la listo de haveblaj libroj ĉi tiu longa—sed neniel tro longa—romano, kies unua eldono ĉe Stafeto en 1963 rapide elĉerpigis. Unu el tro malmultaj tiaj verkoj en la internacia lingvo, la romano ampleksas du militepokojn. Pli precize, la unua pritraktas nur proksimume dek du monatojn, kondukantajn al, kaj tuj post, la eksplodo de la unua Mondmilito, kiu apartigis geamantojn dum pli ol dudek jaroj. Rilate la intermilitan periodon, la aŭtoro tiris dikan kurtenon inter la heroon kaj la legonton, sed ĉi lasta sekvos kun streĉa interesiĝo la aventurojn de tiu "heroo", Pierre Touchard, en la du koncernaj epokoj. Neniel superhoma estas tiu heroo kaj la legonto eble iom ŝokigos, kiam Pierre, apenaŭ retrovinte sian amatinon, savas sin de arestiĝo, lasante ŝin al la senkompata Gestapo. Malgraŭ tio, la posta sorto de ambaŭ okupas ankoraŭ sufiĉe da absorbe interesaj paĝoj.

Tuj atentokapta kaj amuza, la enkonduka sceno prezentas la heroon kiel gaston ĉe edziĝofesto de la frato. Simile vivoplenaj kaj informaj laŭ detaloj estas priskriboj pri aliaj kampoj de agado; ĉu bildiĝas partopreno en studenta fest-

vespero en Parizo, aŭ, post proksimume jaro, alia en Germanujo; ĉu temas pri vivgajna jaro inter Berlin-anoj aŭ enmiksiĝo en la rezistmovado de Marsejlo. Samkiel la akvo de l'rivero nia heroo, ne superhoma, nur home homa, portate de la fluo de eventoj, travivas sorton grandparte preter lia regado. Tian sorton spertas ja la granda plimulto de la homaro laŭ la filozofio de rolulo en la rakonto, kredeble ankaŭ de la aŭtoro.

Pri Ramond Schwartz kaj ties verko, F. R. Banham en "A.E.", Nov-Dec., 1963, skribis, i.a., "Homo de du kulturc'j, li ame sane observas bonajn kvalitojn ne nur en la Francaj 'mez-homc'j', sed ankaŭ en Germanaj. Ĉiun plumstrekon li faris laŭ largmensa humaneco kaj indulga komprenemo."

Fidèle reproduktinte, numere kaj enhave, la paĝojn de la unua eldono, la represo prezentas unu malavantaĝon — ripeton de eraraj, cetero tre malmultaj, inklude preserarojn. Tamen surprizas sur paĝo 23, la lokigo de la akuzativo ĉe la unua, anstataŭ la dua, korelativo, en la frazo "Eble tiujn, kiuj ni preparis hieraŭ, ne sufiĉos". Kritikenda — en prozo — estas ankaŭ la ofta elizio de la artikolo; sed jen nur bagateloj en verko, kiu estas vera trezorejo de bonstilaj esprimoj.

—F.K.

STUDLIBRO POR LA SUPERA. de Ken G. Linton.

Prezo: \$2.50 havebla de A.E.A. Libro-Servo.

Ĉi tiu kapable ellaborita kurso plenumas la bezonon de gvidlibro al la lingva nivelo de la "Supera".

La libro estas verkita en facile komprenebla lingvo, kaj la multaj klarigoj kaj ekzemploj estas plaĉe bonvenaj. Ĝi indikas al la studento kion kaj kiam li devus scii pri gramatiko kaj stilo antaŭ ol submeti sin al ekzameno.

Mi ŝatas precipe la ĝisfundan traktadon de la refleksiva pronomo kun la abundaj ekzemploj; ankaŭ la klarigon pri la prepozicio "de".

Pro tio ke la kurso ne ampleksas la tutan gamon de gramatiko, estas supozinde ke aspiranto al diplomo jam posedas sufiĉan scion de la elementaj reguloj. Tamen, laŭ mia observo, estas du oftegaj pekoj kontraŭ la gramatiko. Ambaŭ rilatas al la verbotempo. Unue, la neĝusta uzo de la, perfekta preterito kie estas deviga la perfekta prezenco; kaj due, la manko de atento al la "logika" verbotempo, kiun multaj kursanoj tute ignoras. Mi kontente vidus klarigojn en la kurso pri tiuj gramatikeroj.

Sume, ĉi tiu klare elpensita kurso certe helpas al studentoj eviti la enfale-

jojn de Esperanto-gramatiko, kaj estas alte rekomendinda al progresintoj kaj aliaj, kiuj celas kompetentecon en la internacia lingvo.

—V. J. Timmins.

STELISTA RUZO

Farmisto Petro havis ege belan ĉevalon, pri kiu li tre fieris. Lutage li rajdis sur ĝi en la urbon kaj zorgo ligis la beston al la alkroĉ-fosto antaŭ la loka trinkejo.

Du ŝtelistoj, kiuj rapidis tra la urbo, hazarde ekvidis la ĉevalon kaj decidis ŝteli ĝin. Ili sentis, ke la ĉevalo estas multe tro bela kaj valora besto, por esti ŝtelita laŭ la ordinara maniero: do ili decidis plenumi sian planon per speciala artificio.

Unu el ili haste malligis la ĉevalon kaj rapide forrajdis sur ĝi. La alia restis ĉe la fosto. Post iom da tempo la farmisto elvenis el la trinkejo, Vidante, ke lia ĉevalo ne plu estas tie, li ĵus volis ekkriegi, kiam la ŝtelisto iris al li. Per mallauta, trema voĉo li diris: "Sinjoro, mi estas via ĉevalo. Antaŭ jaroj mi pekis kaj pro miaj malbonaj faroj mi estis punita; mi estis ŝanĝita en ĉevalon. Hodiaŭ mia kondamnaĵo finiĝis, kaj mi povos esti liberigita, se vi afable permesos tion".

La farmisto, iom miregita sed kortuŝita de tiu rakonto, forsendis la viron dezirante al li feliĉon en lia nova vivo.

Kelkajn semajnojn poste la farmisto iris al foiro en najbara urbo. Ĝe, sia granda surprizo li vidis tie sian ĉevalon por esti vendota. Rigardante longtempe la beston, por konvinkiĝi ke liaj okuloj ne trompas lin, li diskrete transiris kaj flustris en la ĉevalan oreleon: "Ĉu vi do pekis denove . . . ??"

P. E. Schwerin.

SI: Mi opinias vin malĝentila veni nerazite al nia rendevuo.

LI: Sed, kara mia, mi certigas al vi, ke mi estis bone razita, kiam mi alvenis ĉi tie antaŭ du horoj.

THE AFFAIRS OF MEN: The Esperanto movement is neutral — and therefore tolerant — concerning politics (and religion).

Thus, we have Conservative, Liberal and Labour Party members of the House of Commons who are Esperantists.

Since Jan., 1977, when the British Trade Union and Cooperative Esperanto group was formed, there has been growing support from those holding high office in the British labour movement.

NEWS - DIGEST

TONGUES OF MEN: Dr. de Salvo recently examined 32 laws and agreements of an international nature in Europe. Which language, he asked, is the most frequently used?

Would you say "English"? No, probably the answer is "French". Of the 32, 24 used French either exclusively or conjointly . . . Examples? A treaty between Italy and Yugoslavia: official text in French, with "translaticons" into Italian and Yugoslav languages. When the Italian representative of the Atomic Energy Agency wrote to the Swedish Director General, he wrote in French. An agreement between Italy and Hungary is, officially, in French. A Dutch "accord concerning military damage" stated that "in case of divergence of interpretation, the 'neutral' French text will be decided". A London-Moscow agreement about "molecular biology" was also in "neutral" French.

A notable exception was an agreement between Italy and Turkey about submarine cables. It was in — English.

Yet French and English are NOT neutral languages. Esperanto is.

AND FOR ANGELS ? If there are sentient beings on Jupiter, Saturn, Uranus etc. 40,000 years from now, what concept will they have of us — Earthlings — in our year 1977?

Well, a craft has been launched into space as "a bottle cast into the cosmic ocean" to give some notion of what we are like.

IF, in ages to come, the capsule is intercepted and IF the interceptors have appropriate receivers, and ears to hear and eyes to see and minds to understand, those who are light years and aeons away will get a very fair idea of what we were (yes, "were") like.

The capsule contains 116 pictures and a 2-hours' playing disc setting forth the sights of our technology, of eating, dancing, working, playing etc.) and sounds (from Bach to the baying of dogs) of the everyday Earthman.

What has this to do with Esperanto? As usual, Esperantists have "a finger in the pie". Yes, you've guessed it! The

Australian Ambassador to the United Nations, Ralph Harry, has included a greeting in Esperanto. The text:—

"Friends, I am speaking to you from the planet Earth. I represent Australia, the island continent in the southern hemisphere of the planet. We strive to live in peace with the people of the whole world, of the whole cosmos, and to labour with them for the common good of every human being. I greet everyone who understands. Farewell!"

TO COOL OUR FLAMING PREJUDICES: There are "clouds" in the skies of academics and teachers in such diverse lands as:

Canada — The Education Minister of British Columbia is arranging for Esperanto correspondence lessons in schools.

Brazil — The University of Santo Andre has 175 students taking Esperanto.

France — University of Clermont-Ferrand students may choose Esperanto in 1st and 2nd year.

Austria — Four teachers of English have passed examinations in Esperanto which they intend to teach in secondary schools in Vienna.

Germany — There are 13 Esperanto classes in Paderborn.

Holland — The second laboratory course has begun in Nijmegen.

New Zealand — A new experiment for Esperanto in schools.

Bulgaria — The Pestera Technical College has Esperanto classes.

U.S.S.R. — At Krasnojarsk University in Siberia, Esperanto is in the curriculum.

Taiwan — At the Catholic University there are 120 Esperanto students.

Venezuela — The Central University provides Esperanto courses.

Will these "clouds" give birth to refreshing downpours to cool linguistic prejudices?

NOT WITHOUT HONOUR IN THEIR OWN COUNTRY: Finally, right back to home. Here is a piece of Australian information previously unknown to me, perhaps to you. I gleaned it from Pilo Press, published in Nuremberg.

Ken Linton, Herbert Koppel, Ralph Harry and Dr. C. Caldera have the right to write (yes, that's right, "the right to write") "F.A.E.A.", after their respective names. "F.A.E.A."? — "Fratulo de A.E.A."

—Credits: Heroldo, Pilo Press, Informilo.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Advertisements: 25 cents per line.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063
Kasisto/Sekretario: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 159 (239)

MELBOURNE

Decembro, 1977

ĈE LA ANTAŬKONGRESO

(kun Prof. R. Robertson)

Mi intencis forlasi Aŭstralion tuj, post la emeritiĝo por ĉeesti la feston de la skotaj klanoj en Edinburgo, je la fino de Aprilo. Tiu festo okazas nur dufoje en ĉiu jarcento: estas nekredeble, ke mi povos ĉeesti la venontan. Bedaŭrinde kiam mi konsultis la kuraciston antaŭ la foriro, li ordonis, ke mi eniru malsanulejon kiel eble plej frue. Oni operaciis; mi postvivis; sed ne povis ekveturi ĝis la fino de Junio. Mi devis prizorgi gravajn familiajn aferojn en Anglio ĝis preskaŭ la fino de Julio, kaj mi sentis min pli feliĉa, ŝoforite de la edzino en luita aŭtomobilo tra bela landlima pejzaĝo al la universitato de Stirling.

Tie mi renkontis denove du malnovajn amikojn ĉe la pordo de la akceptejo, S-ron W. Chandler el Sidnejo kaj S-ron W. Auld el Dollar, la konata poeto kaj bona organizanto, kiu respondicis pri la antaŭkongreso. Ni baldaŭ trovis niajn komfortajn ĉambrojn en "Geddes Hall", studenta loĝejo. Post la bongusta kaj pleniga ĉefmanĝo okazis interkonatiĝa vespero. Por atingi tiun kunvenon kaj aliajn oni devis trapasi ponton super la lageto en la mezo de la universitata tereno. Feliĉe la vetero estis bonega dum la tuta kongresperiodo, kaj piediro ĉiufoje estis pfezura sperto sen la kutima malsekeco de la skota klimato.

La interkonatiĝo daŭris neformale en la universitata klubo, kaj la antaŭkongresanoj ĝuis trinkaĵojn kaj babiladon en malnova komforta klubdomo.

Matene oni povis ĝuste aprezi la belecon de la pejzaĝo ĉirkaŭ la blua lageto kaj apud la kruta deklivo de la Abateja Roko, kie staras pitoreska turo, monumento al skota heroo, William Wallace, kiu venkis anglan armeon ĉe Stirling Bridge antaŭ 680 jaroj kaj poste estis kaptita kaj kruele ekzekutita de la angloj. Post lia morto, Robert Bruce iĝis reĝo de la skotoj, kaj finfine venkis la anglojn ĉe Bannockburn sur marĉa kampo apud Stirling. Miaj propraj antaŭuloj marŝis kun Wallace kaj Bruce; pro tio la loko tre interesas min. Tiel plaĉis al ili la kuraĝa sinteno kaj fina

If "The Australian Esperantist" arrives incorrectly addressed, or if you should change your address, please supply correct details to our Despatch Officer:

Mr. Jack FALLU
10 Sumersett Avenue,
Oakleigh South, Vic., 3167

sukceso de Robert Bruce, ke la estro de la klano, tiutempe Duncan, decidis nomi la unuenaskitan filon kaj heredonton "Robert". La kutimo ankoraŭ daŭras post 650 jaroj, kaj mia patro, mi mem, kaj mia filo ĉiuj estas "Robert Roberts".

Multaj kongresanoj vizitis ekskurse la deklivon, kaj grimpis la turon. La spirala ŝtuparo estas alta kaj abrupta, sed ĉe ĉiu interŝtuparo oni rajtas halti kaj rigardi interesajn ekspoziciojn pri Wallace, Bruce kaj aliaj famaj skotoj. La glavo de Wallace pendas sur la muro; ĝi estas 1.6m. longa, taŭga armilo por heroo. Oni povas vidi ankaŭ memorajojn de William Gladstone, skota ĉefministro de Anglio. Ne necesas por ĝi fama en Skotlando, esti nomita William, kiel Auld, Gladstone, kaj Wallace. Ekskurse ni vizitis ankaŭ la batalkampon Bannockburn, kaj la ekspozicion pri la batalo de 1314. Tiun malfermis en 1964, post 650-jara intervalo, Reĝino Elizabeta la 2a de Anglio kaj la 1-a de Skotlando, kiel diras la skotoj, kaj tie staras granda surĉevala statuo de Robert Bruce. La impona kastelo de Stirling estas videbla, kelkajn kilometrojn for, kaj estis kaptita post la batalo sen plua lukto. Legendo rakontas pri la lasta batalo de Reĝo Arturo apud tiu kastelo, kaj laŭ mi, ĝi aspektas pli bela kaj estas eĉ pli interesa ol la fama kastelo en Edinburgo.

Ni ĝuis ankaŭ ekskurson al Edinburgo, la ĉefurbo de Skotlando, kie loĝis antaŭ naŭ jarcentoj Reĝo Malcolm la 3a, filo de Duncan, la reĝo murdita de Macbeth, kiel rakontis Sekspiro. La edzino de Malcolm, Sankta Margareta, konstruigis kapelon, la plej malnovan konstruaĵon ankoraŭ uzatan en Edinburgo. Ĝi staras en la korto de la kastelo. El tiu vidpunkto oni povas vidi la belan ĉefurbon kaj precipe la faman Straton de la Princo. Spaco mankas por priskribi la multajn antikvajn konstruaĵojn kastelojn kaj monaĥejojn en tiu regiono, sed mi nepre devas ne forgesi la ekskurson al la "Trossachs"; tiu signifas "hirta" kaj efektive la pejzaĝo estas sufiĉe tia. Ege pitoreska estas la lago "Katrine" en la hirta regiono.

Inter ekskursoj ni ĉiutage ĉeestis prelegojn pri skota kulturo kaj literaturo, kaj aŭskultis poezion legatan de la poetoj mem; estis granda privilegio aŭdi la voĉojn de S-ro Auld, D-rino Boulton kaj S-ro Goodheir; mi skribas la nomojn laŭ alfabetaj ordo, kompreneble, la nomojn konatajn al ĉiuj amantoj de nia Esperanto-poezio. La deklamarto de la

verkistoj mem donis novajn nuancojn al ĉiu frazo kaj strofo.

La organizantoj luis ĉambregon en Bridge of Allan, apuda urbeto, por prezenti skotan muzikon kaj dancarton al la antaŭkongresanoj kune kun la K.E.L.I. kongresanoj alvenintaj el Edinburgo per aŭtobuso. La sono de la sakŝalmo pli taŭgas al subĉiela festvespero, laŭ kelkaj surprizitaj eksterlandanoj, sed plejparte ĉiuj alte estimis la muzikon kiel neordinaran kaj ĝuindan. La kantistoj, muzikistoj kaj dancistoj plaĉis al ĉiuj, kaj la poezio denove tuŝis la koron.

Alivespere la ĉefa dancisto ĉeestis denove en la universitato, por instrui nin kiamaniere partopreni la skotajn dancojn anstataŭ nure rigardi. Li tre lerte montris la danĉpaŝojn al ni, kaj la plej aktivaj kaj kuraĝaj el ni penis kopii la facilmovan spertulon. Samideano Braha el Israelo eĉ surmetis kilton por sin prezenti pli taŭge vestita, kaj per vigla saltado distris ĉiujn. S-ro Auld montris sin lerta, kune kun la ĉarma edzino; ili ambaŭ multe kontribuis al la granda sukceso de la tuta antaŭkongreso. Tiuj kiuj mem organizas kongresojn bone komprenas la grandan kaj langdaŭran laboron necese entreprenitan por sukcesi tiujn aferojn. Gesroj Auld estis ĉie kaj ĉiam helpemaj, ŝajne nelacigeblaj de la komenco ĝis la fino.

Tro frue alvenis la fino de la ĝuinda antaŭkongreso. Per aŭtobusoj la karavano forlasis la universitaton por atingi Glasgowan aerhavenon kaj ĝisfine brilis la suno. Ĉu vere, la tutan tempon, ĉiutage? Tio estas maloftaĵo en Skotlando, laŭ la angloj. Kredebl: ni gajnis tiun impreson per la varma gastamo kaj konstantaj ridoj de la skotoj, kiuj tiel afable aranĝis ĉion.

La fiŝo, kiu grimpas sur arbojn.

Kiel oni scias, la plej multaj fiŝoj ne povas vivi sen akvo. Fakte, oni ofte diras pri personoj, kiuj estas ekstere de sia kutima ĉirkaŭaĵo, ke ili estas kiel "fiŝo ekstere de akvo". Se fiŝo estas metita eksteren de sia natura elemento, ĝi spasmospiras dum ioma tempo kaj baldaŭ mortas, ĉar tuj, kiam ĝiaj brankoj ne plu estas malsekaj, ĝi ne povas spiri.

Sed ekzistas iu stranga fiŝo (Anabas scandens), kiu ofte forlasis la akvon kaj fakte surgrimpas la ĉe-bordajn palmojn. Tiu "Grimpanta Perko" vivas en Cejlono kaj Hindujo.

Ĝi ĉiam havas bona kaŭzon por foriri el sia akva hejmo; ĝi pensas pri vagado nur, se ĝi timas, ke sekeco minacas kaj ke lageto aŭ rivero, kie ĝi kuŝas, povus

sekiĝi. Ĉar ĝi ne volas surgrundiĝi, ĝi komencas serĉi pli profundan laĝeton aŭ riveron. Ĝi posedas dornajn naĝilojn, kiuj ebligas al ĝi, 'iri' trans la grundo serĉante novan hejmon.

Kial tiu perko ne mortas samkiel alia fiŝo, kiu troviĝas ekstere de akvo? La respondo estas, ke ĉe ambaŭ flankoj de sia kapo ĝi havas specon de provizejo, en kiu ĝi povas amasigi provizon de akvo; tiu tenas ĝiajn brankojn malsekaj kaj donas al ĝi ŝanco spiri, ĝis kiam ĝi atingos la sekurecon de alia akvujo.

Eble daŭros longtempe, ĝis kiam la perko trovos tian laĝeton. Se tio okazas, la saĝa eta fiŝo scias, ke ofte oni povas trovi akvon en la kavetoj ĉe la palmaj petioloj. Ĵen ĝia lasta espero! Do, se ĝia provizo de akvo preskaŭ nuliĝis, ĝi komencas grimpi sur arbon; ĝi alkrōas sin al la arbo-ŝelo per siaj brankokovriloj kaj uzas siajn dornajn naĝilojn kiel grimpilojn. La vojaĝo estas tre malrapida, sed ofte ĝi finfine atingas sian celon sukcese kaj trovas la karegan akvon, kiu por ĝi signifas novan vivadon.

—P. E. Schwerin

SIGMUND FREUD

Prelego farita de D-ro Karl Beckmann en la Kurtonda Esperanto-Servo de "ORF" (Aŭstria Radio)

En la tuta mondo la nomo de Sigmund FREUD apartenas al tiuj de la plej bone konataj personecoj de aŭstra origino. Ĉie en la mondo, speciale en la anglosaksaj landoj, la ĉefprincipoj de lia instruo estas sufiĉe popularaj — kiu eĉ nur meze klera homo ne havas almenaŭ scieton pri la "subkonscio" kaj ĝiaj psikaj "kompleksoj", "forpremitaj deziroj" — precipe seksaj — ktp. ?

Laŭ la malnova proverbo, ke neniu povas esti profeto en sia propra patrio, ne estas mirige, ke Sigmund FREUD spertis, ĉiam malpli da rekono kaj kompreno en Aŭstrio ol aliloke sur la tergloblo.

Pasis, do, post lia morto tuta generacio, antaŭ ol la Viena urbkonsilantaro decidis ke la loĝejo en Berggasse n-ro 19, kie Sigmund Freud vivis dum duona jarcento, estu konservata kaj entenu kiel digna memorloko, specialan Sigmund FREUD-muzeon. Tiun muzeon ni nepre vizitu!

Berggasse, t.e. "monta strato", nomiĝas tiel ne tuĝe malprave. Kvankam ne ĝuste "monta", tiu strato estas almenaŭ iom dekliva. Ĝi situas tre proksime al la pompa universitata ĉefkonstruaĵo, al la sobre simpla, jam ducentjara Generala Hospitalo kaj al nombro da aliaj mal-sanulejoj, klinikoj kaj similaj institutoj, kiuj koncentriĝas en la regiono de "Alsergrund", la okulfrape medicina kvartalo de Vieno.

En la hodiaŭa aspekto de Berg-strato ankoraŭ superregas la jam multe arkaiĝinta modesta stilo de la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Sed n-ro 19 prezentiĝas pli moderna, en la pompo kaj relativa lukso de la jarcentfino. Do Freud ekloĝis tie, en la jaro 1891, en medio, por la ekstera renomo de ordinara kuracisto sufiĉe favora.

Ankaŭ nun la domo estas, ĝenerale,

tia kia ĝi estis tiam. Nur la origine lignan pordegon anstataŭas modernaĵo el vitro kaj metalo kaj la ĝardeno cedis al garaĝoj. La loĝejo de la familio FREUD okupis, kun vidalvidaj du enirejoj, tutan etaĝon. La duono, kiu entenis la konsultejon kaj studĉambrojn de la granda majstro, prezentiĝas nun kiel muzeo.

Dekstre de la mallarĝa vestiblo, kies originan ekipon oni proksimume reinstalis, troviĝas la same reekipita porpacienta atendejo kiel pie inspira memorloko kaj kiel ŝatinda specimeno de la tiutempa medio — kun sia eksmoda meblaro, riĉa je veluro kaj remburo. La konsulta kaj la studa ĉambroj estas nun la esence muzeaj ejoj. Centoj da ekspoziciaĵoj — ĉefe fotoj, dokumentoj, libroj — ilustras — sed, kompreneble, ne volas anstataŭi — la biografion de la viro kiu dum tiom da jaroj kuraciste tie laboris kaj esploriste studadis.

La ĉambroj maldekstre de la vestiblo entenas la ampleksan, por ĉiu alireblan, bibliotekon kaj legejon de la Internacia Freud-Asocio.

Por la daŭro de la rigardado ĉiu vizitanto de la muzeo ricevas ekzempleron de detaleme klariga, riĉe ilustrita katalogo.. Ĝi estas ankaŭ aĉetebla, same kiel aliaj koncernaj libroj, bildoj kaj memoraroj, je ne tro alta prezo.

La gast-albumo (aŭ memorlibro) montras, iom surprize, ke preskaŭ ĉiuj el la konsiderinde granda nombro da vizitantoj estas anglosaksaj. La raportanto, estante "nura" Vienano, estis bonvenigata kvazaŭ kiel 'blanka korvo'. Kaj kiam li menciis, ke li volas raporti pri la Freud-Muzeo en la Esperanto-programo de Radio Vieno, la estrino ĝojigite tuj rememoris la viziton de "Esperantista profesoro" el Rochester en Norda Ameriko okaze de Viena Esperanto-arango en la antaŭpasinta aŭtuno.

Do, karaj geaŭskultantoj, se vi venos Vienon, faru viziton, sendube penvaloran, ankaŭ al la Sigmund Freud-Muzeo, kaj menciui tie, ke instigis vin la Viena Esperantolingva Radio-Servo.

21st AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

Jan. 2-8, 1978 — Launceston, Tas.

Mail your Congress Fee \$13 (Pensioners, Students \$7.50) to the Congress Treasurer, Mr. Mac Le Fevre, 22 Belle Vue Avenue, Launceston, 7250. All \$10 for Room Deposit at "Tasmanian College of Advanced Education" and enclose a stamped addressed envelope for your receipt.

If you arrive in Launceston and need urgent help, you may telephone the Acting Congress Chairman, Mr. M. Le FEVRE, Tel. No. 44-2135, or the Congress Secretary, Mrs. Lyn Carswell, Tel. No. 44-2576.

PYKE — MEMORIGA KONKURSO

"KIEL REAKTIVIGI NE PLU AKTIVAJN ESPERANTISTOJN"

Kiel anoncote en antaŭaj numeroj de nia gazeto, ESEO-KONKURSO pri la supra menciita temo estis aranĝita. Tri juĝantoj, unu el Brisbano, unu el Sidnejo kaj unu el Melburno, prĵiĝis la ricevitajn esojn kaj la plimulto el ili decidis ke la gajninto de la premio estas

S-ino Dorothy Threlfall el Perth, ŝi ricevos senkoston flugbileton de Melburno al Launceston kaj revene, por partopreni la 21-an Aŭstralian Esperanto-Kongreson.

Partoprenontoj de la kongreso havos la oportunun aŭskulti la tekston de la premiita eseo.

LIBERECO

Libereco ne estas donaco, ĝi estas stato de la animo. Homo povas esti libera eĉ sub diktatoro. Sufiĉas, ke oni luktu kontraŭ mallibereco. Tiu, kiu pensas per sia propra cerbo, estas libera. Tiu, kiu batalas por tio, kion li konsideras justa, estas libera homo. Eĉ tiu, kiu loĝas en la plej libera lando en la mondo, se li estas maldiligenta, senkompata, apatia, kaj ŝanceligema, ankoraŭ estas nur sklavo. Ne petu por libereco. Vi devas ĝin preni.

AŬSTRALIA = =KRONIKO

● **PERTH:** Ĉe nia kunveno de 26-a de okt. ni bonvenigis S-rinon E. Strawbridge el Insulo Kangaroo (Suda Aŭstralio). S-ro W. Illingworth prelegis pri vojaĝo sur la rivero Rhine kaj S-ino Ruth McGrath montris interesajn diapozitivajn pri Skotlando. Samtage grupo da Liganoj vizitis S-inon Sue Howard, la vidvinon de nia mortinta sekretario Bill Howard, por prezenti al ŝi pentraĵon. S-ino Howard forlasos Okcidentan Aŭstralion por loĝi en Surfers' Paradise.

Je 9/11 la ĉefparolinto estis S-ino Ruth McGrath, kiu priskribis la kultivadon de arakidoj en Kvinslando.

● **MELBOURNE:** Gastparolanto ĉe nia kunveno de 10-a de oktobro estis S-ino Irene Courtenay, kiu tre vigle kaj bildige priskribis viziton, kiun ŝi faris al la prahistoriaj kavernoj de Altamira en la regiono de Santander de norda Hispanio. Tie troviĝas, sur muroj kaj plafonoj, vivsimilaj kolorpentraĵoj, faritaj de "primitivaj" kavernuloj antaŭ 45,000 jaroj. Ĉi tiuj ŝajne estis pentritaj en mallumo, kaj konserviĝis nur pro la mallumo. Pro tio turistaj vizitoj estas severe kontrolataj kaj limigitaj.

S-ro H. Beechey, 17/10, parolis pri "Bio-ritmoj", kiuj, laŭ nova sciencstudado, forte influas la vivon de ĉiu homo. La tri ritmoj, kiuj komenciĝas tuj kun la naskiĝo (je meza nivelo) varias laŭ intenso, depende de la homaj karakteroj, sed ne laŭ longeco—de zenito al nadiro—kaj nomiĝas: Fizika (23 tagojn), Emocia (28), Intelekta (33). Por reprezentanti ilin sur grafikajoj, oni uzas la kolorojn "ruĝa", "blua" kaj "verda", respektive. Surprize, la krizaj tagoj por la homoj ne okazas ĉe la plej altaj aŭ malaltaj niveloj, sed ĉe la mezaj, la lokoj de ekfunkcio kaj de ŝanĝiĝo. Nun estas eble antaŭe kalkuli la krizajn tagojn por esti tiam pli ol ordinare zorgemaj, kaj en Japanujo, oni jam sufiĉe serioze pritraktis la kalkulojn, precipe por taksistoj kaj motorbiciklaj telegram-liveristoj, por signife malpliigi la nombron de veturilaj akcidentoj.

Je 24/10 S-ro H. Koppel raportis pri sukcesa Esperanto-Seminario en Drouin kaj poste S-ro S. Kanaĉki priskribis la kultivadon kaj produktadon de koton.

Okaze de la Societa Vespero je 31/10, S-ro Ken Linton montris diapozitivojn kaj parolis pri siaj esploroj de Londono.

La grupo en MALVERN raportas ke ĝia "Fonduso" por specialaj celoj" atingis la celon, nome la sumon de \$1000. La grupo investis tiun sumon je 9-procenta interezo. La grupo nun abonas "Heroldon de Esperanto" kaj zorgas ke ĉiu membro legu ĝin por resti en pli intima kontakto kun la Esperantomovado.

● **MORWELL:** S-ro Ivan Maddern fariĝis membro de la "Legion of Frontiersmen", kiu estas ceremonia regimento, kies komandanto estas Lt. Generalo Sir Denzil Macarthur-Onslow. La legiono prezentis al S-ro Maddern sian plej altan honorigon, la "Aŭstralian Merit-Medalon", pro lia longa kaj eminenta servo al edukado.

● **MANLY:** Je 28/10 Eunice Graham montris diapozitivojn ricevitaĵojn de ŝia flino Jane, kiu nuntempe estas en Hindujo. Estis interesa priskribo de Ladakh, danĝera parto de Hindujo, por atingi Simla, nuntempe la hejmo de la Dalai Lama.

La vespero finiĝis en la hejmo de Ges-roj Ross kie ni renkontis Mary kaj Geoff Myers, novaj membroj de nia klubo. En 1973 S-ro Geoff Myers instruis Esperanton en la ŝtata lernejo de Orange.

—Edna Giles.

● **BRISBANE:** 17/10/77. Bev Allatt estis la gastparolanto ĉe Brisbane Rotoract Club, poste la Societo ricevis dankleteron pro tre interesa temo, Esperanto.

Dum la semajno 14-19 Novembro, la Societo partoprenis en "Brisbane Hobby Show", en la urbdomo. Anoj prizorgis la Esperantan Budon vice dum la 72-hora periodo; vendis "Esperanto for Beginners" (43); kaj disdonis foliojn "Esperanto at a Glance" (1000) kaj reklamojn pri kurso por komencantoj 1978 (400). Samtempe respondis al demandoj de ĉi tiuj interesatoj. Entute ĉirkaŭ 15000 ĉeestis la ekspozicion dum la semajno.

26/11/77. Dek tri anoj vizitis al Toowoomba je la okazo de la Zamenhofa Festo kaj ege ĝuis la tutan vesperon; la rostmangajon unue kaj poste la programon ĉe la hejmo de Bob Weis. Reciproke anoj de Toowoomba vizitis al nia festo la 3-an de Decembro.

Annie Spencer, klubano, vizitas al Perto kie ŝi instruas pri "Unity", sendube ŝi renkontos tie samideanojn.

Estis nia plezuro ankaŭ ricevi viziton de Esp-isto el Anglujo, John McKlenn, plumamiko (Esperante) dum multaj jaroj de unu el niaj membroj.

—R. Ross.

La Brisbana E-Societo ricevis donace la tutan Esperanto-libraron de antaŭa membro, Kavalirino Violet Fraser: ĉirkaŭ 150 libroj, libretoj ktp., multaj ne plu acetebblaj. Tre plaĉas al ni, kaj ni vere estas tre dankemaj al Kavaliro Douglas Fraser pro la donaco. — R.R.

● **ST. LUCIA:** Ĉi tiun jaron tre seriozaj studentoj laboras. En la klubo, tri virinoj jam finis la progresigan kurson "Step by Step". Du - tri finos post kelkaj semajnoj.

Ni esperas, ke la venontan jaron ĉi tiuj konsistigos bonan klason, por ke ili provu la superan ekzamenon. Por tio la nova "Studlibro por la Supera Ekzameno" de Ken Linton estos tre helpema.

Du malgrandaj kursoj por komencantoj laboras. Tie nia perdo estis granda; kelkaj foriris el Brisbano kun edzoj, aliaj al malsanaj parencoj, kaj aliaj komencis tutage laboron. Sed ni bonvenigis Mary Stephenson post multjara foresto.

Kia mirinda jaro estis! Kontakton kun eksterlandaj esperantistoj mi spertis en Japanujo; Annie Spence vizitis Pollandon, Ruth Morrison partoprenis la Universalan Kongreson en Islando. Ĉiuj ĝuis la prelegojn pri tiuj spertoj.

Bonan Kristnaskon al ĉiuj esperantistoj!
—Margaret Jones.

● **TOOWOOMBA:** La membraro kunsidis, 14/11 ĉe la prezidanto por aranĝi aferojn pri la Zamenhofa Festo, kiu okazos 26-an de novembro ĉe Ges-roj R. Weis. Vizitontoj ĉeestis en Brisbane; la lokaj anoj entuziasme preparas gastigi kaj distri ĉiujn.

Dum unu semajno en novembro, de la 14-a ĝis la 19-a, niaj membroj prezentis ekspozicion de libroj, revuoj kaj korespondadoj ĉe la municipa biblioteko. Ĉiuj prizorgis entuziasme la ekspozicion, kaj respondis al demandoj, kaj disdonis informilojn. Dum la semajno, la lokaj ĵurnaloj, radio-stacioj kaj televid-programoj reklamis la ekspozicion, kaj reklamoj aperis en la montrofenestroj de kelkaj vendejoj.

Esperanto-kurso rekomenciĝos en februaro ĉe la "The Centre for Technical and Further Education" (antaŭe "Adult Education").

● **SYDNEY:** Parolante (25/8) pri "Spertoj de malspertulo en Esperantujo", D-ro A. Capell klarigis, ke, kvankam dum multaj jaroj li studis Esperanton, mankis al li oportunoj por uzado. Li eklernis helpe de "Slosilo". Post jaroj, preskaŭ sen oportuno paroli Esperanton, li trovis, en brokantejo en Maitland, libron, kiu iam estis posedaĵo de S-ro Pyke. Tiu,

la 5a Eldono de "Fundamenta Krestomatio" (1910), revokis lan intereson, sed korespondado de amiko en la Insuloj Kanarioj degeneris en la hispanan kaj nun li emas eligi vortojn kun sono de Esperanto, sed kiuj tamen ne estas.

"Orkideoj" estis la temo de orkideisto, Phil Henderson (5/9). Li montris lumbildojn kaj klarigis multon pri la kultivado de tiuj floroj, inklude la influon de kromosomoj sur la reproduktadon kaj la ŝanĝigemajn dezirojn de aĉetantoj. Samvespere, prezentigis lumbildoj pri Timor kaj Japanujo.

S-ro David Gould (12/9) pritraktis la temon "Liberiĝuloj" farante kelkajn pensinstigajn demandojn: "Kio estas libereco?" De kio oni celas liberiĝi? ktp. Li emfazis, ke ĉiu devas regi sian vivon. Poste la ĉestantigo aŭskultis paroladon de A.B.C.-Honorgasto de 4a de Septembro. La parolinto, kies profesio rilatas al la angla lingvo, opiniis, ke Esperanto nenaim povos fariĝi la internacia lingvo.

Anoj, kiuj ĉestis la kunvenon de 19/9 bonvenigis S-ron George Clarke el Suda Aŭstralio, kaj poste ilin distris S-ino M. Chaldecott per rakonto pri la 62a U.K. Ĉefe ties malpli seriozajn aranĝojn ŝi partoprenis.

"Ĉirkaŭ la Mondo en 1902" estis la titolo de historie signifa rakonto kun lumbildoj, far Wre. Chandler (26/9). Lia avo veturis al Anglujo por la kronado de Reĝo Edward VII, kaj aĉetis multajn kolor-lumbildojn. Per tre malnovaj bildoj kaj projekciiloj Wre montris vindidadojn en Aŭstralio, Azio, Egiptujo, Eŭropo, Usono, Kanado kaj Novzlando. Eĉ kvazaŭan moviĝon li povis prezenti per kelkaj.

Lumbildoj pri la 62a U.K., prezentitaj de M. Chaldecott (10/10) respegulis pli fruan paroladon, kaj temis ĉefe pri la ekskursoj kaj la ĉefurbo, Rejkjavik.

—Margaret Chaldecott.

FREDA SMITH

Mortis en Sidnejo, la 26-an de novembro 1977, F-ino Freda Smith, en sia 97-a vivjaro. Ŝi naskiĝis en Heidelberg, Germanio, en 1880 kaj venis al Aŭstralio kiel 8-jara knabino.

Dum la unua mondmilito ŝi unue aŭdis pri Esperanto kaj fariĝis fidela membro de la Sidneja E-Societo. Ŝi regule vizitis la kunvenojn de tiu societo kaj partoprenis ties piknikojn.

Kiam ŝia sanstato malboniĝis antaŭ dek jaroj, ŝi transloĝiĝis al hejmo de maljunulinoj, S-ro Wre Chandler, kiu memoras Freda de antaŭ 45 jaroj, faris la nekrologon ĉe la kremacio.

Denove nerealismo malutilis

En nia septembra numero ni raportis pri la negativa rezulto de intervjuo kun raportisto de Wall Street Journal, kiu vizitis kunvenon de la Wellington E-Klubo. Nun ni ricevas raporton el Brazilo pri la rezulto de artikolo en "Manĉete", la plej legata gazeto en Brazilo, kaj posia televida programo tutnacie spektata, kiuj prezentis la esperantistan kolonion "Bona Espero", kiel etarn paradizon, kie abundas tiaj abstravtajoj, kiaj 'paco', 'amo', 'idealismo', 'servemo' kaj 'homar-anismo'.

Rezulte de tiuj raportoj alvenis en "Bone Espero" inundo da homoj, kiuj interesiĝas nek pri Esperanto, nek pri laboro, sed ĉefe pri plena stomako kaj nepeniga vivo en nepoluciita kampara kolonio.

Eble Esperanto gajnis pro tiuj jurnalismaj ekzercoj, sed "Bona Espero", kiu havas nek strukturon nek regularon por protekti sin kontraŭ parazitaj, suferis financon baton.

SOCIA PRESTIĜO

Sir William Ostler, la fame konata kanade naskita diagnozisto, kiu revoluciigis medicinan instruadon en la malfrua parto de la pasinta jarcento, unu tagon vizitis londonan infanan hospitalon. Li rimarkis, ke en la resaniga fako ĉiuj infanoj jam kolektiĝis ĉe unu fino de la ĉambro, partoprenante siajn ludojn aŭ ludante per siaj ludiloj — ĉiuj kron unu malgranda knabino, kiu forlasite sidis sur la rando de sia lito avide kroĉante malmulte koston pupon.

La fama kuracisto, kiam li ekvidis la solecan figuron, rimarkis al la flegistino: "Kial la knabineto ne ludas kun la aliaj?"

"La aliaj infanoj," flustris la flegistino, "malestimas, ĉar neniu vizitanto alvenis por paroli kun ŝi. Sia patrino mortis, kaj ŝia patro vizitis ŝin nur unufoje kiam li donacis al ŝi tiun pupon. Ĉe la infanoj vizitantoj signifas multon. Kiu ne ricevas vizitanton, tiu estas malestimata".

La kuracisto alpaŝis al la infano, kaj petis per voĉo sufiĉe laŭta por atingi la aliajn infanojn. "Ĉu vi permesus, ke mi sidu apud vi?"

La okuloj de la knabineto eklumiĝis. "Mi ne povas longe resti, hodiaŭ," li daŭrigis, sed restis dum kvin minutoj parolanta kun la knabineto. Li eĉ demandis pri la sano de la pupo, kaj solene uzis sian stetoskopon por aŭskulti al la brusto de la pupo.

Kiam li foriris, li sin turnis al la knabineto kun ekbrilo en siaj afablaj

okuloj, kaj diris sufiĉe laŭte por atingi la aliajn infanojn: "Ne forgesu nian sekreton, kaj ne rakontu ĝin al alia."

Atinginte la elirejon, li retren rigardis. La knabineto nun estis la centro de scivolema kaj admiranta infanamaso.

El la angla tradukis Ken G. Linton.

Gramatike-

NI POLURU NIAN STILON

Mi ofte rimarkas, ke oni uzas la esprimon "ne ankoraŭ", kie oni devus uzi "ankoraŭ ne".

"Jam" signifas "ŝanĝo" kaj "ankoraŭ" signifas "nenia ŝanĝo, do "li jam laboras" signifas, ke antaŭe li "ne laboris", sed post ŝanĝo li nun "laboras"; "li jam ne laboras" signifas, ke antaŭe li "laboris", sed post ŝanĝo li nun "ne laboras". "Li ankoraŭ laboras" signifas, ke antaŭe li "laboris", kaj post nenia ŝanĝo li "laboras", dum "li ankoraŭ ne laboras" signifas, ke antaŭe li "ne laboris" kaj post nenia ŝanĝo li "ne laboras".

Do ni povas facile kompreni, ke "ne ankoraŭ" sinonimas kun "jam ne", kaj "ne jam" sinonimas kun "ankoraŭ ne".

Resume: "ankoraŭ ne laboras" kaj "ne ankoraŭ laboras" ambaŭ signifas, ke li "ne laboras", sed "ankoraŭ signifas, ke nenia ŝanĝo okazis, do ankaŭ antaŭe li "ne laboris", dum "ne ankoraŭ" egalas al "jam ne" kaj signifas, ke ŝanĝo ja okazis, kaj male, ke antaŭe li "laboris".

—Ken G. Linton.

STOP PRESS

LAST CONGRESS ANNOUNCEMENTS

We have received from Launceston the following provisional Congress Programme:

Monday, 2-1-78:

- 11.00 Registration of Delegates.
- 3.00 Congress Committee Meeting.
- 8.00 Film Evening.

Tuesday, 3-1-78:

- 9.00 Official Opening of Congress, Congress Photo.
- 11.00 Prof. R. Robertson — Lecture
- 12.00 Hilarity Hour — Press Conference.
- 2.00 A.E.A. General Meeting 1
- 3.00 Teaching Session

- 5.15 Civic Reception at Town Hall.
- 8.00 Get-Together Dance.

Wednesday, 4-1-78:

- 9.00 Other organizations including U.E.A.
- 11.30 Bus Tour No. 1. City, Cataract Gorge, Entally House.
- 8.00 Items from Clubs, Community Singing.

Friday, 6-1-78:

- 9.00 Mr. Ralph Harry "Esperanto and Diplomacy"
- 9.45 Miss A. Hearn: Slides and Lecture.
- 11.00 A.E.A. General Meeting 2
- 12.00 Literary Items
- 2.00 Miss M. Sanders: Slides on Bulgaria
- 3.00 Brief Talks (Limit 5 Min.)
- 4.30 Teaching Session
- 8.00 International Concert.

Saturday, 7-1-78:

- 9.00 Bus Tour No. 3—Tamar Valley
- 2.00 Dr. A. Einihovici: Lecture
- 3.00 Hilarity Hour.
- 4.30 Teaching Session.
- 6.30 Banquet.

Sunday, 8-1-78:

- 9.00 Closing of Congress.
- 11.00 Church Service.

CIVIC RECEPTION

A Civic Reception for Congress Delegates will be held at the Town Hall, Launceston, on Tuesday, 3rd January, 1978, at 5.15 p.m.

JUST PUBLISHED

"Studlibro por la Supera"
by K. G. Linton.

The essential handbook for those aiming at the 'Supera Diploma' of A.E.A.

\$2.50

from the A.E.A. Book Service,
8 Lone Pine Pde., Matraville, 2036

ANOTHER CRY FROM THE THIRD WORLD: M. A. Vyas, Prezidanto, Esperanto Klubo 17/6 Chhoti Gwaltoli 2, Indore, M.P. 452001, India is in urgent need of simple Esperanto textbooks and readers for his club members. Can we help our less affluent brethren?

NEWS-DIGEST

THE AFFAIRS OF HEAVEN: (See last issue, "The affairs of men.") We are all familiar with K.E.L.I., the Catholic Esperanto movement and the work of the Esperanto priest, Pastro Ciccanti. On the Protestant side, Esperanto is being used to good effect in such places as Luxembourg. (In fact, in Luxembourg Weekly, were the headlines—in both German and English — "Also, God understands Esperanto".)

Now we read of an ecumenical service as an important feature of an international week-end held 4-6 Nov. at Herzberg-Harz.

IT THE CAP FITS! We seldom need specific reasons for our "get-togethers", but the organizers of the Paris Esperanto Week (October) set out their motives. Like Clancy of the Overflow's friend, "verbatim, I will quote it".

"It is useful to meet each year to refresh and stretch our strength; to program our labour. We aim, in essence, to remind people about the international language and to wake up those among us who are sometimes content to wait while others work".

MAKE SURE YOU USE ESPERANTO! "What you don't use, you lose". e.g. if you stay in bed for a month, you lose, for the time being, the art of walking. Are you, like me, inclined to speak in English to fellow Esperantists? From the "Argentine Esperantist" comes this admonition:—"It is of the utmost importance that Esperantists should persist in their Esperantism and use the international language to the full extent of their ability—through reading of books, by letter writing and during social contacts. If you can't travel abroad, maintain contact with the rest of the world. Without fail, use Esperanto. That is the pleasant duty of every conscientious Esperantist."

A VERY LONG LIVER: How old is the oldest living Esperantist? We don't know. We think, however that the case of Felix Epstein might be worth including in the book of records. Felix, of Hamburg, recently celebrated his 95th

birthday. He still maintains a lively, even sprightly, interest in all aspects of the Esperanto movement. He first learned of the language 77 years ago, and learned the language 71 years ago.

RADIO ROUNDUP: Radio news items in Esperanto have for many years been part of the European way of life e.g. we read of Esperanto broadcasts from such places as Warsaw, the Vatican, Rome, Vienna, Geneva, Budapest and Sofia. Japan also, has regular Esperanto broadcasts.

Now the Second Programme on Austrian television will include an Esperanto segment entitled "Free Entry".

THE INTERNATIONAL CONGRESS OF BLIND ESPERANTISTS occurred in Oslo where members gathered from Denmark, F. R. of Germany, Finland, France, Italy, Yugoslavia, Holland, Norway, Austria, Sweden, Switzerland and Hungary.

EUROPEAN ESPERANTO-GO-ROUND: Just 2 random examples:—Poland celebrated its "Golden Autumn" holiday week at Miedzygorze. 192 from Poland, 12 from the German Democratic Republic, 20 from Britain, 7 from Bulgaria, 8 from Hungary, 10 from Italy, 6 from Czechoslovakia, 3 from Belgium and 1 each from France, Iceland, F. R. of Germany, U.S.S.R., U.S.A., Sweden—and Australia.

Also, the Polish Government has awarded the Silver Merit Cross to Stanislaw Swistak, a most active and distinguished Esperantist.

At Perpignan in France, 80 academics from 12 countries gathered for a discussion on "Social Linguistics". Although the Catalan language was emphasised, S-ro Rene Llech-Walter hammered home the usefulness of Esperanto as an aid to learning other languages.

AFRICA SPEAKS: From Malagasy Africa and Malagasy Esperanto Centre (A.M.E.C.) comes urgent appeal for help in buying books, stencils, paper, stamps, etc.

Donations will be thankfully received at Boite Postale 174, Tanarive — R.P. Repoblika Demokratika Malagasy. If you are sending bank cheques they should especially mention a/c. No. 01.76354.73.301 A.M.E.C.

CREDITS: Pilo Press.